PETRO DANOV

# LA PAROLO DE LA GRANDA UNIVERSALA FRATARO

# LA MAJSTRO PAROLAS

SEVLIEVO — 1938

Ni prezentas la parolon de la Majstro al ĉiuj fratoj, kies animo estas tuŝita de la Amo, kies intelekto estas lumigita de la Scienco kaj kies spirito ĝuas plenan Liberecon.

Ĉar nur tiu vivas — diras la Majstro — kies animo estas tuŝita de la Amo.

Nur tiu, kies intelekto estas lumigita de la scienco, portas en si la vivon.

Kaj nur tiu, kies spirito ĝuas plenan liberecon, estas vera homo kaj frato de la homaro.

# Vivo

Fonto de la vivo estas la Amo. Amo portas la plenan vivon.

La vivo fariĝas reala kiam oni konas la Amon.

Se la homo ne komprenas la Amon, li ne povas kompreni ankaŭ la vivon. Se li ne komprenas la vivon, li ne povas kompreni ankaŭ la tempon, en kiu ĝi fluas kiel kontinua proceso. Kaj se li ne komprenos la tempon, li perdos la muzikan ritmon de la vivo kaj enfalos en serion da malharmoniaj statoj, kiuj faros lin malfeliĉa.

La plej granda afero, ekster la Amo, estas la vivo. La vivo estas frukto de la Amo. Tamen, vivo kaj Amo estas aferoj malsamaj kaj diferencaj. En la vivo konstante fariĝas du procesoj: unu estas proceso de detruado kaj la alia estas proceso de konstruado. En la Amo tiuj du procesoj ne ekzistas. Ĝi estas afero pura kaj unueca. En la vivo ekzistas diferencigo.

Vivo sen Amo havas nenian sencon. Tia vivo estas vico da suferoj, faladoj kaj leviĝadoj.

La vivo ne povas manifesti sin sen amo.

Vivo sen amo ne ekzistas.

La unua vojo de la vivo estas la amo. Por montri, ke vi vivas, vi devas ami.

La senco de la vivo kuŝas en tio — ami kaj esti amata.

La provizora vivo estas ombro de la vivo, aŭ la plej malgranda proekcio de la plena vivo.

La eterna vivo enhavas senlimajn eblojn.

Ĝi portas ĉiujn kondiĉojn por racia kreskado.

Kaj sub „plena vivo" estas komprenata la Komuna Universala Animo, kiu manifestas sin en la tuta viva Naturo.

Niaj animoj estas organoj de tiu granda animo, ĝiaj spiroj.

Por ke la granda principo de la vivo manifestu sin, ĝi devas akcepti ian ajn formon, konforman al ĝiaj celado kaj movado. La celado — ĝi estas la prudenta interna impulso, kaj la movado estas ĝia fizika esprimo.

La vivo tamen ne povas manifesti sin nur en unu formo; ĝi manifestas sin en senlima nombro da formoj. Kiam tiuj ĉi formoj kuniĝas kaj konsistigas formon pli superan, ni diras, ke la vivo estas prudente organizita. Tiam ĉiuj tiuj formoj havas la tendencon esprimi tiun ĉi pli altan formon.

La vivo neniam ĉesiĝas, sed ĝi daŭras eterne.

La eksteraj formoj detruiĝas, sed la vivo daŭras eterne. Nenio estas kapabla ĝin detrui. La vivo estas pli forta ol la morto.

Ĝi estas libera, neperceptebla, seninterrompa. Ĝi haltas neniam. Ĝi senĉese eniras internen kaj eliras eksteren.

Kaj se la vivo eniras internen kaj ne eliras eksteren, oni ne povas komunikiĝi kun la ĉirkaŭanta medio.

La vivo, kiu estas en ni, estas perfekta.

Plezuroj, pasioj, malbonaj pensoj kaj sentoj limigas la naturan manifestiĝon de la vivo.

La vivo povas esti nur bona. Malbona vivo ne ekzistas.

Sed la ŝanĝoj, farataj en la bona vivo, alportas la malbonajn rezultojn. Kaj tiam oni parolas pri vivo „laika", pri vivo „spirita", pri vivo „provizora" kaj „eterna".

Sed la vivo per si mem povas esti nek „laika", nek „spirita".

Kiam la besteco vivas en la homo, la vivo fariĝas „laika".

Kiam la prudento vivas en li, ĝi fariĝas spirita. Ĉar la vivo de la homo distingiĝas de la vivo de la ceteraj ekzistaĵoj per sia konscia prudenteco.

La vorto vivo, en efektiveco, subkomprenas prudentecon. Kie mankas prudenteco, mankas ankaŭ vivo. Kie estas prudenteco, eĉ en minimuma kvanto, tie jam estas vivo.

La prudenta vivo estas vivo de senmorteco, vivo sen suferoj kaj turmentoj.

Ĝuste tiu ĉi vivo estas la vera vivo de la homa animo. En ĝi ĉio manifestas sin en sia tempo.

En tiu ĉi vivo estas ne konfuzoj, sed konstanta laborado.

La vivo per si mem estas unu.

La fizika vivo, la spirita vivo kaj la dia vivo estas tri grandaj manifestiĝoj de la unueca vivo.

Sed iliaj principoj, iliaj objektoj kaj iliaj celoj estas malsamaj.

La fizika vivo konstante ŝanĝiĝas kaj varias. Ĝi estas la vivo de la supraĵo de la akvo, de la ondoj de la maro.

La spirita vivo varias, sed ne ŝanĝiĝas. Ĝi estas vivo de la maraj profundoj, de la interno de la maro.

La dia vivo nek varias, nek ŝanĝiĝas.

Sed ĉiuj tiuj ĉi manifestiĝoj de la vivo estas reciproke mallarĝe ligitaj inter si. Ili estas partoj de unu tuto, de la tuteca senlima vivo.

Por ke la homo komprenu la vivon kaj por ke li estu utila al si mem kaj al la aliaj, li devas komenci de la fizika vivo kaj iom post iom progresi al la spirita kaj dia vivoj.

Kiu ne amas la fizikan vivon, ne povas havi ian rilaton al la Lumo.

Ĉar en la fizika mondo estas amasigita la energio de la lumo — en la kreskaĵoj kaj en la fruktoj.

Kaj la higieno de la fizika vivo komenciĝas per la ĝusta utiligado de la lumo, amasigita en kreskaĵoj kaj en fruktoj. Per aliaj vortoj, ĝi komenciĝas per la ĝusta nutrado.

Kaj la nutrado estas antaŭparolo al la fizika vivo. Tiel same, kiel la muziko estas antaŭparolo al la spirita vivo, kaj la preĝo estas antaŭparolo al la dia vivo.

La vivo estas trezoro, kiu devas esti zorge gardata. Gardu ĝin per la saĝeco, kaj la vera scienco, kiu devenas de tiu lasta, estu ĝia gardisto.

Lasu ĝin flui de ĝia granda fonto — la Amo, kiu esceptas ĉiujn suferojn.

Sanktigu ĝiu per la Vero, la mondo de la absoluta prudento, kie ne povas ekzisti maljustaĵo.

Sanktigu ĝin per la Vero, kiu montras la liberecon en ĉiuj direktoj.

Ĉar ankaŭ la vivo havas sian mateniĝon, sian sunleviĝon kaj sian tagmezon.

La mateniĝo de la vivo, ĝi estas la Amo.

La sunleviĝo de la vivo, ĝi estas la Saĝeco.

La tagmezo de la vivo, ĝi estas la Vero.

Mateniĝu en la vivo! Burĝonu!

Levu vin! Stariĝu sur viaj piedoj kaj eksentu,

ke vi estas ligita kun ĉiuj ekzistaĵoj sur la tero kaj en la ĉielo.

Leviĝu kiel suno en la vivo! Floru kaj donu fruktojn!

Atingu ĝian tagmezon! Maturiĝu!

Kaj kiam vi levos vin al la tagmezo de la vivo, vi gustumos ĝian altan sencon, ĝian dolĉan frukton.

# Animo

La disiĝo de la homa animo de Dio estas unu el la plej grandaj momentoj de la ekzistado. Tiu ĉi disiĝo estas konata en la mondo de la anĝeloj sub la nomo a ŭ r o r o d e l a h o m a a n i m o.

La animo eliras el sia primitiva fonto kiel dia radio kaj eniras en la senmezuran universon por fari la laboron, destinitan por ĝi.

La animo estas eterna. Ĝi estas tiel eterna, kiel Dio estas eterna. Sed dum Dio estas absolute senŝanĝa, la animo senĉese ŝanĝiĝas kaj tiamaniere ĝi disvolviĝas kaj akiras novajn kvalitojn.

La homaj animoj vivas kaj movas sin en Dio. Ili ekzistas kun Li en la eterneco, kvankam ili aperas en diversaj momentoj. Ili ekzistas kune, kvankam ili ne eliris samtempe el Dio; vivas la saman vivon, kvankam ili diferencas. Kaj ili diferencas, ĉar ĉiu animo prezentas unu staton de la Dia konscio.

Animoj — tio estas la diversaj statoj, en kiuj la Dia konscio manifestas sin en tempo kaj spaco.

Tial ni diras: E k z i s t a s n u r u n u g r a n d a D i a a n i m o, kaj ĉiuj animoj estas enhavataj en ĝi.

Ĉio en la mondo povas malaperi, sed la animoj — neniam. Ili ne povas malaperi, ĉar ankaŭ ne povas malaperi la Dia animo, la Dia konscio.

Hodiaŭ oni ne konas la animon. Oni konscias sin mem ne kiel animo, sed kiel persono. La persono — ĝi estas la fizika homo, sed ne la vera „si" — la animo. Oni konas ankaŭ la personojn de aliaj,

sed ne iliajn animojn, kiuj estas niaj veraj „proksimuloj“.

Sed, se la homoj ne enmetos en sian konscion la ideon, ke ili estas vivaj prudentaj animoj, se ili konscias sin mem ĉiam ankoraŭ kiel personoj, kiel intelektoj kaj koroj, kiel viroj kaj virinoj, ili nenion atingos. Ĉiuj tiuj formoj de konscio estas jam uzitaj.

Tamen, se ili skribus en sia konscio: Ni estas vivaj prudentaj animoj, ili enportos ion novan en sian vivon kaj donos al ĝi novan direkton.

Ĉar, ĉe la nuna disvolviĝo de la homaro, ne ekzistas pli alta stato ol la stato de la animo. Ĝi portas en si ĉiujn kondiĉojn, ĉiujn eblojn de la Dia Amo.

Nur en la animo Dio povas sin montri kaj sin manifesti en sia pleneco. La Amo povas manifesti sin plene nur per la animo.

Se vi manifestas vian amon nur per la koro, ĝi estas nur duone manifestita.

Se vi manifestas ĝin per via intelekto, ĝi estas denove duone manifestita.

Kaj ĉiuj malfortaĵoj en la mondo kuŝas en la duonoj.

Ĝis nun la homa animo burĝonis, ĝi atingis la staton de la burĝono.

Sed en nia epoko tiu ĉi burĝono komencas malfermiĝi.

Tiu ĉi malfermiĝo de la burĝono-animo estas konata kiel unu el la plej superaj momentoj en la kosmo kaj estas nomata ekfloro de la homa animo.

Kaj ĉiuj superaj estaĵoj en la Dia mondo atendas la ekfloron de la homa animo.

Ili scias, ke en ĝi estas skribitaj ĉiuj manifestiĝoj de Dio, ke en ĝi estas enmetita ĉio, kio fariĝis antaŭ ili, kio nun fariĝas kaj kio fariĝos en la estonteco.

Ili scias, ke la homa animo estas sankta libro, en kiu Dio, en speciala maniero, nekonata ankaŭ al ili mem, skribis la disvolviĝon de la tuta universo.

Tial, kun tia sankta trema sento ili atendas la ekfloron de la homa animo. La floro, en kiun ekfloros tiu ĉi animo, ekbrilos per sia tuta beleco, kaj Dio enmetos en ĝin sian Lumon kaj sian Amon.

Kaj en la homa animo estas tia beleco, kia troviĝas en neniu alia ekzistaĵo en la mondo.

Tiu ĉi beleco povas esti komparata al nenio. Eĉ kiam Dio mem ekrigardas la formon de la homa animo, Li ĝojas.

Kiam la homa animo ekfloros, tiam ĉiuj anĝeloj, ĉiuj servantoj de Dio venos. De nememoreblaj tempoj ili atendas ĝian ekfloron por gustumi ĝian nektaron.

Per sia veno ili alportos novan kulturon, kiun mi nomas „kulturo de la Amo".

Kiam Kristo venis al la tero, li venis ĝuste por helpi al la homaj animoj. Ĉar ĉiu animo, kiu venis al la tero, havas gravan taskon, kiun ĝi mem devas solvi.

En la mondo estas prudentaj animoj, kiuj volas sin levi kaj vivi konscie. Por ili venas al la tero la grandaj Majstroj, al ili helpas ĉiuj amantaj kaj lumantaj animoj, kiuj laboras en la mondo.

Ĉar, nur animoj, kiuj amas kaj kiuj lumas, povas helpi al aliaj animoj. Ili finis siajn ekzamenojn sur la tero. La Dia konscio en ili vekiĝis. Tial, ili ne volas forlasi la teron. Ili diras: „Nun ni vivos sur

la tero ĉe ĉiuj kondiĉoj, ni vivos tiel, kiel Dio volas. Ni komprenas nun kiel ni devas vivi."

Ekzistas nenio malebla por la homa animo, kiu volas levi sin. Ĝi estas forta dank'al sia ligiĝo kun la aliaj animoj, kiuj estas ĝiaj veraj proksimuloj.

Kaj ju pli granda estas la nombro de la animoj, kun kiuj la homa animo estas ligita, des pli forta kaj fortika ĝi estas. La prospero de la animo dependas de la nombro de la animoj, kun kiuj ĝi estas ligita. La konscio de tiuj animoj, kiuj partoprenas en la tera vivo de iu animo, estas konstante koncentrigita en la Amo, tial ili helpas al ĝi kuraĝe kaj senprofite.

Jen kial la arto de la tera vivo konsistas en tio — dum oni estas sur la tero, en tiu ĉi malgranda formo, ligiĝi kun la animoj de la aliaj homoj.

Tie estas la ŝlosilo de la sukceso. Eĉ se nur unu animo amas vin, ĝi povas helpi al vi en la malfacilaĵoj de la vivo.

Kaj kiam multaj animoj direktas sian amon al unu homo, li povas fariĝi ĉio — poeto, pentristo, muzikisto, scienculo.

Amo estas granda forto.

La vojo de ĉiu animo estas severe difinita kaj neniu estas kapabla deflankiĝi ĝin de ĝi. Neeble estas por homa animo delogi alian animon de ĝia vojo, ĉar Dio zorgas super la animoj kaj direktas ilian movadon en la senmezura universo.

Por si mem ĉiu animo estas malgranda universo, kiu sin movas laŭ sia vojo en la granda universo. Sed la animo havas la admirindan kapablon malgrandigi sin — fariĝi senlime malgranda, kaj etendi sin — fariĝi senmezura kiel la universo.

Elirintaj unu post la alia el la Dia konscio, la animoj sin trovas en tiaj reciprokaj rilatoj, en kiaj sin trovas la tonoj. En siaj rilatoj la animoj prezentas harmoniajn grupojn.

Ili formas apartajn sistemojn, kiuj sin movas spirale en la senlima spaco. En sia involucia movado ili malsupreniras grupe, sed restas en diversaj, laŭ denseco, sferoj. Ĉar, ne ĉiuj povas superi ilian rezistancon. Nur parto de ili atingas la plej densan materion. Tiamaniere la animoj estas ligitaj en formo de ĉeno, kiu pasas tra diversaj kampoj. Ĉe sia evoluo la animoj supreniras laŭ la sama leĝo — la diversaj animoj supreniras en sferojn, diversaj laŭ denseco.

Ami la animon de la homo — en tio konsistas la vera moralo.

Sed kiu volas okupi sin pri la homa animo, devas havi altan inteligentecon. Li devas kompreni la profundajn procesojn, kiuj fariĝas en ĝi.

Profunda estas la homa animo! Profunda kaj senlima.

Ĉar la homa animo loĝas ekster nia mondo, en mondo de pli multaj dimensioj.

Ĝi havas nur unu malgrandan projekcion sur la tero. Ĝi aperas nur por certa tempo kiel gasto de la intelekto kaj de la koro.

Kaj kiam la animo vizitas homon, li fariĝas granda, inspirita kaj nobla.

Se retiriĝas la animo, li denove fariĝas ordinara homo.

Ĉiuj aliaj pensoj kaj deziroj elfluas de tiu ĉi fonto — la animo.

La animo venas de alia fonto — la homa spirito.

La homa spirito venas de fonto ankoraŭ pli granda — la Dia Spirito.

Kaj la Dia Spirito venas de la plej granda fonto — la absoluta nekonata spirito de la universo, pri kiu neniu scias ion.

Tial, memoru:

Vi estas animo, ne korpo!

Vi estas animo, kiu iam embriiĝis en la Dia Spirito, embriiĝis en amo.

Nun via animo estas jam burĝono, kiu atendas sian ekfloron.

Koncentrigu vian konscion en ĝi, ĉar ĝi estas unu el la plej altaj momentoj de via vivo.

Tiam vi malfermos vin por la granda Suno, kiu lumigas la tutan Dian mondon.

# La Vero

Ni havas du ideojn pri Dio. Elirante el Dio, ni konceptas Lin kiel aferon, kiu limigas sin en si mem. Kaj komencinte nian disvolviĝon, venante de tio, kio havas finon kaj limon, kaj alirante al tio, kio estas sen komenco kaj fino, ni konceptas Dion kiel Senliman kaj Senfinan.

La vero, kiu devenas de la senlimeco, faris la aferojn limigitaj. Ĝi manifestis la senlimecon.

Dio, kiel Vero, altiras nin, kaj Kristo montras la ĝustan vojon de tiu interna movado.

Tial la Vero estas direkto al la senlimeco kaj senfineco, kiu estas en rilatoj kun la aferoj limigitaj.

Estas dirite: „Kapo de la Parolo estas la Vero." Kaj ni scias, ke ĉiuj movoj venas de la kapo kaj ĉiam iras al la kapo. La kapo montras la direkton. Kaj kiam ni diras, ke iu havas kapon, ni subkomprenas, ke li havas direkton kaj celon, al kiu li aspiras.

Nur homo, kiu havas la Veron, konas la direkton de sia vivo.

Ĉio en la universo movas sin. La tero sin movas ĉirkaŭ la suno. La suno sin movas ĉirkaŭ alia suno; fariĝas movado en movado. Sed la komuna direkto de ĉiuj tiuj movoj estas donata de la Vero.

Nun ne nur la ĉielaj korpoj movas sin — ĉiuj deziroj, sentoj kaj pensoj de la homo formas miriadojn da mondoj kaj sistemoj, kiuj sin movas al la alta celo — la Vero.

Oni devas koni ĉiurilate la vojon de sia movado. Kaj oni ne devas, en iu ajn maniero, haltigi tiun ĉi movadon. Nenia ŝanceliĝo, eĉ por minuto, estas tolerata en la Vero. Ĉiu ŝanceliĝo estas peko, ĉar eĉ la plej malgranda movo de iu aparta homo estas tiamaniere ligita kun aliaj movadoj, ke eĉ ĉe minimuma ŝanceliĝo povas okazi al li katastrofo: en la universo la vojoj kruciĝas.

Ĉiuj ekzistaĵoj, kiuj ne vivas laŭ la Vero, havas deziron movi sin en malordo. Tial la naturo ilin limigis. Kaj la Vero subkomprenas movadon en difinita direkto — la direkto, en kiu ĉio en la universo sin movas — de tio, kio estas limigita, al tio, kio estas senkomenca kaj senfina.

„La Vero faros vin liberaj."

La tendenco kaj la celado de la homa animo estas esti libera. Tio estas alta impulso, sed ne ĉe la ordinara homo, sed ĉe homo, en kiu la konscio vekiĝis. La libereco estas granda impulso ĉe homo, en kiu vekiĝis la Dieco.

La Vero prezentas la altan principon en la homo.

„Vi ekamis la Veron en la homo".

La tuta vivo de la homo baziĝas sur la Vero, kiu portas liberecon.

Kaj kiam oni parolas pri libereco en absoluta senco de la vorto, oni subkomprenas la spiriton de la homo — la plej alta afero en li — ne la intelekto!

Per la Vero ni povas eliri el la kadroj de la provizora vivo, de la morto, kaj eniri en la eternan liberecon.

Oni diras, ke la Vero estas abstrakta. Ne, la Vero estas la sola realeco, kiu manifestas sin en nia vivo.

2

Ĝi estas mondo, kiu havas sian belecon, siajn kolorojn, tonojn, muzikon. Ĝi estas mondo, kiu ekzistas kaj ekzistos eterne.

En tiu ĉi mondo ĉiu afero estas severe, matematike difinita. Ekzistas nenio okaza aŭ hazarda.

La Vero estas sendependa de la apartaj konceptoj. Ĉu vi pensos tia- aŭ alimaniere, ĉu vi proksimiĝados aŭ malproksimiĝados de ĝi, vi ne ŝanĝos ĝiajn rilatojn.

La Amo ĉiam havas tendencon al la Vero. La Vero estas objekto de la Amo. Sen la Vero kiel objekto, la Amo ne povas manifesti sin. Ankaŭ la beleco estas esprimo de la Vero. Kio estas la beleco rilate al la homo, tio estas la Vero rilate al la dia mondo. La amo estas grundo de la dia mondo, la vero estas ĝia lumo.

La Vero apartenas al la mondo de la senmorteco. Oni povas rekoni ĝin nur aplikante ĝin.

La Vero ne estas alirebla por pekuloj. Paroli al pekuloj pri vero, ĝi estus la sama afero, se matematikisto parolus al simpla homo pri superaj matematikaj problemoj.

La amo estas indulga pri la eraroj de la homo, kaj pri iliaj pekoj.

La Vero, tamen, estas severa kaj senkompata.

La Vero toleras nek malklerecon, nek malvirton, nek malpurecon.

En tio konsistas ĝia perfekta beleco.

Tial, malvirtulo devas iri al la amo, malklerulo al la saĝeco, subpremato al la justeco kaj deziranto esti perfekta — al la vero.

Ĉu vi kredas, ke la Vero estas ĉe la riĉuloj? Ne. Ĉu vi kredas, ke ĝi estas ĉe la malriĉuloj? Ne

Ĉu vi kredas, ke ĝi estas ĉe scienculoj, ĉe filozofoj, ĉe religiuloj, ĉe okultistoj? Ne.

Nenie ĝi estas, la Vero. Ĉar tiu ĉi mondo estas mondo de suferoj kaj morto, mondo de konstantaj ŝanĝoj.

Kaj en tiun ĉi mondon la Vero ne povas veni.

Ĝi ne povas malsupreniri al tiu ĉi mondo.

La Vero parolas kun la sunoj.

La Saĝeco parolas kun la planedoj.

La Amo estas tiel humila, ke ĝi parolas kun ekzistaĵoj de pli malalta rango.

Ĉar la Vero parolas kun la sunoj, ĝia celo estas malproksima kaj tre alta.

Tial mortemuloj ne povas paroli pri la Vero. Ili povas doni fakton kiel konforman al la Vero, sed pri la Vero mem ili ne povas paroli.

Enmetu la Veron en vian animon kaj vi akiros la liberecon, kiun vi serĉas.

Amu la Veron.

Kaj kiam vi estas tiel mizera, ke vi ne havas eĉ groŝon, sciu ke ekzistas io pli alta ol la mizero. Ĝi estas la Vero.

Ekzistas io pli alta ol la riĉeco. Ĝi estas la Vero.

Tio ĉi Vero malkovros antaŭ vi grandan spacon, kaj viaj okuloj malfermiĝos.

Kiam ĝi venos en vin, ĝi faros vian intelekton luma, en vian koron ĝi enmetos pacon kaj al via korpo ĝi donos sanon kaj forton.

Heroo en la mondo povas esti nur tiu, en kiu vivas la Vero. Nur tiu povas oferi sin mem. Kaj kiam li sin oferos, li eniros en la animojn de la homoj — por tie vivi.

Tial mi diras: antaŭ ĉio kaj super ĉio — amu la Veron!

# Amo

Amo estas mondo, en kiu vivas la Dia Spirito.

La plej alta mondo, kiun konas la saĝuloj de ĉiuj epokoj, kaj pri kiu parolas Kristo, estas la Amo.

Kaj kiam ni diras, ke Dio estas Amo, ni subkomprenas la esencon, de kiu venas ĉio.

De la fonto de la Amo devenis kaj devenados ĉiuj mondoj en la daŭro de ĉiuj eternecoj.

Ĉio en la mondo vivas en la Amo de Dio kaj per la Amo de Dio.

Ĉio, kion ni vidas: universoj da steloj, sunoj, planedoj, estas manifestiĝo de la Amo.

La tuta kosmo en sia tuteco, la tuta fizika mondo estas manifestita, materialigita amo.

Ĝi estas la granda „korpo de Dio".

Ekster la Amo ni ne konas Dion. La Amo estas ligita kun ĉiuj organikaj estaĵoj. Ne ekzistas viva estaĵo, ne ekzistas en la mondo viva materio, kiu ne estus influata en tia aŭ alia maniero de la Amo, kiu ne estus ligita kun ĝi.

Tiu ĉi Dio de la Amo ne estas nur ekstere de ni, en la universo, sed ankaŭ interne de ni.

Li estas la viva interligilo de ĉio, kio estas „ekstere" kaj „interne".

La Amo ampleksas ĉion en si. Per si mem ĝi estas senlima, kaj ĉiuj aferoj ekster ĝi havas limojn.

Tial ni diras:

Nur la Amo estas eterna. De ĝi elfluas la Vivo. La Amo portas la plenan vivon.

La bono, kiel frukto de la amo, estas entenata en ĝi.

La saĝeco estas metodo de la Dia Amo.

Ankaŭ la Vero estas enhavata en la Amo.

Jen kial sub Absoluta Dia Amo ni komprenas absolutan Justecon.

Kie ne estas Justeco, ne estas Amo.

La Justeco estas la fizika flanko de la Amo.

Por ke la Amo manifestu sin sur la tero, necesa estas Justeco.

La Amo estas pacienca, kompatema, sed la absoluta Amo postulas absolutan Justecon.

Kaj nur homo, por kiu eklumis la Justeco, povas ricevi la Dian Amon.

Kristo estas manifestita Amo de la Justeco, kun lumas en tiuj, kiuj Lin amas.

La Amo estas nur por la grandaj, fortaj animoj.

Grandega energio kaŝiĝas en la homo de la amo.

Memoru: La amo ne estas por malsanaj homoj. Ĝi estas nur por homoj sanaj.

Malsanuloj kaj malvivuloj ne amas. Nur vivaj homoj, plenaj de la Dia Spirito, havas korojn, tremantajn de Amo.

Ne trompiĝu: malsanaj, spirite malvivaj homoj ne estas lumigataj de la Amo.

Kaj kiam vi aŭdas iun diri: „Mi estas homo de malvarma prudento, mi ne povas ami, mi ne povas okupi min per tiaj bagateloj", sciu, ke tiu ĉi homo estas malsaĝa.

Ĉar, la plej saĝa, la plej alta afero en la mondo estas la Amo.

La plej saĝa estaĵo, pri kiu oni diras, ke ĝi estas Amo, amas. Tiu, kiu kreis la mondojn, kiu faris

ĉion, kiu plenigis ĉion per vivo, kiu donis ĉiujn aferojn, amas, kaj tiu ĉi pigmeo, kun sia „malvarma prudento" ne povas ami!

Kristo venis al la tero por manifesti la Amon, kaj la homoj de la „sana prudento" ne povas ami!

Travojaĝu la tutan ĉielon, la tutan universon, trairu ĉiujn mondojn — ĉiuj diros al vi, ke Dio estas Amo.

Kaj se vi demandas iun anĝelon „ĉu Dio amas nin?" li respondos al vi: „Volu prefere, ke mi perdu mian tutan konscion, ĉion, kion mi akiris dum jarcentoj, ol respondi al la demando, ĉu Dio amas vin".

Kaj efektive, Dio ne povas esti malfidela al si mem. Supozi, ke Dio povas esti malfedela al si mem, signifus supozi, ke ekzistas ia ekstera forto, kiu limigas Lin. Kaj tio estas absurda. La amo estas senŝanĝa. Ĝi ĉiam lumigas nin.

Memoru la vortojn de la sankta Skribo: „Dio tiom amis la mondon, ke Li donis sian unikan filon, por ke ne pereu ĉiu, kiu kredas en Li".

Do, Dio, kiu amas la mondon, oferis sian plej belan kaj plej altan—sian unikan Filon, por levi tiujn animojn, kiuj kredas en la Amo. Kaj efektive oni povas kredi nur en unu afero: en la Amo. Ĉia alia kredo estas trompo.

La Amo toleras nenian naciecon.

La Amo toleras neniajn religiojn. La Amo mem kreas la religiojn.

En la Dia mondo ne ekzistas religioj. Tie ekzistas nur Amo. La atmosfero de la dia mondo estas la Amo. Tie ĉio spiras Amon.

Kaj ĉar la Amo ne povas manifesti sin sur la tero, tiam aperas la religioj.

Se vi volas tamen plenumi la volon de Dio, vi devas anstataŭigi la religion per Amo.

Tiam ĉiu, kiu vin amas, estos pastro kaj diservanto en via templo.

La plej alta afero en la mondo estas rekoni Dion kiel Amon.

La beleco de la vivo kuŝas en nia ligiĝo kun la Dio de la Amo.

La Amo entenas en si ĉiujn kondiĉojn, ĉiujn metodojn, ĉiujn eblojn, per kiuj la homa animo povas disvolviĝi en sia pleneco.

Nur ĝi povas veki en ĝi la kaŝitajn kapablojn. Scienco, arto ne povas esti stimulo por la vekiĝo de la homa animo. Ili estas nur efemeraj okupoj.

La sola reala afero en la mondo — ĝi estas la scienco pri la amo. Ĝi estas la alta objekto de la animo.

Se la homo komencas per la Amo, kiel alta potenca forto, liaj animo kaj spirito vekiĝas kaj reale kontaktas kun la fizika, spirita kaj dia mondoj. Nur per la amo oni povas kompreni la rilatojn, kiuj ekzistas inter tiuj ĉi mondoj, kiel ankaŭ la sciencon de la tuta vivo.

Sed ne forgesu jenon: en la vivo de la homo estas nur dek ebloj komenci per la amo. Ĉiujn dek jarojn ekzistas nur unu eblo eklabori per tiu ĉi granda forto. La cetera tempo de la homa vivo estas destinita por aliaj okupoj.

Se la homo kaptas unu el tiuj ĉi ebloj, unu el la radioj de la granda suno, kiu lumigas la tutan kosmon, ĉio alta kaj nobla en lia animo komencos flori, doni fruktojn kaj maturiĝi. La fruktoj de la animo maturiĝas nur sub la radioj de tiu ĉi suno.

Kiam ekbrilos la unua radio de la amo, vi sentos en via animo tian grandegan feliĉecon, tian lumon, tian fortan impulson en via intelekto, tian forton en via volo, ke ĉiuj baroj en la mondo komencos degeli.

Kelkaj momentoj, travivitaj en la Dia Amo, valoras senkompare pli multe ol jarmiloj da ordinara homa vivo, pasigita en plej grandaj ĝuoj kaj plezuroj.

Amante, ni serĉas Dion. Ni devas ami Dion por Lin akcepti kaj gustumi.

Kaj kiam ni Lin akceptas, ni gustumas Lian Saĝecon.

Estas dirite en la Sankta Skribo:

„Amu Dion per via tuta koro, per via tuta intelekto kaj per via tuta forto. Kaj amu vian proksimulon kiel vin mem".

Ĉi tio estas unu leĝo, kiu manifestas sin en tri mondoj:

Amo al Dio: vi estas en la Dia mondo.

Amo al si mem, al sia animo: vi estas en la spirita mondo.

Amo al via proksimulo: vi estas en la fizika mondo.

Se la homo aplikus tiujn ĉi tri leĝojn, ne ekzistus en la mondo forto, kiu povus rezisti al li, ne ekzistus penso, kiu ne subiĝus al li kaj ne venus servi al lia idealo.

Memoru tamen la grandan veron: Nur Dio amas, ĉar Dio estas Amo. Ne ekzistas homo, kiu per si mem vin amus.

La homo povas esti nur kondukilo de la amo, sed ami vin li ne povas. Kaj voli esti amata de iu, signifas voli esti amata de Dio.

Por manifesti sian amon al vi sur la tero, Dio devas elekti iun homon kiel kondukilon, kaj per li malkovras sin al vi.

Se vi havas sur la tero nur unu homon, kiu vin amas, ĝi estas sufiĉa.

Kaj ami vin signifas konscie vin provi.

La Amo, en dia senco, estas prudenta manifestiĝo inter du altaj, prudentaj animoj, animoj, kiuj staras sur la sama nivelo laŭ intelekto, laŭ koro, laŭ aspiroj, animoj egale noblaj, egale inteligentaj.

Nur tiaj du animoj povas kompreni sin.

Kaj tiam la amo inter tiuj ĉi du animoj estas kiel muziko. Ĉar nur du veraj virtuozoj povas muziki kune.

Vi ofte demandas: „Kiu amas nin?"

En la ĉeesto de tiu homo, kiu vin amas en dia maniero, kian ajn malĝojon, kian ajn ĉagrenon vi havus, ili tuj malaperas. Al vi fariĝas facile kaj lume.

En la Amo estas la jena sento: kiam oni amas iun, oni partoprenas en lia vivo, kaj oni rilatas al li tiel, kiel oni rilatas al si mem. Se ne aperas tiu ĉi sento, ankaŭ la amo ne aperis efektive.

De la amo venas la sento de la pardono. Nur Amo pardonas.

Vera amo estas pli forta ol la morto. Kiu amas neniam mortas. Amo donas senmortecon. La homoj mortas de manko de amo.

Se iu patrino havas fortan kaj neŝanceleblan amon al siaj infanoj, la morto ne povas forpreni ilin de ŝi.

Ne nur la morto — nenia forto en la mondo povas disigi du estaĵojn ligitajn de la amo. La amo formas la plej firmajn kuniĝojn en la vivo. Kaj kiam

du animoj formas tian firman kuniĝon per la forto de la amo, ili formas animon duoble pli fortan kaj pli luman — animon kun du konscioj.

Tiuj ĉi du animoj, renkontinte aliajn du animojn, kunigitajn en la sama maniero, ligiĝas kun ili kaj formas alian ankoraŭ pli fortan animon. La kvar animoj ligiĝas kun novaj kvar animoj kaj formas ankoraŭ pli fortan kolektivan animon. Tiel daŭras tiu ĉi Dia proceso de la amo, kiu sola estas kapabla formi firmajn, nedisigeblajn kuniĝojn inter la animoj.

En tia maniero, en la Dia amo, ĉiuj animoj ligas sin en unu tutaĵo tiel forte, tiel firme, ke nenia forto en la mondo estas kapabla disŝiri ĝiajn nerompeblajn ligilojn.

En tiu ĉi tutaĵo ĉiu animo vivas en la animoj de la aliaj kaj ili vivas en ĝi. Tiel efektiviĝas la unueco en la multeco kaj la multeco en la unueco.

Tial estas dirite, ke la savo de la homo dependas ekskluzive de la Amo. Kaj kiam la amo aperas ĉe homo, eĉ se li estus falinta, li tuj povas levi sin super sian nivelon.

Ankaŭ la feliĉo de la homo dependas de ĝi. En feliĉo oni sentas vastecon kaj plenecon danke al la amo, kiu nin vizitis. Tiam oni aŭdas la voĉon de ĉiuj vivaj ekzistaĵoj kaj sentas la pulson de la komuna vivo.

Ĉar, la Amo estas kolektiva manifestiĝo de ĉiuj inteligentaj ekzistaĵoj, kiuj finis sian evoluon kaj unuiĝis kun Dio. La amo de unu estas la kolektiva amo de ĉiuj tiuj ekzistaĵoj.

Kaj se la amo de unu ne estas la kolektiva manifestiĝo de ĉiuj inteligentaj ekzistaĵoj, ĝi ne estas amo. Tial la alta, ideala Amo manifestas sin en amo

al ĉiuj homoj, ne supozantaj ĝian fonton. Ami la homojn eĉ kiam ili malamas vin kaj intencas malbonon kontraŭ vi, servi al ili konstante, dum ili tion ne scias — tio estas la ideala Amo, tio estas servado al Dio.

Ĉar tio estas unu el la fundamentaj trajtoj de la Dia Amo — veni al ni sendepende de tio, ĉu ni estas pekaj aŭ ne.

La Amo kaŝas magian forton en si. Ĝi estas ŝlosilo, per kiu ĉio fermita estas malfermata. La Amo havas sian sanktan nomon — la perdita magia vorto, kiun serĉas la kabalistoj de ĉiuj epokoj

La sankta nomo de la Amo, ĝi estas la magia ŝlosilo de la senmorta vivo. Per ĝi ĉiuj negativaj energioj transformiĝas en pozitivaj. Per ĝi oni povas ĉion fari. Tial oni diras, kaj ĉio estas ebla por la Amo.

La sola forto, kiu estas kapabla magie transformi la tutan naturon de la homo, estas la Amo.

Ĝi devas penetri ĉien en li, penetri en la plej subtilajn faldojn de lia animo, por lin transformi.

La amo devas plenigi la homan spiriton. Ĝi devas manifesti sin komplete, perfekte kaj senlime en la homa animo. Ĝi devas sin trovi laŭ esenco kaj enhavo ankaŭ en la koro. Ĝi devas agi ankaŭ en la intelekto kiel kaŝita forto.

Kvar estas la manifestiĝoj de la amo ĉe la homo:

Ĝi agas kiel celado en la koro.
Kiel sento en la animo.
Kiel forto en la intelekto.
Kiel principo en la spirito.

Kaj tio ĉi estas la tuta ciklo de disvolviĝo de la komenco ĝis la fino.

La amo, kiel celado, iras al la centro de la tero. Tio estas la radikoj de la amo.

La amo, kiel sento, iras al la suno — tio estas la branĉoj.

La amo, kiel forto, manifestas sin nur ĉe geniuloj kaj sanktuloj. Ĝi manifestas sin ĉe ĉiuj tiuj, kiuj oferas sin por ia dia afero.

La sinofero devenas de la amo kiel forto.

Nur homo, kiu havas inteligentecon, povas efektivigi la amon kiel forto.

La amo kiel principo eniras nun en la mondon.

Ĝi ampleksas ĉion.

Ĝis la amo kiel forto ekzistas altiro kaj forpuŝo, ekzistas konfliktoj. En la amo kiel principo ĉiuj konfliktoj malaperas.

La homo devas pasi tra ĉiuj gradoj de la amo. Li devas pasi tra la celado de la amo — ĝiaj radikoj; li devas pasi tra la sento de la amo — ĝiaj branĉoj; li devas pasi tra la forto de la amo — ĝiaj floroj; kaj leviĝi al la amo kiel principo — gustumi la dian frukton de la amo.

Ĝis la amo ne venos en la mondon, tiu lasta ne transformiĝos.

Ĝi estas granda fajro, kiu donas vivon.

Sed ne ekzistas pli terura forto ol la amo por tiuj, kiuj estas en malharmonio kun ĝi.

Por ili venas tiam inferaj turmentoj.

Tiu ĉi fajro kiel granda ondo venas nun en la mondon.

Ĝi detruas malliberejojn, preĝejojn kaj kasojn.

Kiam la amo ne estas akceptata kaj manifestata ĝuste, ĝiaj dolĉaj sukoj, sub la efiko de specialaj

astralaj fermentoj, transformiĝas en specialan vinon.
De tiu ĉi vino la homoj ebriiĝas, kiam en ili naskiĝas la celado de la amo, kaj faras milojn da pekoj kaj krimoj.
Sed vi, kiu pensas, distingu tiun ĉi vinon de la homa amo, formitan poste, de la dolĉaj sukoj de la amo.
Ĵetu vin kuraĝe en la radikojn de la Amo.
Etendu vin vaste en ĝiaj branĉoj.
Floru kiel floro de la amo.
Estu kiel frukto de la amo.
Kaj kiam vi levos vin al la mondo, kie maturiĝas la fruktoj de la amo, vi ekkantos la kanton de la Homo, kiu trairis la tutan ciklon de la amo — de la radikoj al la frukto.
Aŭdu tiun ĉi kanton:

„Dio estas amo,
Eterna, senfina,
Plena de vivo,
Vivo de la milda Dia Spirito.
Spirito de la Sankteco,
Spirito de la Boneco,
Spirito de la plenaj paco kaj ĝojo
Por ĉiu animo".

Kaj vi aŭdos la rediron de la amantaj animoj:
„Mi irados sur la vojo de la lumo,
En kiu regas
La amo de Dio".

# Saĝeco

Dio estas Amo, Saĝeco kaj Vero — tri altaj mondoj, por la studado de kiuj estas necesa la tuta eterneco.

Ekzistas tri aferoj, laŭ kiuj oni povas ekkoni Dion. Ili estas:

La Dia Amo, kiu donas la plenan vivon.

La Dia Saĝeco, kiu donas la plenan lumon kaj harmonion en la vivo.

Kaj la Dia Vero, kiu donas la perfektan liberecon.

Kaj kiam oni parolas pri la tri personoj de Dio, ni subkomprenas:

La unua persono de Dio estas la Amo, manifestita en la Vivo.

La dua persono de Dio estas la Saĝeco, manifestita en la lumo de la Scienco.

La tria persono de Dio estas la Vero, manifestita en la Libereco.

Pro tio, ankaŭ la punktoj de kontakto de la homa spirito kun la Dia Spirito estas tri: la unua estas la Amo, la dua estas la Saĝeco, la tria estas la Vero.

De la unua kontakto de la homo kun Dio ĉe li komencas ŝpuci la amo; li transformas sin en fonton de vivo, kiu konstante ŝprucas. Kaj, ĉar tiu fonto devas trovi sian vojon de movado, aperas la dua ektuŝo de Dio — la Saĝeco — por desegni la vojon de tiu ĉi movado.

Kaj tial la unua aspiro de la homa spirito estas la vivo.

La dua aspiro de la homa spirito estas la Scienco.

La tria aspiro de la homa spirito estas la Libereco.

Kiam la spirito akiras sciencon, la lumo manifestas sin kiel rezultato.

Kaj parolante pri la Dia Saĝeco, ni subkomprenas la tutan Lumon de la senlima spaco, kiu Lumo neniam estingiĝas.

La lumo estas vesto de la Saĝeco. Kaj la fizika lumo, kiun ni uzas, estas rezulto de la superflua energio, kiun la kosma Homo uzas por sia intelekta laboro.

La kosma Homo akiris tiom da scienco, ke li havas superabundan lumon.

La Saĝeco — tio estas la mondo de la eternaj diaj formoj teksitaj de la Amo. La Amo estas la esenco mem, kaj la Saĝeco prezentas la formojn de la harmonio, kiuj manifestas sin en muziko kaj poezio.

Kaj la plej reala, al kiu la homo devas celi en sia nuna vivo, estas la kono de la formoj de la Dia Saĝeco.

La Saĝeco estas mondo, en kiu estas kaŝataj de pratempoj ĉiuj aferoj kreitaj de Dio, ĉiuj aferoj kreitaj de la altaj spiritoj kaj ĉiuj aferoj kreitaj de la homoj sur la tero.

Tial tiu ĉi mondo estas alirebla ankaŭ por ni.

De tiu ĉi mondo venas la vera, efektiva scienco.

Kaj kiam tiu ĉi scienco pasas tra la tri mondoj — dia, spirita kaj fizika — kaj donas fruktojn, tiam ĝi fariĝas reala por ni.

Kiam la Saĝeco ekbrilas en la homa animo, ĉiu afero en la intelekto de la homo trovas sian lokon. Ĉiuj ideoj fariĝas klaraj, difinitaj kaj estas en plena harmonio.

La intelekto de la homo malfermiĝas, kaj li vidas, ke tiu ĉi alta dia mondo estas bela, ke en ĝi regas harmonio kaj ordo, kaj ke, kiam Saĝeco regas, la ordo ne difektiĝas. Kaj antaŭ lia spirito malfermas sin senlima kampo por laborado. Kaj tiam li komencas konstrui.

Ĉar estas prave: nur la dia Saĝeco satigas la spiriton de la homo.

Sed la vojo de la Saĝeco estas la plej malfacila. Ĝi estas vojo nur por la Majstroj. Nur perfekta homo, nur Majstro povas aperigi Saĝecon.

La luiro de la homo en la regnon de Dio, dependas de liaj scienco kaj saĝeco, sed ne de lia amo.

En la regnon de Dio oni ne eniras pro graco.

Eniri en la regnon de Dio kaj ricevi tie honoran lokon — tio dependas de nia saĝeco.

La Saĝeco estas la plej alta bono en la ĉielo. Ĝi estas la plej granda, longedaŭra trezoro, pri kiu la homa spirito povas disponi.

Se oni estas saĝa, oni posedas la plej altan dian bonon.

Kiam homo havas saĝecon, li estas inteligenta, forta kaj lia lumo ĉiam brilas.

Homo sen saĝeco ne estas homo, kaj kiam ni parolas pri Homo, ni subkomprenas la Saĝecon.

La homo estas nomata Filo de la Saĝeco.

Estas dirite en la Skribo:

„Kaj mi ĝojis en la lando loĝata kaj mia plezuro estis kun la homidoj."

Tio estas la prudentaj filoj, en kiuj ekloĝis la Saĝeco.

Per la saĝeco Dio kreis la universon. Li ĝin kreis por la filoj de la saĝeco.

Dio loĝas en ili. Ili komprenas Lian saĝecon kaj gloras Lin. Ĉar oni rekonas la gloron de Dio nur per la leĝo de la Saĝeco.

Tial nur saĝulo povas glori.

Saĝa homo provis kaj kontrolis ĉion, kion li scias.

Ĉe saĝa homo ekzistas nevenkebla tendenco al la Amo.

Ĉe li ekzistas deziro ekami la plej malgrandan estaĵon, kiun li vidas, kaj fari al ĝi ian komplezon.

Ĉe sia tuta saĝeco, saĝulo egale estimas la grandajn kaj la malgrandajn aferojn.

Saĝulo vivas sen leĝo.

Malsaĝulo devas vivi kun leĝo kaj sub leĝo.

Se saĝulo vivas laŭ leĝo, li estas malfeliĉa.

Se malsaĝulo vivas sen leĝo, li ankaŭ estas malfeliĉa.

Saĝulo vivas laŭ tiu viva leĝo, kiun Dio skribis en lia animo.

Li trovas sin ekstere de la kondiĉoj de la provizora vivo.

Vi, kiu aspiras al la Lumo, aŭskultu la vortojn de la Saĝeco.

Se vi volas posedi la Dian Saĝecon kaj la misterojn de la Naturo, mi diras al vi, ne ekzistas alia vojo krom la sufero.

Ĝis kiam vi kondamnas, ĝis kiam vi riproĉas, vi restas malproksime de la Saĝeco.

Kiam vi ĉesas kondamni, vi estas proksime al la Saĝeco.

Ĝis kiam vi filozofias, vi restas malproksime de la saĝeco, de via Majstro. Se vi ĉesas filozofii, vi estas proksime al la saĝeco, vi estas ĉe la piedoj de via Majstro.

Kiam vi perdas la sencon de la vivo, serĉu tion, kio lumas.

Instruiĝu ĉe tiu, kiu donas Lumon.

Memoru: Virto loĝas nur ĉe tio, kio neniam mallumiĝas.

Estu amiko de tio, kio ne mallumiĝas.

Aspiru al la lumo kaj ne forgesu:

Scienco de unu loko ne venas, kaj lumo tra unu fenestro ne eniras. Neprikalkuleblaj estas la vojoj de la scienco. Neprikalkuleblaj estas la fenestroj de la lumo.

Metu la saĝecon en vian intelekton; la lumo venos kaj la scienco donos al vi sian helpon.

Nur la hela vojo de la Saĝeco kondukas al la Vero.

# Justeco

„Tiam la justuloj eklumos en la regno de sia patro".

Nek „sur la tero", nek „supre en la ĉielo", sed „en la regno de sia patro".

Tiu ĉi regno ne estas la regno de la naturo. La regno de la naturo estas eduka instituto por malgrandaj infanoj.

Kaj tiuj ĉi justuloj ne estas la ordinaraj justuloj sur la tero, nek la Justeco, pri kiu mi parolas al vi, estas la ordinara justeco.

Mi parolas al vi pri tiu Justeco, en kiu estas Lumo

„Tiam la justuloj eklumos en la regno de sia patro".

Se vi radias la lumon de tiu ĉi regno, vi estas justa; se vi ne radias lumon, nenia justeco ekzistas en vi.

Inter la ordinaraj „justuloj" sur la tero, kiuj estas sen lumo, ĉiu povas ŝajnigi sin justulo.

„Kaj la justuloj eklumos en la regno de sia patro."

Multaj eble diros: „Kio tuŝas nin, ke la justuloj eklumos en la regno"?

Ĝi estas tre grava.

Sen lumo povas ekzisti nenia progreso kaj disvolviĝo.

Antaŭ miriadoj da jaroj tiuj ĉi estaĵoj — la Justuloj — eniris en la regnon de sia patro kaj akiris tiun ĉi lumon.

Danke al ĝi la mondo nun vidas.

La lumo, en kiu ni vivas, estas la lumo de la justuloj. Ĝi estas rezulto de ilia justeco.

Kiaj estas la justuloj, kiuj eklumis?

La helaj anĝeloj, servantoj de Dio.

Kaj se ili ĉesus lumi kaj vivi en justeco, venos la fino al ni sur la tero.

Kaj se vi demandas min, kial Justeco estas necesa, mi respondos al vi.

„Por ke la venontaj generacioj povu vivi en via lumo."

La lumo, kiu devenas de la justeco, estas la esenco de tiu lumo, kiu donas vivon kaj kiu portas en si mem la vivon.

La amo malkovras sin nur al tiuj, kiuj estas justaj kaj „eklumis en la regno de sia patro" — tiu ĉi alta dia mondo, kie la justuloj komprenas la profundan sencon de la aferoj.

La Justeco, ĝi estas kvalito de la homa animo.

Ĉiu animo naskiĝis por esti justa. Kaj en la komenco ĝi estis justa.

Akiru tiun ĉi kvaliton, tiun ĉi heredaĵon donitan al vi — esti justaj.

Ĉiu animo devas esti justa. Kial? Por ke elvenu de ĝi la granda lumo. Kaj en la lumo, elvenanta el justeco, la amo malkovros sin al ĝi. La justeco, ĝi estas la fundo, sur kiu la lumo aperas kaj lumigas la homan animon. Ĉiuj animoj povas esti justaj kaj eligi lumon.

Animoj, kiuj ne volas lumi, estas animoj, kiuj militas kontraŭ Dio.

Ne militu kontraŭ Dio!

Eniru en la lumon de la justeco kaj konsciu, ke vi ne vivas kiel decas.

Ne militu kontraŭ la majesta patro de la amo, kiu unuigas en sia harmonio la tutan universon kaj ĉiujn ekzistaĵojn.

Sanktigu Lian nomon, ĉar Li estas tiu, kiu oferis sin sennombrajn fojojn pro ĉiuj ekzistaĵoj.

Se vi aŭdos lian voĉon ankaŭ en vi aperos la deziro oferi vin mem pro Li.

En vi aperos la deziro doni ĉion sen la plej malgranda domaĝo. Vi diros: „Mi donis tro malmulte, mi volas vivi ankoraŭ milionojn da jaroj por doni."

La Absoluta Dia Amo postulas absolutan Justecon. Tie, kie ne estas justeco, ne estas amo. La fizika aspekto de la amo estas la Justeco. Por ke la lumo malkovru sin en la fizika mondo, nepre devas ekzisti justeco.

Se ne estas justeco, ĉiuj dolĉaj vortoj estas vanaj.

La homoj bezonas la absolutan Dian Justecon, tiun justecon, kiu aplikiĝos egale al ĉiuj homoj, sen ia escepto, kaj kiu zorgas ne nur pri la homoj, sed ankaŭ pri ĉiuj vivaj ekzistaĵoj de la plej granda ĝis la plej malgranda.

Konforme al la alta Justeco, la leĝo devas esti egala por ĉiuj—rilate al besto kaj rilate al homo, rilate al simplulo kaj rilate al instruitulo, rilate al ordinara regnano kaj rilate al reĝo.

Kiam ni venas al tiu ĉi sankta leĝo, ni ĉiuj devas havi sanktan treman senton antaŭ ĝi.

Ĉar, kiel kiam simplulo pekas, tiel ankaŭ kiam reĝo pekas, ĝi estas egala peko antaŭ la leĝo de la Justeco.

La Justeco — tio estas rilatoj de animoj. Se ĝi venos, manifestos sin tiu efektiva estimo, kiun devas havi la homoj inter si. Tiam ni rigardos neniun kun malestimo kaj ni estos sanktaj unu por la alia.

Pro tio, por atingi perfektecon, starigu la Jus-

tecon kiel unuan ŝtupon de via vivo, per kiu manifestas sin la amo al ĉiuj ekzistaĵoj: homoj, bestoj, vegetaĵoj.

Se vi akiros tion, kien ajn vi enrigardos, vi vidados nur bonon.

Se vi vidas la bonon, ĝi estigos en via animo sanktan treman senton.

La Justeco estas afero interna. Ĝi estas interna proceso en la homa animo. Esti justa signifas scii kiamaniere agi ĉe ĉiu sia penso, ĉe ĉiu sia sento, ĉe ĉiu sia faro.

Esti justa signifas scii kiamaniere konduti kiel inteligenta ekzistaĵo, kiel prudenta, efektive kulturita homo.

Se vi volas havi ĝustajn rilatojn kun ĉiuj ekzistaĵoj, estu justa rilate al ili.

La Justeco estas alta dia proceso por distribuado de ĉiuj diaj bonoj en ĉiujn partojn de la organismo, ĉu ĝi estas organismo de individuo, de societo, de popolo aŭ de la tuta homaro.

Ĝi estas la sangocirkulado, kiu portas la sangon ĉien, por ke ĉiu ĉelo povu ricevi kion ĝi bezonas por la plenumo de sia funkcio.

Tiel, danke al la Justeco, al tiu ĉi granda sangocirkulado, la plej malgranda ĉeleto kaj la plej malgranda ekzistaĵo en la mondo ricevas sian nutraĵon.

La Justecon oni povas kompari al la akvo. Kio estas la akvo rilate al la malmola grundo, tio estas ankaŭ la Justeco rilate al la homa vivo, ĉar ĝi estas, kiu malmoligas la solidajn substancojn.

Homoj, kiuj estas malicaj, malmoliĝis, ĉar ili ne havas justecon. Kaj tiuj, kiuj estas molaj, havas justecon.

Donu al la homo justecon kaj li fariĝos mola. Same efikas la akvo al la kreskaĵoj.

Ni devas doni justecon al ĉiuj homoj, ĉar kiel la akvo estas necesa por la kreskado de la vegetaĵoj, tiel ankaŭ la justeco estas necesa por la kreskado de niaj intelektoj, animoj kaj koroj.

Sen ĝi kreskado ne povas ekzisti.

Kiu volas disvolviĝi regule, nepre devas fari justecon.

Kaj kiam vi devas fari justecon, faru ĝin eĉ se la tero renversiĝus.

Malkuraĝuloj ne povas esti justaj: la justa homo havas absolutan kuraĝon.

Por ke estu paco en iu regno, devas esti justeco. Se estas en ĝi maljusteco, ekregos anarĥio.

Malfermu la paĝojn de la historio en la pasinteco, rigardu la estantecon kaj vi konstatos, ke la maljusteco estis ĉiam la kaŭzo de la anarĥio. Ĉie regas la sama leĝo: kie estas maljusteco, tuj aperas anarĥio.

La Justeco difinas la rilatojn inter la homoj: ĝi distribuas la diajn bonojn, la sangon de la vivo, en la tuthomara organismo.

La justeco devas esti farata tiamaniere, ke ne devas esti mizera homo, kiu sopirus kaj krius: „Ĉu ekzistas Dio en tiu ĉi mondo!"

Tial, kiam vera justulo preĝas sur la tero, li devus peti Dion montri al li ian suferantan animon, por helpi al ĝi.

La Dia Justeco toleras neniajn honorojn kaj gloron, nenian riĉecon kaj sciencon pro la profito.

Ĝis kiam la homo serĉas la aferojn ekster si mem, li estos en la vanta mondo, kaj ĉiu povas forrabi al li la trezorojn, kiujn li havas. Se tiuj ĉi trezoroj eniras en lian koron, li jam trovis sian amaton.

Ĝi estas la Dia Justeco, kiu donas stabilecon al la homo.

La veraj justuloj disdonas de la pleneco de la koro, de la abundeco de tiuj bonoj.

Ili estas riĉaj.

Ili venas al la tero por fari ian specialan laboron kaj por akiri spertecon.

Ili venis de alia sistemo kaj disponas pri la tuta tero. Ili povas vivi tie ĉi kiom ili volas. Kiam ili finos sian laboron, ili foriros tien, de kie ili venis.

La justaj homoj estas riĉaj. Ili estas filoj de Dio. Kaj ĉiu homo, kiu estas filo de Dio, disponas pri la kapitalo de la tuta suna sistemo.

La Dia Justeco, kies protagonistoj ili estas, kaj kiu nun venas, varmigos la homajn korojn. Kaj en la estonteco, en la nova kulturo, en la kulturo de la Lumantoj, la mondo estos hejtata kaj lumigata de la homaj koroj, en kiuj loĝas la Justeco.

De tiu ĉi estonteco nun Kristo sendas sciigojn — Kristo de la amo, manifestita en la Justeco, kiu lumas en tiuj, kiuj Lin amas.

# Dio

Ekzistas Unu, kiu manifestas sin kiel Amo, kiel Saĝeco kaj kiel Vero.

Ekzistas Unu.

Kaj la tuta viva Naturo parolas pri tiu Unu, la majesta.

Oni nomas Lin Dio, Eternulo, Patro.

Li plenigas ĉion, plenigas la tutan ekzistadon, ĉiujn sunsistemojn kaj tamen restas nemanifestita. Ankaŭ en la tuta eterneco Li ne povas plene manifesti sin. En ĝi ne ekzistas ĉiuj formoj, per kiuj Li povas perfekte manifesti sin.

Per si mem la Absoluta, la Neatingebla, la Plejalta ne havas formon. Li estas senlima, senfina. Li estas „Nenio". Kaj tiu ĉi „Nenio" entenas ĉion en si. Li limigas sin kaj ne estas limigita, malgrandigas sin kaj ne estas malgrandigita.

Li kreas, kaj neniam konsumiĝas.

Li manifestas sin en ĉio, sed Li mem neniam estas en la manifestitaĵo.

Li subtenas ĉion, kiel interne, tiel ankaŭ ekstere, sed Li mem partoprenas en nenio.

Ni komparas Lin al la Lumo, al la Racio — „Logos". Sed per si mem Li estas nek Lumo, nek Racio.

Lumo, Racio — tio estas liaj manifestiĝoj.

Dio ne ĉeestas, en materia maniero, en la mondo.

Kaj efektive, kiam pentristo pentris bildon, ĉu

li estas en la bildo? Kiam skulptisto skulptis statuon, ĉu li estas en la statuo?

Kaj kiam la granda Nekonato malkovras sin al ni, Li malkovras sin al ni kiel Lumo sen ombroj, Vivo sen interrompo, Amo sen ŝanĝoj, Scienco sen eraroj, Libereco sen limigoj.

Kaj kiam ni diras, ke Dio estas Amo, ni subkomprenas tiun manifestiĝon de Dio, per kiu ni povas plej intime ekkoni Lin.

La Amo estas la unua manifestiĝo de Dio. Tial, kie estas Amo, kie estas la bono, kiu estas ĝia frukto, tie Dio manifestas sin.

Kaj kiam ni parolas pri Dio kiel Amo, ni subkomprenas tiun estaĵon, de kiu devenis la tuta vivo en la universo, kaj kiu ligas ĉiujn vivajn animojn en unu tuton, kiu nek varias nek ŝanĝiĝas.

La animoj prezentas la diversajn statojn, en kiuj la amo, la dia konscio, manifestas sin en tempo kaj spaco. Ĉio en la mondo povas malaperi, sed la dia konscio — neniam.

Ĉiuj animoj kune formas la dian konscion.

Kaj la senco de la vivo kuŝas en la unuiĝo de la animoj kun Dio, en ilia unueco kun la dia konscio. De tiu ĉi unuiĝo devenas la Amo, kiu estigas la vivon.

En la perfekta senco de la vorto, ekzistas nur unu absolute bona estaĵo en la mondo — ĝi estas Dio. Li estas ĉiam bona. En tiu ĉi stato de boneco, ĉe Dio ne ekzistas eĉ la plej malgranda intenco fari malbonon al iu. Eĉ kiam Dio pasas preter la plej malgranda insekto, Li ridetas al ĝi kaj donas al ĝi ĉiujn kondiĉojn por vivo kaj disvolviĝo.

Dio juĝas neniun. Li malliberigas neniun ĉe si, neniun limigas — kaj Li ne havas kaŭzon por juĝi.

La beleco de Dio konsistas en tio, ke Li memoras nur la bonon, kiun ni faris. La malbonon li ne memoras.

Dio lasas ĉiujn ekzistaĵojn absolute liberaj. Li neniam ĝis nun diris al iu ekzistaĵo en la universo, kiel ajn malgranda ĝi estus, „Faru tion!", aŭ „Servu al mi!" Li montras al ĝi la vojon kaj lasas ĉiun ekzistaĵon libera fari mem sian elekton — fari tion, kion ĝi opinias bona.

Kaj efektive, kion profitus Dio, se ni sekvus Lin, se ni servus Lin? Ĉu ĝi estus utila al Li? Ĉu ni povas doni al Li sciencon? Ne, Li ĉion scias. Ĉu ni povas doni al Li forton? Ne, Li estas plejforta. Ĉio povas forpasi, ĉio povas ekskuiĝi, sed Li neniam ŝanceliĝos.

La sola afero, per kiu ni altiras Dion, ĝi estas nia malforteco, nia mizero. Kiam Li rigardas nin tiel malgrandaj, tiel suferantaj kaj malkleraj, ĉe Li, en lia majesteco, aperas tendenco, deziro mallevi sian manon kaj diri al ni: „Nun, supren"!

La tendenco de Dio estas liberigi nin, purigi nin, lumigi niajn intelektojn, nobligi niajn korojn, meti en niajn animojn tiun flamon, per kiu ni ekkonos, ke Li estas Amo.

Io majesta estas en la koro de Dio.

Li levas popolojn, societojn, familiojn, apartajn homojn. Ĉiujn bonojn ni ŝuldas al Li — sciencon, saĝecon, veron, liberecon. Ĉiujn grandajn homojn Li edukis. Kaj ili prezentas impulson de la Dia Spirito. Per ili Dio volas enporti amon, saĝecon kaj veron en la mondon.

Kaj en la Diaj Amo, Saĝeco kaj Vero konsistas la tuta vivo dum la tuta eterneco, kiel ankaŭ la bono de

ĉiuj animoj. Kiam Amo, Saĝeco kaj Vero vekiĝos, la spirito de Dio ĉeestas inter la homoj kaj ni havas efektivan realecon de la aferoj.

Kaj la homo devas scii, ke ekzistas nur unu Dio kaj unu Amo, unu Saĝeco kaj unu Scienco, unu Vero kaj unu Libereco, unu Justeco kaj unu absoluta ekvilibro, unu Virto kaj unu fonto de bonoj por ĉiuj.

Ekster tiuj ĉi mezurunuoj ekzistas nenia alia mezurilo por la granda realeco. Kaj reala estas nur tio, kio apartenas al la sola, viva Dio.

Multaj, tamen, demandas: „Ĉu ekzistas Dio, kaj, se Li ekzistas, kie Li loĝas?"

La tuta universo prezentas la „urbon de Dio", kie loĝas Dio. Lia konscio kaj Lia intelekto estas tiel grandaj, ke ĝi ampleksas ankaŭ la plej malgrandajn ekzistaĵojn kaj aranĝas ilian vivon.

Ĉiuj anĝeloj, ĉiuj altaj estaĵoj, kiuj vivis milionojn da jaroj antaŭ ni sur la tero, scias kio estas Dio. Ili stariĝas kun sankta trema sento antaŭ tiu ĉi majesta Estaĵo, de kies koro venas la sankta Amo, kiu levas kaj subtenas la tutan kosmon.

Kaj se vi demandos ilin, kie kaj kio estas Dio, li respondos al vi en via lingvo: „Ekzistas nenia ekzistaĵo, pli proksima al vi, ol Dio .Ekzistas nenia ekzistaĵo, kiu havus pli viglan saĝon, pli delikatan koron, pli potencan volon, por kiu ekzistas nenio malebla. Neniu ekzistaĵo estas pli nobla, pli sankta, pli pura, pli saĝa, pli forta, pli potenca ol Dio. Li estas ĉie. En la ĉielo — en ĉiuj sunoj, ankaŭ sur la tero, malantaŭ ĉio: malantaŭ la aero, malantaŭ la akvo, malantaŭ la bestoj, malantaŭ la homoj. Ekzistas nenio en la mondo, malantaŭ kio ne estus Dio.

Ĉio, kio estas en ni kaj ekster ni, ĉio kio nin ĉirkaŭas, prezentas fonon, malantaŭ kiu sin kaŝas Dio kiel granda pentristo. Li estas kaŝita profunde, ĉar Li volas lasi nin liberaj.

Kaj ĉar Dio estas tiel profunde kaŝita, tial la homoj konstante serĉas Lin ekstere kaj volas per ekstera vojo veni al Li.

Dio, tamen, ne estas afero pruvebla.

Voli pruvi la ekzistadon de Dio signifus aserti, ke Dio ne ekzistas. Ĉiu pruvo pri la ekzistado de Dio, estas meĥanika proceso:

Se homo postulas pruvojn pri la ekzistado de Dio, li rompis — en sia konscio — sian ligon kun Li.

Kiam restariĝas tiu ĉi ligo, la vivo komencas flui seninterrompe de Dio al la homo kaj de la homo al Dio. Tiam en la intelekto, en la koro, kaj en la volo de la homo estas konstanta alfluo de dia konscio.

Kaj tiam ĉesiĝas tiuj ĉi vanaj kaj sensencaj demandoj, ĉu ekzistas Dio, ĉu ne ekzistas Dio, ĉu Dio amas nin, aŭ ĉu Li forgesis nin.

Ĉar la amo al Dio, de kiu devenas tiu ĉi viva ligo inter homo kaj Dio — ĝi estas mistika interna sperto, kiu sin manifestas en plej diversaj formoj kaj gradoj. La magia forto de tiu ĉi sperto kaŝas sin en tiu ĉi momento, kiam oni direktas sian intelekton, sian koron, sian animon kaj sian spiriton al tiu ĉi eterna principo, sen ia ajn hezito, sen ia ajn dubo. Se venas tiu ĉi momento, oni povas ĉion atingi. Nur tiam oni povas kompreni la sencon de la vivo. Ĉar, nur Dio povas malkovri al ni tiun ĉi sencon.

Kaj tiam oni komprenos, ke oni naskiĝis por ami Dion kaj sigeli sian vivon per tiu ĉi amo, kaj ne por esti servanto de la homaj konceptoj.

Tion parolas al ni ankaŭ nia animo. Ĉar — tion ne forgesu! — la amanto de la homa animo estas nur Dio.

Jen kial mi nomas homo nur tiun, kiu ekamis Dion. La momento, en kiu li sin difinis kaj ekamis Dion, lin difinas kiel homon. Tia homo altiras la atenton de ĉiuj bonaj kaj inteligentaj homoj, kaj ili diras: „Hodiaŭ fariĝis io dia".

Ekami Dion, tio estas la plej glorinda momento en la vivo de homo. Ĝi signifas flori kaj porti malproksimen sian bonodoron. Ĝi signifas ŝpruci konstante kiel fonto, kiu scias doni. En tiu ĉi stato ĉiuj prudentaj deziroj de la homo estas plenumeblaj.

Nur tiam oni fariĝas efektive libera. Oni havas tiun liberecon, kiun donas la vero. Kaj sub vero ni komprenas en tiu ĉi okazo tiun ligon, kiun Dio kreis inter si kaj ni.

Ekster tio ekzistas nenia libereco. La nuntempaj homoj, kiuj perdis sian ligon kun Dio, imagas, ke ili povas fari kion ili volas. Ili eĉ opinias, ke ili rajtas kritiki ankaŭ Dion.

Kaj prave oni povas diri, ke ne ekzistas alia ekzistaĵo, kiu akceptis pli grandajn insultojn, ol Dio. Sed Li — dirite en la homa lingvo — eĉ siajn brovojn ne sulkigis. Li rigardas serena kaj trankvila en la aŭreolo de sia senŝanĝa boneco.

Sed nur tiu, kiu vivas en tiu esenca, senŝanĝa mondo, kie vivas Dio, kiu servas al Dio kaj komprenas liajn ordonojn kaj leĝojn, nur tiu estas libera kaj havas „liberan volon".

Kaj nun, memoru tiujn ĉi simplajn verojn, kiel certajn kriteriojn.

La sola ekzistaĵo, kiu nin amas estas Dio. Kiel kiam ni suferas, tiel ankaŭ kiam ni ĝojas, Li estas

la sama. Kiel en s u f e r o j, tiel ankaŭ en ĝojoj, Dio estas, kiu parolas al ni.

Alion ne forgesu. Por ke vi povu demandi kio estas Dio, vi devas esti lernintaj, ne en la daŭro de unu, sed en la daŭro de multaj eternecoj. Kaj post kiam vi finis ĉiujn viajn studojn en la ĉielo kaj sur la tero, nur tiam vi havos la rajton starigi tiun ĉi demandon. Kaj ĉu vi scias, kio estos respondita al vi? Simple kaj klare: „Dio estas amo, kiun vi devas provi interne en vi".

Sed antaŭ tio, dum vi ankoraŭ serĉas pruvojn pri la granda realeco, memoru tiujn ĉi simplajn verojn:

Se vi demandas, kie estas Dio, sciu: Kie estas vivo, kie estas penso, kie estas sento, tie estas Dio.

Se vi dubas pri Dio, sciu, ke vi dubas pri vi mem. Ĉar, ĉe Dio ŝanĝoj kaj varioj ne ekzistas, returnitaj procesoj ne estas. En la amo de Dio ekzistas absolute neniaj esceptoj.

Tial, kien ajn vi irus, en kia ajn stato vi troviĝus, vi povas dubi pri ĉio, sed pri Dio — neniam! Sciu, ke Li estas ĉie, kaj, se vi vokos Lin — Li helpos al vi.

Se vi aŭdas homojn diri, ke ili ne kredas en Dio, rigardu, kaj vi vidos, ke ili mem opinias sin dioj. Ne adorkliniĝu antaŭ similaj dioj.

Alion memoru: Kie estas senco, tie estas Dio. Kie ne estas senco, tie Dio forestas. Kaj kie Dio forestas, tie estas „la infero".

Vi demandas, kiam homo estas bona? En la momento, en kiu Dio manifestas sin, la homo estas bona. En la momentoj, en kiuj Dio ne manifestas sin, li estas malbona.

Se Dio venas al homo, li estas ĝoja kaj gaja,

preta al ĉiuj komplezoj. Se li rifuzas servi al Dio, Li forlasas lin.

Kaj elprovu vian amon per la sola certa rimedo: Kio estas pli forta ol vi, viaj deziroj aŭ via amo al Dio? Se via amo estas pli forta, vi estas sur la ĝusta vojo. Se tamen via amo al Dio estas pli malforta ol viaj deziroj, tiam la suferoj kaj la konfliktoj en via vivo ne ĉesiĝos.

Se oni havas la Dian Amon en si mem, kio ajn okazos al vi, ĉio transformiĝos en bonon. Se oni ne havas tiun ĉi amon, tiam la vojo estas longa kaj malfacila, kaj la deziroj — nerealigeblaj.

La vojo al Dio sin trovas en la perfekteco. La perfekta homo havas nur unu ideon — al Dio! Sen perfekteco Dio restas nekomprenebla por ni. Se homo celas al perfekteco, li ekkonos Dion kiel amon.

Kaj tiam li sentos la pulson de ĉiuj vivaj ekzistaĵoj. Kaj ne ekzistas pli granda feliĉeco ol senti tiun ĉi pulson.

Tiam oni komprenos la altan sencon de tiuj ĉi altaj vortoj, kiujn diris Kristo: „Mi vivas en Dio, kaj Dio vivas en mi".

„Mi vivas en Dio", ĝi signifas, ke Dio estas „ekstere". Dio vivas en mi", ĝi signifas, ke Dio estas „interne" kaj mi — „ekstere".

Tial, kiam Dio estas interne de vi, ne limigu Lin. Donu al Li absolutan liberecon interne de vi, por ke ankaŭ Li donu al vi absolutan liberecon en si.

„La diablo" — ĝi estas ekzistaĵo, kiu limigis Dion en si mem, tial Dio limigis lin de ekstere.

Donu absolutan liberecon al Dio en vi mem. Kaj tiam antaŭ vi malkovros sin nova mondo.

# La homo

**„Tiam Kristo eliris kun la krono de dornoj kaj kun la purpura vesto, kaj Pilato diris al ili: „Jen la homo"!**

Ĉu oni povas, kiam vi eliras en la mondon, diri ankaŭ pri vi: „Jen la homo!"

Por ke oni meritu tiun ĉi nomon, oni devas havi en si kvar aferojn: oni devas esti riĉa, oni devas esti forta, oni devas esti saĝa, oni devas esti bona.

Riĉa estas nur homo, kiu havas riĉan animon, riĉan intelekton, riĉan koron kaj fortan volon. Nur homo, kiu servas Dion, estas riĉa, en la perfekta senco de la vorto.

Forta estas nur la homo de la amo, la homo de la vero. Fortulo staras super ĉiuj kondiĉoj. Mi ne nomas forta homo tiun , kiu mortigas la aliajn. Forta homo estas tiu, kiu povas transformi siajn malamikojn en amikojn. Jen pro kio li ne defendas sin. Li ne militas pri siaj rajtoj. Nur malfortulo militas pri siaj rajtoj. Kaj kiam la forta homo, la homo — heroo, estas ligita pro la vero al la kolono de la malhonoro, li kun grandanimeco elportas malhonoron kaj insultojn, malicon kaj akuzojn.

Jen la homo! Jen estas Jesuo!

En la originala lingvo, en kiu tiu ĉi vorto estas dirita, ĝi signifas: la homo, kiu venas al la tero, frato de la suferantoj. Tial, en la larĝa senco de la vorto, ĉiu, kiu suferas kaj portas kiel heroo siajn suferojn,

estas Jesuo. Ĉiu suferanta homa animo, kiu ellaboras sian savon, estas Jesuo.

„Jesuo“ — ĝi estas la punkto de apogo de la homo. „Kristo“ — tio estas la homo, kiu venkis kaj triumfis super la morto, kiu releviĝis, kiu servas al Dio kaj estas preta oferi sian animon por la aliaj — tio estas la alia punkto de apogo por la homo.

La homo — kiel Jesuo — komprenas la profundan signifon de la suferoj — tiu dia proceso, per kiu li ellaboras sian karakteron.

Ĉar, la plej valora en la homo — ĝi estas lia karaktero. Oni devas nepre pasi tra la fajro de la elprovoj, kaj nur post kiam oni pasis tra tiu ĉi fajro kaj rezistis al ĉiuj elprovoj, nur tiam oni akiros karakteron valoran, firman, neŝanceleblan. Nur tiam oni havas eternan domon, en kiu oni povas loĝi.

Sub karaktero, en la profunda senco de la vorto, oni komprenas ĉion prudentan, kion skribis la homa spirito kaj kion ĝi enmetis profunde en la homan animon.

Karaktero estas kompleto da virtoj.

Memoru la jenan aferon: tiu natura forto interne en la homo, kiu povas fari lin forta, ĝi estas la forto de liaj virtoj. Virtoj — tio estas granda kapitalo, ĉirkaŭ kiu komencas cirkuli la grandaj fortoj en la viva naturo.

Jen kial sub la vorto „homo“ oni komprenas aron da ĉiuj virtoj.

Kiu ne prezentas tian aron da virtoj, ne povas nomi sin vera homo.

La nuna homo ankoraŭ ne venis al la stato de vera homo. En li la besta esenco havas pli malpli grandan superecon. La vera homo manifestos sin de nun en la estonteco.

La nuna homo ankoraŭ ne povas regi sin. Ĉe li estas ankoraŭ multaj bestaj trajtoj. Ĉiuj krimoj, kiujn faras nun la homo, venas de la besta principo en li. Kaj li devas tre multe streĉi siajn fortojn por liberigi sin de la besteco, por venki ĝin.

La homo tamen estas kombinaĵo de virtoj kaj ne de krimoj.

La homo, per si mem, per sia deveno, per sia naturo, estas io alta. Dio, limigante sin en si mem, kreis la homon. Sed kune kun la kreo de la homo aperis ankaŭ la suferoj en la kosmo, ĉar kie estas limigo, tie estas ankaŭ suferoj.

Alta afero estas la homo!

Se vi komprenas la homon se vi kredas en li kaj ne en tio, kio estas vidata de ekstere, kio manifestas sin ekstere, vi konstatos kiel granda estas la homo. Ĉar tio, kio estas vidata de ekstere, estas nur figuro de certaj pensoj, sentoj kaj agoj. La homo ne estas tio, kion oni hodiaŭ pensas pri li. Li ne estas nur materia estaĵo, kiu malaperas post la morto. Tio, kio mortas, ne estas la homo. Kun ĝi mortas nur la malbonaj pensoj, sentoj kaj agoj.

Se la homo malaperas kun la morto, tiam oni ne bezonas tiom filozofii pri li. En tia okazo li estas nur objekto, aŭtomato, kiu morgaŭ disfendiĝos en polvon. Ke la homo mortos kaj malaperos, ĝi estas la unua eraro, enportita en la mondon.

Ekzistas io, kio ne mortas, en tiu ĉi kaj en la alia mondoj.

Tio, kio ne mortas, kio ne putras, kio ne malaperas, ĝi estas la homo. Ĝi nek maljuniĝas, nek rejuniĝas.

Kiam ni parolas pri homo, ni komprenas la

animon. Se estas io dia en la homo, ĝi estas la luma animo, kiu pensas.

Disigu de la homo la inteligentan, luman animon kaj li fariĝas efektiva besto — per nenio distingiĝas de ĝi: manĝas, dormas, havas ĉiuj bezonojn kaj malfortaĵojn de la besto.

Homo estas viva animo, kiu havas ĉiujn eblojn de la eterna senmorta vivo. Tiu ĉi animo posedas en si mem ĉiujn metodojn — ili estas metitaj en ĝia cerbo, en ĝia korpo, per kiu ĝi manifestas sin.

Jen kial ni diras: la homo enhavas en si ĉiujn eblojn por prudenta vivo. La homo enhavas en si ĉiujn eblojn por ama vivo. La homo enhavas en si ĉiujn eblojn por vivo en la Vero.

Kaj kiam oni komencas efektivigi ĉiujn tiujn eblojn, oni iom post iom transformiĝas, oni iom post iom transiras de unu stato al alia. Iom post iom oni supreniras ŝtupon post ŝtupo; de ordinara homo oni fariĝas talentulo, poste oni fariĝas genia, post tio — sanktulo, kaj finfine — majstro.

Ekzistas gradoj de homo. Sub „homo" ni ne komprenas nur tiun ekzistaĵon, kiu loĝas sur la tero.

Homo ekzistas ne nur sur la tero, ne nur en la suna sistemo. Li loĝas en la tuta universo da steloj, sur ĉiuj sunoj kaj planedoj. Sunoj kaj planedoj estas loĝataj de estaĵoj de diversaj gradoj de inteligenteco. Ne estas grave kiajn korpojn ili havas. Ili estas inteligentaj ekzistaĵoj kaj apartenas al la sama homa raso. Tiu ĉi raso grade disvolviĝas. Multaj el la homaj estaĵoj sur la aliaj sunsistemoj estas multe pli progresintaj ol la homo, ĉar ili eliris pli frue el la granda origina fonto de la vivo. Ilia saĝeco estas tiom granda, ke la kulturo de la homoj, kompare al

tiu de Siriuso, ekzemple, sin trovas ankoraŭ en la infanaj vindoj. La nunaj homoj, en komparo al la estaĵoj de Siriuso, ankoraŭ ne estas eĉ infanoj.

Sed la homo estas eterna migranto. La tero ne estis kaj ne estos lia sola loĝejo.

La tera homo, post kiam li finis sian disvolviĝon sur la tero, ne iros al la „ĉielo". Li migrados de sunsistemo al sunsistemo en la fizika universo, ĝis li disvolviĝos en sia pleneco. La venonta stacio de lia disvolviĝo estos nome Siriuso.

La homa spirito malsupreniris sur la teron antaŭ ĉirkaŭ ducent kvindek miliardoj da jaroj. Ĝi ne estis en tia stato, en kiu ĝi sin trovas hodiaŭ. En la daŭro de tiuj ĉi ducent kvindek miliardoj da jaroj ĝi pasis tra multaj formoj kaj multaj fazoj de disvolviĝo.

Kaj la tuta preskaŭ senlima vico de organikaj formoj, kiujn la naturo kreis, prezentas la stadiojn, tra kiuj pasis la homa spirito.

Ili estas granda lernejo, en kiu la homa spirito instruiĝis.

La tuta scienco de la homo, akirita dum tiuj ĉi 250 miliardoj da jaroj, estas skiribita en lia malgranda kapo, en lia cerbo.

Tamen, de la vidpunkto de la progresintaj estaĵoj, de la vidpunkto de la anĝeloj, ekzempe, la homo restas ankoraŭ malgranda infano. Tiuj ĉi ducent kvindek miliardoj da jaroj estas por ili kiel du jaroj kaj duono. De ilia vidpunkto la homo estas infano en la aĝo de du jaroj kaj duono.

La homo havas ankoraŭ multon por studi. Tial li pasis kaj pasos tra sennombraj formoj kaj gradoj de la vivo.

La homoj, kiuj havas ridindan koncepton pri

la vivo, pensas, ke kiam homo naskiĝas unufoje, ĉio estas finita.

Ne, la naskiĝo estas eterna seninterrompa proceso.

Sennombrajn fojojn naskiĝas la homo, pasante de fazo al fazo, de forto al forto.

Memoru ĉiam tion: la problemo pri naskiĝo kaj renaskiĝo estas problemo por la klera homa spirito, por la klera homa animo, por la klera homa intelekto — ĝi ne estas problemo por la ordinaraj intelektoj.

La homo instruiĝas samtempe en tri lernejoj. Sur la tero instruiĝas la korpo. Ĉiuj ĉeloj de la organismo plenumas certan funkcion, sed samtempe ili lernas.

En la spirita mondo instruiĝas la animo. En la dia mondo instruiĝas la spirito.

Tial la idealo de la homo estas kompreni sin mem, kompreni la anĝelojn, kiuj manifestas sin en li kiel luma kaj pura penso, kaj fine kompreni Dion, t. e. la amon.

Ĉar la homo estas ligita kun la anĝeloj, kun tiuj estaĵoj, kiuj kreis la penson, tial oni nomas lin ekzistaĵo de la penso — „Manas". La inteligenteco estas donaco, kiun la anĝeloj faris al la homo. Kaj tio, kio lin distingas de la bestoj, kio lin starigis sur du piedojn — ĝi estas lia inteligenteco.

Sed mi diras al vi, ke la homo estas io pli ol tio, kion li pensas. La majesteco en la vivo ne povas esti komplete difinita.

Memoru tion: la unua kvalito de la vera homo estas la amo. Amo estas la diaĵo en la homo. Sen amo la homo transformiĝas en beston. Sen amo li estas nur subjekto de pekoj kaj krimoj.

Kiu ne amas Dion, tiu ankoraŭ ne estas perfekta homo. Li ankoraŭ ne havas „similecon kaj bildon de Dio“.

La homo hodiaŭ ne estas „simila kaj laŭ la bildo de Dio“. Ĉu estas homo tiu, kiu povas vin priŝteli, prirabi, perforti, insulti? Ĉu estas homo tiu, kiu antaŭe estis via amiko kaj nun kalumnias vin?

Cetere, kiam oni parolas pri homo kiel simila kaj laŭ la bildo de Dio, oni subkomprenas la homon en lia origina manifestiĝo, la tiel nomitan kosman homon.

Ĉiu homo, ĉiu homa animo estas primitiva elemento de la granda kosma homo.

Kiel tia, li okupas precize difinitan lokon en la viva naturo kaj ludas difinitan rolon. Sen li la universo ne povas manifesti sin en la pleneco de sia harmonio.

Tial, ĉiu homo tie ĉi sur la tero havas difinitan rolon. Li estas necesa por la vivo. La apero de tiom da milionoj da animoj en la mondo ne estas afero hazarda.

Tial memoru ĉiam la penson:

La homo estas la plej alta ekzistaĵo sur la tero.

Ĝoju, ke vi portas la nomon homo.

Penu esti inda por tiu ĉi nomo!

Ne forgesu, ke, kiel spirito, kiel animo, kiel intelekto kaj kiel koro, vi estas grava elemento en la universo — sen vi ĝi ne povas manifesti sin en sia plena harmonio.

Vi ĉiam ankoraŭ ne scias, kio vi estas.

En la homo kaŝas sin fortoj, kiuj estas en stato de dormo kaj li devas labori por ilia vekiĝo kaj ĝusta utiligado.

Kiam homo ligas sin kun Dio, en li vekiĝas ĉiuj dormantaj fortoj kaj kapabloj.

Laŭ kio oni ekkonas homon, ligitan kun Dio? Laŭ tio, ke li estas preta ĉion oferi por Li.

Homo, kiu volas inde porti tiun ĉi nomon, devas esti absolute **honesta**, absolute **bona**, absolute **inteligenta** kaj **prudenta**, absolute **nobla**.

Honesta, nobla homo estas nur tiu, kiu ĝojas pri la fremda bono kiel pri sia propra.

La absolute honesta homo ne batalas ekstere por restarigi sian honoron. Li scias, ke laŭ la alta moralo en la mondo, la honoro ne estariĝas de ekstere.

Nenia tribunalo, nenia societo, nenia religio estas kapablaj restarigi la honoron ĉe homo, krom li mem.

Per kjo distingiĝas la prudenta homo?—Li neniam okupas sin pri la pasinteco, nek okupas sin pri la estonteco. Li laboras por la estanteco. Sub **estanteco** mi komprenas la **eternan diecon**.

Prudenta homo ne pensas kion li volas, sed kio estas justa. Nur malsaĝulo pensas tion, kio venas en lian cerbon.

Ĉe prudenta homo ekzistas nur unu humoro: li intencas malbonon kontraŭ neniu. Li intencas bonon por ĉiuj homoj kaj neniam venĝas.

Ĉar li scias, ke moralo estas stabileco, ke ĝi estas punkto de apogo, de kiu la prudento komencas projekciiĝi.

Saĝa homo ĉiam fidas sian prudenton. Li estimas ĝin kiel altan donacon, donitan al li de la anĝeloj por helpo en la vivo. Li scias, ke nur la efektive prudenta homo povas esti libera.

La prudenteco, en la profunda senco de la vorto, estas kvalito de la sanktulo, de la genia homo.

Tial memoru: Saĝa homo, en la absoluta senco de la vorto, povas esti nur homo virta.

Ĉar ĉiuj virtaj homoj estas homoj humilaj — en tiu senco, en kiu Kristo komprenas tiun ĉi vorton — kaj tiuj homoj estas plej grandaj, plej fortaj.

Miaopinie, la plej alta kvalito, kiun homo povas posedi, estas la humileco. Ĝi tute ne estas malfortaĵo. La humila homo estas la plej elasta, la plej fleksebla homo en la mondo. Li povas ĉion elteni — malsanon, malriĉecon kaj eĉ la morton En efektiveco, ĉio tio ĉi ne ekzistas por la humila homo — kio ajn venus, li estas serena kaj trankvila. Li diras: „Dio, kiu loĝas en mi, ne mortas. Dio, kiu loĝas en mi, ne malriĉiĝas".

Do, memoru: la malforta, malkuraĝa homo ne estas humila. Nur virta homo estas humila. Kaj li estas la efektive forta homo. Humila homo, en la vera senco de la vorto, estas homo kun potenca spirito.

Vi demandas, kial vi venis al la tero. Mi diras al vi:

Por manifesti la Dian Amon.
Por manifesti la Dian Saĝecon.
Por manifesti la Dian Veron.
Por manifesti la Dian Justecon.
Por manifesti la Dian Virton.

Vi venis por manifesti ĉiujn tiujn ĉi virtojn, por manifesti ĉion, kio estas metita en viaj animoj de la eterneco.

Kaj memoru, ke la destino de la homo estas alta.

La homo naskiĝis por regi ĉiujn ekzistaĵojn,

por reguligi ĉiujn elementojn, por aranĝi la teron. Li devas fariĝi bona mastro. Kaj li povas fariĝi tia nur kiam li komprenas tion, kion Dio enmetis en lin. Li devas koni siajn korpojn, siajn vestojn. Li devas scii kia estas tiu primitiva materio, en kiu funkcias lia penso.

Li devas regi ĉiujn elementojn. Regi la teron, la aeron, la varmon, la lumon. Li devas kontroli ĉiujn malbonajn spiritojn. Kaj li povas kontroli ilin nur tiam, kiam li venkas ĉiujn iliajn malfortaĵojn.

Kaj Kristo nun volas esti helpata de tiaj homoj, kiuj scias konstrui laŭ ĉiuj reguloj de la dia scienco, homoj, en kies intelektoj la bono de la „Dia regno" okupas la unuan lokon.

La alta vivo bezonas homojn, kiuj „naskiĝis denove" kaj vidis la „Dian Regnon".

Kaj ne forgesu, ke kiu volas vidi la Dian Regnon, ties okuloj devas esti puraj. La puraj okuloj supozas puran koron. La pura koro supozas luman intelekton. La luma intelekto supozas noblan animon. Kaj nobla animo supozas amantan spiriton, kiu elvenis el la Dio de la eterneco.

„La naskita denove" estas ligita kun ĉiuj pli altaj mondoj, kun ĉiuj ekzistaĵoj de pli altaj hierarĥioj.

Li estas verama kiel la vero mem, saĝa kiel la saĝeco mem, amanta kiel la amo mem.

Pri tiu ĉi homo, pri la „naskita en Dio", estas dirite en la Skribo, ke li ne pekas.

Kaj efektive, la naskita en Dio havas tiom grandan amon en sia animo, en ĝi ŝprucas tia granda fonto de amo, ke neniaj konfliktoj ekzistas por li.

Ĉu vi estis ĉe tia homo, por konstati kia paco, kia sereno, kia ĝojo regas interne de li!

La koro, la intelekto, la animo kaj la spirito de tia homo estas en plena harmonio kun Dio.

Se oni lin konsideras de pli profunde, oni vidos, ke tia homo estas aro da multaj inteligentaj, geniaj animoj.

Tio koncernas ankaŭ ĉiujn grandajn poetojn, muzikistojn, pentristojn. Por ke iu granda poeto manifestu sin, por ke iu granda muzikisto aŭ pentristo manifestu sin, miloj da inteligentaj, geniaj animoj devas kolektiĝi en unu lokon.

Tiamaniere, la homo de „filo de la penso", fariĝas „amata filo de la amo".

Tiamaniere, li fariĝas Filo de Dio.

Kaj la plej alta rango, kiun homo povas havi rilate al Dio, ĝi estas esti F i l o d e D i o.

Esti Filo de Dio, esti servanto al la Plejalta, Kiu ĉion kreis, signifas senti l a p u l s o n d e l a t u t a u n i v e r s o, vidi la tutan ĝian belecon, senti ĝian majestan harmonion.

Vi, kiu aspiras fariĝi Filo de Dio, starigu al vi idealon havi:

Koron puran kiel kristalo,
Intelekton luman kiel la suno,
Animon vastan kiel la universo,
Spiriton potencan kiel Dio kaj unu kun Dio

# Spirito

Dio, en sia Genezo, estas Spirito.

La Spirito estas manifestiĝo de la viva Dio.

Li eterne ekzistis kaj eterne ekzistos.

La Spirito estas komenco de ĉiuj aferoj.

Estas dirite: „En la komenco estis la Vorto per kiu ĉio fariĝis".

La vorto — ĝi estas la unua manifestiĝo de la amo en la materia mondo.

Kaj la amo – ĝi estas la unua frukto de la Spirito. La amo estas la sunleviĝo de la Spirito, same kiel la saĝeco estas la zenito de la Spirito.

—„En la komenco estis la Vorto".

Koro de la Vorto estas la Amo.

Kapo de la Vorto estas la Vero.

Kaj k a p o de la vero estas la Dia Spirito.

Ĝi estas la Komenco de la komenco de ĉiuj aferoj.

Tial, la unua afero, per kiu homo devas komenci, estas la Vorto. Kaj tio, kio iafoje parolas al ni, ĝi ne estas ankoraŭ la Spirito de Dio, ĝi estas la Vorto.

Poste oni venos al la Vero.

Kaj fine — al la Dia Spirito.

Kiu ne komprenas la Vorton, ne povas kompreni la Veron, kaj kiu ne komprenas la Veron, ne povas kompreni ankaŭ la Spiriton.

Ĉar la Spirito malsupreniras en la Veron, kaj la Vero malsupreniras en la Vorton.

Kaj tiu ĉi Vorto parolas:

„Spirito estas tio, kio donas vivon".
Ekzistas vivo, ĉar ekzistas S p i r i t o. La spirito alportis la vivon.

Vera vivo estas nur tiu, kiu devenas de la Spirito. Ĉar ekzistas vivo, kiu ne devenas de la Spirito. Vivo, devenanta de la Spirito estas absolute racia. En ĝi nenio mortas. En ĝi mankas ĉiaj suferoj, ĉiaj malsanoj, ĉiaj konfliktoj, ĉiaj mizeroj.

La Spirito estas la eterna, senmorta fundamento ĝuste de tiu ĉi vivo.

Ĝi kaŝas en si ĉiujn p r i m i t i v a j n f o r m o j n, en kiuj manifestas sin la vivo.

Kaj sub primitivaj formoj oni komprenas tiujn formojn, kiuj devenas rekte de la Spirito.

Ĉiu formo de la Spirito estas skribita folio de la granda libro de la vivo.

La Spirito, en sia esenco, estas unu, en siaj manifestiĝoj ĝi estas multeco. Unueco kaj multeco — jen estas la kvalitoj de la Spirito.

Kiel manifestiĝo, la Spirito estas multeco de unu sia poluso ĝis la alia.

Tial mi diras:

Unu estas la Spirito, multaj estas la spiritoj.

La Spirito — tio estas spiroj, naskitaj de la sola Spiro.

En la multeco de la Spirito manifestas sin ĝia neelĉerpebla diverseco.

Kaj la majesteco de la Spirito de Dio kuŝas en tiu ĉi diverseco. La Spirito portas ĉiujn neprikalkuleblajn riĉaĵojn de la videblaj mondoj kaj malkovras, kio estas Dio en si mem.

Dio malsupreniras al ni sendante sian Spiriton, kiel la suno sendas sian lumon.

La Spirito de Dio ĉiun tagon leviĝas, ĉiun tagon donas al ni siajn bonojn volonte, ne atendante niajn petojn, nek atendante ian ajn rekompencon de ni.

Ĉion, kion ni posedas, ni ŝuldas al ĝi.

La homoj ĉiam, pli aŭ malpli, konsciadis tion. Ili difinadis en la plej diversaj manieroj tiun ĉi racian forton, kiu devenas de Dio kaj manifestas sin en la mondo, nomadis ĝin per la plej diversaj nomoj: primitiva substanco, primitiva energio, leĝoj de altiro kaj parenceco ktp.

Sed leĝoj estas kreataj de la Spirito. Ili havas rilaton ĝuste al tiu ĉi granda energio en la mondo, kiu elfluas al sia primitiva stato, eniras en la vojon de la evoluo, diferenciĝas sin por manifesti sin en sia senlima diverseco.

Kaj tiu ĉi vojo de disvolviĝo estas nenio alia krom la movado de la Spirito en la saĝa aplikado de la leĝoj de la naturo.

Ĝi estas unu.

Tial mi diras al vi:

Vojo, kiu havas neniajn vojetojn, estas vojo de la Spirito.

Iru sur tiu ĉi vojo!

La Spirito estas la plej alta realaĵo. De la vidpunkto de la fizika mondo ĝi estas nevidebla, sed de la vidpunkto de la dia mondo ĝi estas tiel objektiva, kiel la korpo en la fizika mondo kaj kiel la animo en la spirita mondo.

Ĉio alta, granda, forta en la mondo, estas ŝuldata al la Spirito.

La Spirito donis la plej grandajn fruktojn:

Tiuj fruktoj estas:

Amo, Ĝojo, Paco;

Pacienco, Boneco, Kompatemo;
Kredo, Mildeco, Forrifuziĝo.

Tio estas tri grandaj trianguloj, kiuj funkcias en la tri mondoj: dia, anĝela kaj homa. Amo, Ĝojo kaj Paco — ĝi estas la dia triangulo. Amo estas la patro, Ĝojo — la patrino, la Paco — ilia infano.

En la triangulo de la mondo de la anĝeloj la pacienco estas patro, la boneco — patrino, kaj la kompatemo — la infano.

Akiru tiujn ĉi kvalitojn kaj vi estos inter la anĝeloj.

En la tria triangulo, la kredo — ĝi estas la patro, la mildeco — la patrino, la forrifuziĝo — la infano.

Akiru tiujn ĉi kvalitoj en ilia profunda mistika senco, kaj vi eniros inter la sanktulojn.

Por ke la homo komprenu, kio estas la Spirito, lia animo devas vekiĝi.

Ĉar nur la animo povas senpere komunikiĝi kun Dio.

Sen animo ni havas nenian koncepton pri Dio.

Kaj oni povas diri, ke kia estas la rilato de la ĝermanta grajno al la suno, tia estas la rilato de la homa animo al la Dia Spirito.

La homa animo devas havi sanktan treman senton antaŭ la Spirito de Dio, ĉar ĝiaj vivo kaj kreskado dependas de ĝi.

La animo ankoraŭ ne finis sian evoluon. Ĝi pasos ankoraŭ tra milionoj da formoj. Kaj kiam ĝi finos sian evoluon, ĝi kunfandiĝos kun la Spirito kaj tiam ne plu ekzistos aparte animo kaj spirito.

Tiam la eterna vivo manifestos sin.

La spirito povas vivi nur kun la animo. Kun

nia intelekto ĝi ne povas vivi, ĉar niaj pensoj ŝanĝiĝas.

Memoru jenon: la esenco de la homo — ĝi estas l i a s p i r i t o.

La unua manifestiĝo de la homo estas lia manifestiĝo kiel spirito. La Spirito estas tiu ĉi absoluta punkto, en kiu la homo aperas. La animo — tio estas la ebloj de la Spirito.

La Spirito de la homo estas eterna. Ĝi senĉese malleviĝas, manifestas sin kaj denove releviĝas. Ĝi ekzistas kiel malgranda centro, kiel ĝermo en la universo. Kiam la Dia Spirito malleviĝas en la spiriton de la homo, ĝi vekiĝas kaj manifestas sin. Ĝi malleviĝas kaj post tio denove relevas sin al Dio.

En tiu ĉi malleviĝado kaj releviĝado, la homa spirito iras samtempe en tri direktojn, de kiuj naskiĝas tri tendencoj.

La unua tendenco de la vivo estas la tendenco al vivo. La dua tendenco de la spirito estas tendenco al scienco. Ĝia tria tendenco estas la tendenco al libereco.

La homa spirito instruas la homon pri ĉio. Ĝi instigas la homan animon al kreskado kaj disvolviĝo. La animo estas la trezorejo de la homa spirito. Ĝi portas ĉion tion, kion ĝi akiris de nememoreblaj tempoj ĝis nun.

La homa spirito estas la aŭtoro de ĉiuj aferoj en la mondo. Ĉiuj sciencoj, ĉiuj artoj, ĉiuj religioj, ĉiuj epokoj kaj kulturoj, tra kiuj pasis la tero, estas ĉiuj kreitaj de la homa spirito, kiu ankoraŭ ne manifestis sin komplete.

Ankaŭ la fizika korpo de la homo, kun ĉiuj ĝia

organoj, kun la tuta ĝia strukturo, estas kreita de la homa spirito.

Kaj kiam iu korpo formiĝas en la utero de sia patrino, la spirito de la homo ne dormas, sed ĝi partoprenas, kune kun la spirito de la patrino, en la formado de la korpo.

Ĉar ĉiuj energioj, ĉiuj fortoj, kiuj funkcias en la kosmo, estas atingeblaj por la homa spirito. Ĝi eksperimentas libere per la materio — ĝi povas ĝin densigi, maldensigi, skulpti. Tiel ekzemple, se la spirito volas malgrandigi la vibrojn de la lumo, ĝi densigas la materion ĉirkaŭ si. La materio konstante devigas la spiriton krei novajn formojn, ĉiam pli perfektajn. La spirito kreas la formojn kaj la materio individuigas la Spiriton. Kaj tio, kion ni nomas batalo inter la materio, kiu per si mem estas senviva kaj inerta, kaj la spirito, kiu estas plena de vivo, ĝi estas la penado de la lasta fari la materion pli fleksebla kaj pli taŭga por sia krea laboro.

Oni serĉas en la vivo feliĉon, kulturon, sciencon, riĉecon.

Sed tiujn ĉi aferojn oni povas ricevi nur de la Spirito.

Nur la Spirito estas portanto de ĉiuj tiuj ĉi bonoj. Ĝi estas portanto de ĉiuj kapabloj, de ĉiuj talentoj, ĝi estas portanto de inteligenteco kaj genieco.

Kiam venas la Spirito, tiam naskiĝas ĉio alta.

Kiam venas la Spirito, ĝi donas impulson al ĉio, kio amasiĝis de milonoj da jaroj en la homo. Ĝi vekiĝas kaj komencas kulturiĝi.

Kiam venis la Spirito, ĉe la homo aperas vastiĝo, lia horozonto klariĝas, la konfliktoj malaperas kaj oni vidas klare.

Se homo volas, ke la dia amo manifestu sin en li, la Spirito nepre devas esti ĉe li.

Sed la spirito estas ekzistaĵo tre delikata. Ĝi estas tre sentebla rilate al la malfortaĵoj de la homoj kaj ĝi havas la kvaliton eniri en tiujn, kiuj estas sur la vojo. Ĝi ne frapas forte. Ĝi frapas tre mallaŭte sur vian koron kaj, se vi malfermos al ĝi, tuj ĝi ŝanĝas elfunde vian vivon kaj montros al vi kiamaniere vi devas vivi, kion fari, kaj fari ĝin konscie.

La Dia Spirito venas labori en ni nur tiam, kiam niaj koro kaj intelekto funkcias regule.

Ĝi komence agas kiel intuicio, sed, ĉe pli progresinta stato, ĝi komencas paroli klare, laŭte kaj koncize. Ĝiaj manifestiĝoj komencas fariĝi pli klaraj kaj pli konkretaj.

Kaj kiam la Spirito penetras en la homon, ĝi nepre manifestos sin. Ne ekzistas en la mondo forto, kiu povus bari la manifestiĝon de la Spirito.

Sed, sen pureco la Spirito ne povas manifesti sin en sia forto. Sen pureco oni ne povas konservi la riĉaĵon, kiun oni kolektis dum sia juneco.

Aŭskultu vian Spiriton! Kaj memoru, ke ĝi estas la granda aŭtoro de ĉio, kio estas sur la tero. La scienco, antaŭ kiu la homoj iafoje adorkliniĝas, estas kreaĵo de la homa spirito. Sed la homa spirito staras super ĉiuj sciencoj.

Tial, ne adorkliniĝu antaŭ tio, kion kreis la homa spirito, kion vi mem kreis!

Estimu vian spiriton kiel grandan kreanton, kiel grandan interpretiston kaj plenumiston de la Dia Volo.

Ĉar la homa spirito ĉiam plenumas la Dian Volon. Ĝi faras tion, kion ĝi lernis de Dio.

Se vi volas iri la vojon de la Vero, donu liberecon al la Spirito en vi, ke ĝi konduku kaj gvidu vin. Interne aŭ ekstere, la Spirito observas kaj atentas ĉion, kion li faras

Kaj nun la Spirito gvidas la homaron sur novaj vojoj. La tuta sunsistemo eniris en novan zonon de la spirito. Post kelka tempo la scienculoj pruvas, ke ankaŭ la tero eniris en novan konmbinaĵon kun la suno. Ni ligiĝas kun virga materio, kaj kiuj estas pretaj, akceptos la vivigan eleksiron, kiu kaŝiĝas en ĝi, kaj releviĝos. Kiuj ne estas pretaj atendos ĝis en la estonteco ili estos levitaj de alia nova ondo.

Preparu vin por la veno de la Spirito!

Kaj ne forgesu, ke kiam la Spirito venas, la pordo de via koro malfermiĝas.

Kiam la Spirito eniris, la pordo de via koro fermiĝas.

Ne malfermu la pordon antaŭ la veno de la Spirito.

Ne fermu la pordon antaŭ la eniro de la Spirito.

Laboru tie, kie laboras la Spirito.

# Bono

La Amo estigas la bonon.

La bono estas la fundamento de la vivo. La bono estas grundo de la vivo, ĝia nutraĵo. Nur la bono povas subteni la vivon, nur la bono povas nutri ĝin.

Kiam D i o limigas sin, naskiĝas la bono en la mondo. Kiam homo limigas sin, naskiĝas la malbono. Kaj kiam li liberigas sin de la limigoj, aperas la bono. Per aliaj vortoj dirite: kiam en la homa animo aperas la deziro s e r v i  a l  D i o, tiam aperas la kondiĉoj necesaj por la bono.

La homo volas krei la bonon en si. La bono tamen ne estas kreebla, ĝi naskiĝas. Ĝi estas enmetita de la komenco en ĉiu homo, kaj li devas nur rekoni kaj manifesti ĝin.

Kaj oni devas esti bona, ĉar l a  b o n o  e s t a s  f u n d a m e n t o  d e  l a  v i v o. Sen bono la vivo de la homo estas sen fundamento.

Se oni ne faras bonon, naskiĝas la malbono. La malbono, kiu nun ekzistas en la mondo, estas b o n o  n e u z i t a en la pasinteco.

La malbono devenas de nedifinita ordo. Ĝi estas mondo de arbitreco.

En la organika mondo ĝi povas esti difinita kiel multiĝado sen leĝo.

La malbono, tamen, estas neevitebla afero en la mondo de rilatoj inter fortoj kaj ekzistaĵoj.

Bono kaj malbono estas aferoj relativaj. Nia

malbono estas bono por aliaj, kaj nia bono estas malbono por aliaj.

Bono kaj malbono en la viva Naturo estas fortoj, kiujn ĝi egale bone uzas

Malantaŭ bono kaj malbono kaŝas sin granda saĝeco, kiu uzas ĉion.

Oni ne devas batali kontraŭ la malbono. Oni devas nur eviti ĝin. Oni ne devas batali kontraŭ la malbono, sed oni devas kontraŭmeti bonon al la malbono.

Homo, kiu plej multe batalas kontraŭ la malbono, pekas plej multe.

La sola ekzistaĵo, kiu povas laborigi la malbonon, estas Dio.

Vi devas scii, ke ekzistas kolektiva konscio de la bono kaj kolektiva konscio de la malbono. Ili formas la du polusojn de la ekzistado.

La homa spirito sin movas inter tiuj ĉi polusoj, Kiam la malbono estas interne kaj estas pli fortaj kaj la bono restas ekstere, tiam sur la tero estas malbono. Per aliaj vortoj, sur la tero regas „la infero".

Kaj kiam la bono estas interne kaj estas pli forta, kaj la malbono restas ekstere, tiam „la ĉielo" regas kaj la bono tronas.

„La infero" estas loko, kie la malbono estas interne kaj ekstere.

„La ĉielo" estas loko, kie la bono estas interne kaj ekstere.

Kaj la homa vivo estas „loko", kie iafoje la bono estas interne kaj la malbono ekstere, kaj iafoje — returnite.

Ĉiu homo, laŭ sia vivo, sin trovas aŭ en la poluso de la bono, aŭ en la paluso de la malbono.

Homo, en kiu regas la malbono, vivas en konstanta maltrankvileco. Ekstere li povas havi grandajn riĉaĵojn, li povas havi la respekton de la aliaj homoj, sed interne li estas konfuzita kaj maltrankvila. Lin konstante turmentas malbonaj antaŭsentoj kaj timoj. Li komencas iom post iom perdi sian sanon kaj sian forton.

Kaj kiam la bono sin trovas en la koro de iu homo, li povas havi nek riĉecon, nek aŭtoritaton, sed li estas trankvila kaj gaja. Ekstere la kondiĉoj estas malbonaj, sed interne—bonaj. Tia homo havas en si ion potencan, pro kio ĉiuj amas lin.

La bonaj homoj estas la efektive fortaj homoj en la mondo.

Sed oni pensas, ke la malbono estas forta en la mondo. La malbono estas forta nur tial, ĉar oni amas ĝin. La amo al la malbono donas al ĝi forton. La malbono ĉerpas fortojn el la amo.

Sed, malgraŭ tio, la celado al bono povas neniam ĉesi.

La proceso de la bono estas eterna.

Ĝi estas krea proceso de la vivo.

Tial la bonon oni povas nomi vojo al vivo.

Ĝi enkondukas nin en la vivon, montras al ni la direkton al la vivo.

Malbono estas vojo al la morto. Ĝi estas kondamnita al eterna senfrukteco.

Distingante bonon de malbono, memoru jenajn aferojn:

Bono kaj malbono, tio estas la alteco kaj la malalteco. Malbono tio estas la plej malaltaj eblaj vibroj de la bono. Jen kial la bono estas p r e z o de t i o, k i o e s t a s p r u d e n t a, kaj malbono — prezo de tio, kio estas malprudenta.

La bono altigas la valoraĵojn de la homa konscio. La malbono ilin malaltigas.

Ĉe bono la talentoj plifortiĝas, ĉe malbono ili malfortiĝas kaj malklariĝas.

La bono komencas per la sensignifaj, per la malgrandaj, etaj aferoj. Sed ili konstante kreskas, grandiĝas, multiĝas, organizas sin kaj kunigas sin en unu tutaĵon. En la malbono ĉiam ekzistas disflugiĝado kaj disiĝado.

La bono povas ĝenerale esti komparata al fonto, kiu konstante fluas. La malbono similas al sekiĝinta fonto, kiu apenaŭ gutas.

La malbono multon promesas, sed nenion faras. La bono ne promesas, sed ĉion faras. La fonto ja ne bezonas promesi, ke ĝi donas akvon. Ĝi ĉiam ŝprucas.

Tiel ankaŭ estas kun la bona homo. En li la bono estas kiel fonto. Tial li ĉiam, en ĉiuj cirkonstancoj restas bona Eraro estas pensi, ke la cirkonstancoj povas ŝanĝi lin. Antaŭ ĉio la bono trapenetras ĝian tutan esencon; ĝi kuŝas en la fundamento de lia strukturo

Bona homo diferencas, laŭ strukturo, de malbona homo.

La nerva sistemo de bona homo estas pli malsimpla kaj pli delikata. La cerbo de bona homo havas pli da ĉeloj, pli da faldoj — ĝi havas alian strukturon. La sangocirkula sistemo formas pli densan kaj pli riĉan reton. La haŭto de la bona homo havas pli da ĉeloj; ĝi havas pli delikatan strukturon ol la haŭto de malbona homo.

Ĝenerale bona homo havas pli perfektan strukturon. Li estas alte progresinta estaĵo. Jen kial ĉiu

homo, kiu malfruas sur la vojo de sia disvolviĝo, fariĝas malbona.

En tia senco ni diras, ke la malbono estas neŭzita bono. Sed ĝi ne povas ankoraŭ nun esti tuj elradikigita. Kaj kiam Kristo diras ne tuŝi la malbonajn herbojn ĝis venos la tempo de la rikolto — la fino de la mondo—li subkomprenas, ke venos en la estonteco nova ondo, kaj tio, kio nun en la mondo estas malbona, pasos en novan fazon de evoluo.

Sed tio ĉi estas profundaj problemoj.

Kiam ni parolas pri bona ago, ni ĉiam supozas s a n a n h o m o n. Malsana homo ne povas fari bonon. Videble, ĉi tie ne estas parolate pri la ordinaraj bonoj, tiel kiel oni ilin komprenas.

La vera b o n o, de la vidpunkto de la Dia Scienco, difiniĝas per tri kvalitoj: Ĝi devas doni v i v o n, l u m o n kaj l i b e r e c o n.

Se ĝi ne havas tiujn ĉi tri kvalitojn, ĝi ne estas bono.

La vivo venas per la amo, la lumo venas per la saĝeco, kaj la libereco — per la vero. Kiu volas fari bonon, tiu devas esti ligita kun ĉiuj tiuj tri diaj mondoj.

Por ke iu nia ago estu efektive bona, ĝi devas esti viva, ĝi devas marŝi post ni.

La bono devas akompani nin. Se la bono ne povas veni post ni, ĝi ne estas bono.

Mia bono devas veni post mi. Kaj por ke ĝi venu post mi, ĝi devas porti v i v o n, l u m o n kaj l i b e r e c o n, kiel por mi, tiel ankaŭ por tiu, al kiu mi faras bonon. Ĉar la Dia leĝo estas kolektiva, ĝi k o n c e r n a s s a m t e m p e ĉ i u j n. Se vi faras bonon al unu homo, tiu ĉi bono valoras ankaŭ por la tuta

mondo. Ĉu la homoj scios tion aŭ ne, por la Dia mondo tio estas indiferenta. Fakto estas, ke tiu ĉi bono estos utila por ĉiuj.

Tial mi diras: fari bonon, ĝi estas sankta ago, ĉar tiamaniere vi instigas Dion manifesti sin per vi en sia boneco, en sia amo, saĝeco kaj vero.

Ne ekzistas pli granda ago ol la farado de bono.

Kiom ajn mikroskopa estus tiu ĉi bono, ĝi estas nobla ago, antaŭ kiu ĉiuj en la ĉielo stariĝas, ĉar en la bono estas kaŝita Dio.

Ankaŭ la naturo estas tre atenta eĉ pri la plej malgranda akiro. Kiam iu homo faras ian bonon en la mondo, kiam li faras prudentan agon, en la nevidebla mondo fariĝas granda festo.

Kaj kiam Kristo diras, ke la homo devas kolekti al si trezorojn en la ĉielo, li subkomprenas la bonon. La trezoro — tio estas la granda bono, kiun Dio faras sur la tero,

Fari bonon — ĝi signifas instigi Dion agi per vi. Kaj kiam Dio agas, Li ne laboras nur por unu — Li agas por ĉiuj. Tial, kiam ia bono estas farata, ĉiuj perfektaj estaĵoj partoprenas.

Do, ĉiu ago, en kiu la ĉielo ne partoprenas, estas homa, kaj ĉiu ago, en kiu la ĉielo portoprenas, estas dia.

La bono devas esti farata en ĝia tempo. Ĝi ne postulas de vi multe da tempo, sed kiam vi faras ĝin, ĝi postulas, ke via intelekto, via koro, via volo, via animo kaj via spirito estu plene koncentrigitaj dum tiuj minutoj, en kiuj vi faras la bonon.

En la bono ne devas ekzisti prokrasto. Kiam vi intencas fari bonon, vi devas fari

ĝin tuj en la momento, senprokraste. Se vi prokrastas ĝin, fariĝas nenio. Kaj se vi komencas fosi por vidi, ĉu la bono kreskigis radikon, ree fariĝas nenio.

Ne pensu, ke vi povas fari bonon nur kiam vi havas bonan humoron. Bono povas esti farata ankaŭ ĉe la plej malbona humoro. La malbona humoro estas afero, kiu tuŝas nur la karnon de la homo. Ĝi ne tuŝas la spiriton de la homo.

Oni opinias, ke la bono estas afero malviva. Tio ne estas vero. En tiu ĉi sankta ideo, kiu donis al vi impulson fari iun bonon, agas alta kaj supera spirito, kiu sanktigos tiun ĉi aferon kaj montros, ke la vivo de tiu, kiu servas al Dio, ĉiam realiĝas.

La bono estas la unua ligilo de la vivo.

La bono estas la unua ligilo inter la homoj. Hodiaŭ la bono estas la sola materia ligilo, kiu efektive ligas la homojn. Io pli — la bono estas la unua ligilo inter la animoj de ĉiuj homoj, — senkonsidere ĉu ili sin trovas sur la tero aŭ en la ĉielo.

Sen bono vi povas akiri nenian sciencon. Per la konado de la bono komenciĝas la scienco.

Farita bono neniam estas forgesata. Ĝi estas skribita en la Dia libro, ĉar ĝi estas ama ago kaj, kiel tia, ĝi estas memorata en la Dia mondo por eternaj tempoj.

Ĉiu, kiu faras bonon, fariĝas idealo por la aliaj.

Ne pensu, ke farante bonon vi perdos ion. Kontraŭe, la bono levos vin en la okuloj de la homoj.

Tial, cedu antaŭ neniaj malfacilaĵoj, kiam vi devas fari bonon. Estu kuraĝaj, sentimaj, faru la plej

malgrandan bonon, kaj tiu ĉi bono portos vivon, lumon kaj liberecon por ĉiuj viaj proksimuloj.

Ĉiuj vi povas fari bonon, ĉar en ĉies koro sintrovas bono.

Ĉiu bono, kiun vi faris, estas ligilo, kiu iom post iom plifortiĝas.

Vi devas ne nur unufoje, sed konstante fari tiajn ligilojn.

Ne forgesu ĉe tio, ke la homo devas resti nekonata en la bono, kiel li volas ankaŭ resti nekonata en la malbono.

Ne rapidu fariĝi bonaj! La bono estas necesa kondiĉo por la perfekteco de la homo, sed oni ne fariĝas bona en unu tago. Kiam, tamen, la mondo aspiras al perfekteco, la bono helpos al ĝi

Por ke vi estu p e r f e k t a, vi devas e s t i forta en la bono

La sola afero, kiu distingas homon de homo estas la bono, kiu vivas en li.

La bono estas la vojo por trovi la Dian Amon.

# Libereco

Tio, kio portas liberecon por la homa animo, estas la Vero.

La homa animo celas kaj aspiras esti libera. Tio estas alta interna impulso, kaj ne de ordinara homo, sed de homo, en kiu vekiĝis la Dia konscio.

Vi aŭdis, ke estas dirite: „Ekkonu la Veron, kaj la Vero vin liberigos".

La Vero — ĝi estas la Lumo en la Dia mondo. La libereco estas ĝia senfineco.

Kaj kiam ni parolas pri la Dia libereco, kiu devenas de la vero, ni supozas senfinecon, t. e. celado de la animo vivi en senfineco.

La libereco, en la plena senco de la vorto, apartenas al dia mondo.

*Nur Dio estas absolute libera.*

Tial, la homa animo, kiu vivas en la vero, konas Dion kiel *liberecon sen limigoj*.

Kaj kiam homo eksentas tiun ĉi liberecon, ĉiu ŝarĝo, ĉiuj limigoj, kiuj lin premas, malaperas.

Li sentas profundan pacon, vastecon, plilarĝiĝon. Por lia konscio ne ekzistas limoj — per unu rigardo li penetras la aferojn. La tuta glacio sub li kaj ĉirkaŭ li degelas. La suno ekbrilas kaj ĉiuj noblaj ĝermoj, kiuj estas enmetitaj profunde en lia animo kaj de miloj da jaroj atendas ĝermi, komencas disvolviĝi kaj kreski.

La libereco estas necesa por la atingo de tiu alta idealo, la kiu aspiras la homo.

La homo ne estas hodiaŭ libera. Li aspiras al la libereco, sed li serĉas ĝin laŭ vojo ekstera.

La libereco, tamen, ne povas veni de ekstere.

Ĝi ne povas esti trudita per leĝo.

Ĉiu libereco, sub kia ajn formo oni ĝin serĉus: politika, civitana aŭ religia — kiu estas trudata de ekstere, estas nur ombro de la libereco.

La ideala libereco, la libereco, kiu devenas de la Vero, bazas sin sur nenia perforto. Ĝi estas bazita sur nenia homa scienco, sur nenia homa jura sistemo. Ĝin defendas nenia ekstera leĝo aŭ forto.

Kaj efektive, ĉu libereco, kiun oni devas defendi per armiloj, estas libereco?

La homoj estas hodiaŭ sklavoj, kaj por ke ili fariĝu liberaj, ili devas renaskiĝi. La renaskiĝo estas rompado de tiuj ĉi ligiloj, kiuj nun baras nin. Ĝi signifas liberiĝo de la katenoj de sorto kaj neceseco. Ĝi signifas restarigo de tiu primitiva ligo de la homo kun Dio, kiu ekzistas de lia apero en la mondo. Ĝi signifas restarigo de lia libereco.

Ĉar en la komenco ĉiuj ekzistaĵoj estas kreitaj liberaj.

Kaj se poste la libereco malaperis de la mondo, la kaŭzo estis la homo mem.

Li mem rompis sian primitivan ligon kun la primitiva kaŭzo. Li faris multajn aliajn ligojn, kiuj lin limigis kaj erarigis.

La dia principo konstante lin liberigas de la limigoj de la malnovo, sed li, ne post longe, denove ekiras sur la malnova vojo.

Tial, se oni volas esti libera, oni devas havi

nur unu ligon — kun Dio. Kun ĉiuj aliaj ekzistaĵoj li povas havi nur rilatojn.

Ĉar la sola ekzistaĵo, kiu estas absolute libera, estas Dio.

Kaj la sola ekzistaĵo, kiu komplete povas liberigi la homon, estas Dio. Dio volas, ke ĉiuj estu liberaj kiel Li. Kaj ili devas esti liberaj, ĉar ili estas partoj de la Dia organismo.

Jen kial nur kiam la viva Dio de la vero venos por loĝi en la homo, kiam en li komencos agi la diaj Spirito kaj forto, nur tiam li povas esti efektive libera, nur tiam li ekkonos Dion kaj estos ekkonita de Li, nur tiam li servos al Li libere, en spirito kaj Vero.

Ĉar la libereco postulas, ke oni estu ĉiumomente preta fari tion, kion Dio postulas de ni. Kaj libera homo povas ĝin fari, ĉar nenia ligilo limigas lin. Ĝuste en tio kuŝas lia libereco.

Hodiaŭ oni disputas, ĉu ekzistas libera volo.

Nur homo, kiu loĝas en tiu ĉi esenca, senŝanĝa mondo, kie loĝas Dio, nur homo, kiu komprenas Liajn leĝojn kaj servas al Li en spirito kaj vero, nur li estas libera, nur li havas liberan volon.

Kaj efektive, la libereco kuŝas en la volo de la homo — la volo, kiu estas la diaĵo en li. Tial libereco supozas ĉiam ne arbitrecon, sed prudentan volon.

Nur prudenta homo povas esti libera. Kaj la viva Naturo donas liberecon al la prudentaj. La malprudentulojn, kiuj havas ne volon, sed arbitrecon, ĝi limigas. Ekzistas en la regno de la viva naturo miloj kaj milionoj da ekzistaĵoj, kiuj estas maliberigitaj kaj atendas sian liberigon. Kial? Ĉar en ili

ekzistas la arbitra deziro movi sin senkontrole en diversaj direktoj. La libereco, tamen, ne toleras negativajn, arbitrajn agojn. Ĝi donas ne liberecon, sed limigon. La libereco subkomprenas movadon nur en unu direkto — la vero.

Ĉar, ne forgesu, ke la vero estas la direkto, en kiu sin movas ĉiuj aferoj en la universo.

Do, memoru: La Vero estas tio, en kio oni povas esti ĉiam libera. Ĉiuj niaj limigoj kaj baroj kuŝas en tio, ke ni ne estas en kontakto kun la Vero. Nia libereco dependas de tio — kiom ni estas en kontakto kun la Vero. Ekzistas nenia alia kriterio. Ni povas klarigi niajn limigojn en tia aŭ alia maniero — tio estas niaj konceptoj. Unu estas vera — niaj limigoj, niaj baroj, niaj konfliktoj parolas al ni, ke en la konkreta okazo ni ne estas en kontakto kun la vero.

En la Vero — tial parolas la sperto de la libera homo — ĉesiĝas ĉiuj konfliktoj. Se aperas iaj konfliktoj, kiom ajn malgrandaj ili estus, ni estas ekster la regiono de la vero.

Alion ne forgesu: La libereco ne venos de ekstere. Ĉiu libereco, kiu estas trudata de ekstere, estas ombro de la libereco.

Ne kuru post ombrojn!

La vera libereco estas la libereco de la spirito. Ĝi venas de interne.

Ĉe interna libereco oni ekkonas sian ĝustan valoron kaj ekkonas sin mem. Ĉe interna libereco oni juĝas sin mem. Tia estas la leĝo.

Ĉe interna libereco oni limigas sin mem — oni propravole sin limigas. Kiam? Nur kiam oni

faras bonon. Ĉar, sur la vojo de la libereco estas elprovata la nobleco de la animo, kaj la kompatemo de la homa koro.

Kiam oni faras bonon, oni unue limigas sin, ĉar oni konstante donas. Se oni jam faris la bonon, oni estas denove libera.

Tial, ĉiu afero, kiu en la komenco de sia apero limigas la homon, senigas lin de libereco, estas bono.

Kaj ĉiu afero, kiu en la komenco de sia apero donas al la homo liberecon, sed poste forprenas ĝin de li, estas malbono.

Tie ĉi kuŝas la profunda ligo inter bono kaj libereco, inter malbono kaj sklaveco.

Se vi volas havi certan kriterion, memoru:

Ĉ i u a f e r o, e n k i u o n i p e r d a s s i a n l i b e r e c o n, e s t a s m a l b o n o.

Ĉ i u a f e r o, e n k i u o n i a k i r a s s i a n l i b e r e c o n, e s t a s b o n o.

Do, metu la veron en vian animon kaj vi akiros la liberecon, kiun vi serĉas.

# Lumo

La Lumo — tio estas krea ago en la granda naturo. Ĝi apartigas la ekzistadon de la neekzistado, la aferojn provizorajn de la eternaj, la aferoj realajn de la efemeraj.

La Lumo — ĝi estas la unua akto de vekiĝo en la viva naturo. Kaj sub vekiĝo ni komprenas: pasado de la senlima stato en la naturo al la lima, de la superkonscio al la subkonscio.

Se vi demandas la nunajn fizikistojn pri la lumo, ili difinos ĝin al vi kiel vico da vibroj, kiuj ampleksas sep kolorojn — de la ruĝa ĝis la viola. Ili estas la malsupra kaj la supra limoj, inter kiuj la lumo manifestas sin en la fizika mondo. Aŭ, pli precize, tio estas la limoj, en kiuj la homo perceptas la lumon.

Sed, ĉu la lumo per si mem estas vibrado? Efektive, la vibroj estas elementoj de la manifestiĝo de la lumo, sed la lumo mem ne estas vibrado.

La problemo pri la lumo estas problemo por alte progresintaj homoj, kiuj havas strukturon diferencan de la strukturo de la nunaj homoj. Longa tempo estas ankoraŭ bezonata ĝis kiam la korpoj de la homoj venos al tia disvolviĝo, ke ili povu percepti la vivajn fenomenojn en la naturo en ilia efektiva aspekto.

Se vi demandas tiujn ĉi alte progresintajn homojn pri la deveno de la lumo, kiun perceptas la meze-disvolviĝinta homo, ili diros al vi, ke de la kosma spaco venas al la tero aliaj lumaj vibroj, kiuj, veninte al ĝi, transformas sin tiamaniere, ke formiĝas la ordinara lumo. Tamen, malantaŭ tiu ĉi ordinara lumo, kiu estas nur rebrilo, kuŝas aliaj specoj

da energioj de pli alta ordo, kaj malantaŭ tiuj ĉi kuŝas io prudenta.

Por tiuj, kiuj vidas, ĉio en la viva naturo estas lumo. Ĉiuj objektoj sur la tero, ĉiuj mineraloj, kreskaĵoj, bestoj, ĉiuj homaj formoj, estas nenio alia krom lumo, ŝanĝita laŭ siaj plej diversaj manifestiĝoj.

Por tiuj, kiuj vidas, la lumo ne estas malviva, ĝi ne konsistas nur el vibroj, kiel oni hodiaŭ asertas.

La lumo devenas de la vivo.

Tuj kiam aperas la amo, naskiĝas la vivo. Kaj kiam aperas la vivo, aperas ankaŭ la lumo.

Memoru do la: granda principo de la vivo produktis la lumon per si mem. Kaj la lumo estigis ĉiujn ceterajn vivajn formojn en la naturo. Ĝi estas la plej granda laboranto en ĝia krea laboro.

Tial estas dirite: D i o e s t a s l u m o. Dio per si mem ne estas lumo, sed produktas lumon kaj manifestas sin en la lumo. Lia Spirito portas l a p l e n a n l u m o n.

La animo konceptas Dion kiel s e n l i m a n l u m o n s e n o m b r o j. Ĝi konceptas lian unuecon en la manifestita lumo.

Kaj tiu ĉi lumo havas diversajn gradojn de manifestiĝado. Tial la lumo, kiun ni perceptas en la fizika mondo, diferencas de la lumo, kiu agas en la spirita mondo, kiel ankaŭ de la lumo, kiu agas en la dia mondo.

Por ke oni povu percepti kaj kompreni la spiritan lumon, oni devas havi spiritan vidkapablon. Tiam antaŭ ni malkovros sin granda mondo, en kiu regas la lumo. Tiu ĉi lumo estas viva kaj inteligenta kaj ĉiuj grandaj mistikuloj, kiuj havas tiun ĉi lumon interne en si, vidas senliman mondon, tremantan

de la plej molaj kaj delikataj, plej belaj koloroj, per kiuj pleniĝas ilia animo kvazaŭ per vivaj fortoj.

Tial, por tiuj kiuj vidas, la lumo estas milfoje pli reala ol tiu ĉi mondo. La lumo, kiun la ordinara homoj perceptas, estas nur rebrilo de la lumo.

Kaj efektive, la viva lumo estas tiu natura faktoro, kiu kreas la formojn de la homa penso, de la homaj deziroj kaj sentoj. Ĝi estas la ŝelo de la homa spirito, de la homa intelekto. Sen ĝi neniu povas pensi aŭ senti. La lumo klarigas la aferojn. Ĝi igas la intelekton pensi, rezoni logike. Ĝin la intuicio perceptas senpere.

Pro tio, nenia intelekta laboro povas esti farita, nenia organika fenomeno povas ekzisti sen la ĉesto de la lumo

La grado de disvolviĝo de ĉiuj ekzistaĵoj dependas de la kvalito kaj kvanto de la lumo, kiun ili posedas.

Tiu ĉi kriterio koncernas ankaŭ la homon. Homo diferencas de alia homo per la grado de sia lumo. Pri la karaktero de homo, pri la inteligenteco, pri lia spirita alteco oni juĝas laŭ la kvalito kaj kvanto be la lumo, kiun li akceptas kaj aperigas.

Do, homon oni ekkonas laŭ la lumo de lia vivo. Kiam homo eniris en la spiritan mondon, oni ekkonas, laŭ lia lumo, de kie li venas kaj kian vivon li vivas.

Kaj se oni plenumas la volon de Dio, kiam homo eniras en la spiritan mondon, lin kaptos tia lumo, tia ĝojo, tia feliĉeco, kvazaŭ li posedus la tutan mondon. Kien ajn li rigardos, li vidados nur lumon, senfinan lumon — nenian alian objekton. En tiu ĉi kontinua lumo ekzistas neniaj ombroj. Ĝi estas brilado kontinua kaj senfina.

La manifestiĝoj de la prudenta vivo distingiĝas ĉiam per apero de lumo. Kaj ni difinas la gradon de la prudenteco laŭ la grado de la lumo. Ju pli la lumo, kiu elvenas el iu prudenta ekzistaĵo, estas pli hela kaj pli intensa, ju pli mola kaj pli delikata ĝi estas, ju pli potence ĝi lumigas kaj raciigas la vivon des, pli granda estas la prudenteco, kiun ĝi portas.

De tia vidpunkto, la lumo, kiu ekzistas en la spaco, montras, ke en la naturo ekzistas prudenteco.

Ĉiuj lumantaj korpoj, kiujn ni vidas en la spaco, estas vivaj prudentaj ekzistaĵoj, kiuj sendas sian lumon. Ankaŭ la lumo de la suno estas rezulto de multaj prudentaj ekzistaĵoj, kiuj sendas sian prudentecon en formo de lumo.

Ankaŭ la homo per si mem estas lumo. Ĉiuj bonaj homoj lumas, kaj ĉiuj malbonaj homoj, kiuj perdis la sencon de la vivo, estas mallumaj. De ili eliĝas malhela lumo.

Ĉiuj bonaj homoj havas „stelojn". Tio ĉi ne estas nur figuro, ĝi estas realaĵo. La tuta nuna vivo de la homo, ĉiuj liaj pasintaj kaj estontaj ekzistadoj dependis kaj dependos de la lumo de lia „stelo". Tiu ĉi stelo estas la trezoro de lia vivo. Tiu ĉi stelo estas la senco de lia vivo.

Kiam Kristo venis al la tero, tiu ĉi stelo venis kune kun li. Sed ĝin vidis nur tri saĝuloj en la Oriento. Kiam Kristo denove venos al la tero, lia stelo estos dekfoje pli brila ol ĝi estis antaŭ du mil jaroj. Kaj ĝi estos videbla nur por tiuj, kiuj estas pretaj akcepti la dian lumon.

Ĉar, Kristo venos kiel interna lumo en la in-

telektoj kaj en la koroj de la homoj. Tiu ĉi lumo altiros la homojn unu al la alia kaj ilin unuigos interne.

Tiuj ĉi homoj estos homoj de la lumo, homoj kun „steloj".

Tiaj homoj kun steloj estis iam la apostoloj. Kiam Kristo releviĝis aperis multaj „steloj". Tio estis tiuj ĉi langoj de flamo, pri kiuj tre malklare parolas la Evangelio. Tiuj ĉi steloj eligis tiom multe de lumo, ke fariĝis kuniĝo inter la videbla kaj nevidebla mondo, inter apostoloj kaj inteligentaj lumantaj ekzistaĵoj — loĝantoj de la ĉielo.

Kaj efektive, kiam tiu ĉi lumo kaptas iun animon, tiu ĉi lasta ne plu ŝanceliĝas, ne plu dubas. Tio estas unu el la plej altaj momentoj, kiujn homo povas travivi. En li ĝermas kaj kviete kaj kontinue brilas nobla kaj delikata sento Tiu ĉi sento estas afero subtila kaj delikata, sed ankaŭ tre intensa; ĝi posedas tian internan potencon kaj forton, ke oni fariĝas nevenkebla.

Do, se vi volas kompreni la lumon, m a r ŝ u t i e, k i e m a r ŝ a s l a l u m o. Ĉu la lumo vizitas nur reĝajn palacojn? Ne, ĝi egale vizitas purajn kaj malpurajn lokojn La manoj de la viva lumo estas malpurigitaj. Sed se la lumo, kiu staras tiel alte, malleviĝas kaj malpurigas siajn manojn per la pekoj de la homoj, kiom pli la homoj sur la tero devas fari tion!

Por la lumo ne ekzistas baroj — ĝi penetras en la plej sekretajn lokojn por ilin lumigi kaj vivigi. Tio ĉi estas granda humiliĝo. De la lumo vi devas instruiĝi pri humileco.

Se vi ne havas la humilecon de la lumo, nenio povas fariĝi el vi.

Estu kiel la lumo! La lumo iras ĉien, pasas tra ĉio, sed ĝi neniam restas tie. Eĉ ne unu parteto de la lumo restas tie, kien ĝi eniris. La lumo konstante rondiras ĉirkaŭ la mondo.

Kiel granda estas la koro de la lumo!

Marŝu sur la vojo de la lumo! Kaj la vojo de la lumo estas vojo, sur kiu estas nenia polvo.

Ankaŭ tion ne forgesu: Se super la vojo, sur kiu vi ekiris, via stelo konstante leviĝas, vi troviĝas sur la vojo de la lumo. Se super la vojo, sur kiu vi ekiris, via stelo konstante malleviĝas, vi troviĝas sur la vojo de la mallumo.

Kiam vi perdas la sencon de la vivo, serĉu tion, kio lumas. Kaj tio, kio eterne lumas kaj ne estingiĝas, estas la saĝeco.

Estu amiko de tio, kio lumas — la Saĝeco. Ĝi donos al vi sciencon. La scienco vestos vin per la plej bela vesto — la lumo. La lumo estas vesto de la scienco.

Se vi volas esti nekaptebla estu kiel la lumo! La lumo estas nekaptebla.

Se vi volas esti forta, pensu pri la lumo. La lumo estas forta kaj viva.

Amu la lumon kaj estu libera!

# La kerno de la Dia doktrino

Vi demandas min: „En kio konsistas la kerno de la dia doktrino?"

Mi diris al vi kaj mi ree diros al vi:

„La kerno de la Dia doktrino estas la Amo, la Saĝeco kaj la Vero".

Mi scias, ke vi ree demandos min: „Kaj kio ili estas?"

Aŭskultu vi, kiuj jam faris nekorekteblan eraron — vi rompis la ŝelon de la vivo por gustumi ĝian kernon, la kernon, kiun ĉiuj manĝas kaj neniam povas ĝin finmanĝi. Daŭrigu vian eraron – manĝu la kernon! Sed ne falpuŝiĝu je la ŝeloj. Kaj mi diras al vi: „Manĝu la kernon, gustumu la Veron, sed ne falpuŝiĝu je la ŝeloj — ne postulu „argumentojn".

Do, aŭdu la respondon de via demando:

Amo estas tio, sen kio ekzistas nenia vivo.

Saĝeco estas tio, sen kio ekzistas nenia movado.

Vero estas tio, sen kio ekzistas nenia lumo.

Amo estas komenco de la vivo.

Vero estas fino de la vivo. Tio estas la du limoj de la majesteco en la mondo.

Tio, kio sin movas en la mezo kaj donas formon al la aferoj estas la Dia Saĝeco.

La saĝeco ne povas labori, se ne ekzistas komenco kaj fino. Inter ili laboras la saĝeco, en la interspaco, formita de la komenco kaj de la fino, interspaco, kiun plenigas ĉiuj eternecoj, kaj ne povas tutplenigi ĝin.

En tiu ĉi interspaco movas sin la saĝeco kaj klarigas, kio estas la Amo kaj la Vero.

La saĝeco parolas:

Mi, kiu moviĝas inter la komenco kaj la fino, diras al vi:

La Amo estas la komenco de ĉiu ekzistado.

La Vero estas la ekstrema limo de la ekzistado, ĝia supera celo.

Kaj post la vero? Post la vero estas nenio. Malantaŭ la veron vi ne povas iri. Ĉiu afero, kiu estas kreita, post sia longa movado, fine haltos ĉe la vero. Ĝi povas movi sin milionojn kaj miliardojn da jaroj, sed kiam ĝi venos al la vero, ĝi haltos. Kaj tiam — aŭ ĝi konformiĝos al la leĝoj de la vero kaj vivos konforme al ili, aŭ ĝi fariĝos ventaĵo kaj polvo.

Vi parolas: „Diru la mi la veron".

La veron oni ne povas diri. Oni vivas ĝin.

La vero estas frukto de la tuteca vivo. Ĝi entenas tion, en kio Dio manifestas sin. Ĝi entenas la tutan eternecon kaj konsistas el miloj kaj milionoj da eternecoj. Ĉar ekzistaj eternecoj, kiuj havas limon. Ekzistas ankaŭ eternecoj, kiuj estas senlimaj.

Do, memoru:

Se vi per via amo ne povas trairi de la komenco al la fino — por eniri en la veron, kaj se vi per via vero ne povas iri de la fino al la komenco, vi neniam kompernos kio estas la vivo.

Vi devas ligi la komencon kun la fino. Se vi ne povas fari tion, vi povas nenion fari nek kompreni.

Kaj kio povas ligi la komencon kaj la finon? — Nur la Saĝeco.

# La Viva Naturo

La Viva Naturo en sia tuteco estas manifestiĝo de inteligentaj fortoj, de inteligentaj estaĵoj de diversaj rangoj, kiuj vivas en plenaj harmonio, unuiĝo kaj kuniĝo.

Ĉiuj ili havas unu altan celon, kiun ni nomas Dio, t. e. la senlimeco, la senfineco, en kiu ĉio ekzistas, moviĝas kaj disvolviĝas.

Evidente, sub „Viva Naturo" ni ne komprenas tion, kion komprenas la nunaj natursciencistoj. Por ni la naturo estas io granda, ne nur laŭ sia strukturo, sed ankaŭ laŭ tiu inteligenteco kaj laŭ tiu prudenteco, kiujn ĝi elmontras.

La Viva Naturo estas aro da inteligentaj ekzistaĵoj, kiuj prezentas la „atomojn" de la alta, granda mondo. La tuta spaco, en kiu ni vivas kaj moviĝas, estas plena de ekzistaĵoj de diversaj kategorioj kaj kulturoj.

Tial, kiam ni parolas pri „universo", ni supozas aron da inteligentaj ekzistaĵoj, inter kiuj la rilatoj estas absolute harmoniaj. Ĝuste tiuj ĉi ekzistaĵoj donas valoron al la tuta kosmo.

Pro tio, por la rigardo de tiuj, kiuj havas kosman konscion, la tuta kosmo, kun sia naturo estas viva estaĵo, en kiu ĉio unuiĝas.

Kaj tiu ĉi kosmo povas esti „senlima" kaj ankaŭ „limhava", kaj ankaŭ granda kaj malgranda; la eterneco havas la altan kapablon alpreni formon laŭ bontrovo.

Antaŭ la spirita rigardo de la grandaj iniciitoj de ĉiuj tempoj kaj epokoj, la tuta universo, la tiel nomata en la antikveco „makrokosmo", aperas en

formo de homo — la granda ĉiela homo. Observante la vizaĝon de tiu ĉi kosma homo, ili malkovris la analogiojn, kiuj ekzistas inter li kaj la malgranda homo — „la mikrokosmo".

Tial mi diras al vi, ke la homo, en kies korpo ĉiu ĉelo estas vigla kaj inteligenta, povas konscie komunikiĝi kun la tuta Viva Naturo.

Vi vidas la stelojn kiel malproksimajn brilajn punktojn en la ĉielo. Sed ĉiu stelo en la lakta vojo, aŭ en iu ajn galaktika sistemo, havas siajn ricevaparatojn en la homa cerbo. Oni povas percepti la vibrojn, kiuj venas de la diversaj steloj. En tiu ĉi senco mi diras, ke la homo povas interparoli kun la tuta kosmo. Se por la homoj sur la tero la steloj estas nur lumaj punktoj, por iu anĝelo ili estas tutaj mondoj kun milionoj kaj milionoj da ekzistaĵoj, kiuj loĝas en ili. En ili vibras milionoj da estaĵoj, kiuj havas kulturon pli altan ol la homa.

Do, memoru: Tion, kio estas manifestita, ni nomas prudenta Viva Naturo. Kaj tion, kio ankoraŭ ne estas manifestita, ni nomas idea animo de la ekzistado. La idea, la eterna, la sankta, la manifestita — tio estas Dio. Tio ĉi, tamen, estas nur figuro. Sed multaj estas tiom forlogitaj de tiu ĉi figuro, ke ili asertas, ke Naturo kaj Dio estas la sama afero. Sed se Naturo kaj Dio estas la sama afero, tiam Dio estus limigita estaĵo.

Nur unu aferon ni scias certe: la Naturo estas tio, kio estas manifestita, kaj Dio estas tio, kio estas manifestita kaj senlima, kio eterne manifestas sin kaj restas ĉiam nemanifestita.

La ordinaraj homoj, kiuj vidas nur malgrandan parton de la mondo, pensas, ke la naturo estas io

meĥanika, senprudenta, en kiu regas la hazardo. Evidente, ili projekcias sin mem en la Naturon.

En efektiveco, en la naturo ekzistas nenio hazarda, nenio arbitra. En ĝi ĉio konstruiĝas kaj aranĝiĝas laŭ la leĝoj de la senŝanĝa Dia matematiko. Tial, ĉiuj ĝiaj agoj estas severe kaj prudente difinitaj.

La prudenteco de la Viva Naturo estas ĉie klare videbla. Kiun ajn organismon ni ekzamenus, esplorinte profunde kaj detale ĝiajn funkciojn en iliaj reguleco kaj celkonformeco, ni konvinkiĝos pri la alta inteligenteco de la Naturo, kiu ĉion direktas.

Kompreneble, estas necesaj subtila kaj penetranta intelekto, bone disvolviĝintaj kapabloj kaj talento por subtila kaj detala observado, por kompreni la subtilaĵojn de la inteligenteco, kiu manifestas sin en la Naturo.

La Viva Naturo havas sian lingvon, kaj se oni volas kompreni ĝin bone, oni devas peni lerni tiun ĉi lingvon.

La Naturo ĉiam servas al si per figuroj. Ĝi ĉiam parolas per bildoj kaj simboloj. Ĝia lingvo ne estas kiel la lingvo de la nunaj homoj— sekaj ideoj, nudaj logikaj formoj de la analiza intelekto. Ĝia lingvo estas viva, plena de bildoj kaj simboloj, lingvo de la granda kaj bela diverseco.

Ĝenerale la Naturo ne toleras unuformecon kaj ripetadon. Ĝi ŝatas diversecon en progresanta kaj leviĝanta direkto.

Tial, kiam oni volas redukti ĉion en la vivo al meĥanika unuformeco, oni faras malbonon. Kreante laŭ la leĝoj de la diverseco kaj harmonio, kiel la Naturo, oni faras bonon.

La Viva Naturo ŝatas diversecon kaj abundecon,

sed ĝi ne toleras superfluaĵon. Se ĝiaj energioj ne estas prudente utiligataj, se ili éstas haltigataj en ilia konstanta irado kaj transformiĝado, se ili estas limigataj en la fermita cirklo de la unuformeco, ĝi tuj reagas La Naturo ne ŝatas la senmovecon. En ĝi ekzistas eterna movado, eterna kreado, kiu estas reguligata de prudentaj leĝoj. En tiuj ĉi leĝoj estas rimarkata certa konstanta ritmo, certa periodeco, kiu kaŝiĝas prufunde, en la esenco mem de la ekzistado, en la leĝoj de ĝia manifestiĝado.

Sur tiu ĉi kosma ritmo bazas sin tiuj du grandaj procesoj en la Viva Naturo — la involucio, ĉe kiu ni konstatas movadon de la centro al la periferio, kaj evoluo, en kiu la vivo movas sin de la periferio al la centro.

En tiuj ĉi du procesoj vekiĝas tiu energio, kiu estas necesa por la kreo de ĉiuj kondiĉoj, ĉe kiuj povas manifesti sin la kosma vivo.

Ekzistas du grandaj fluoj — unu de la infinito, konstante malgrandiĝanta kaj malsupreniĝanta, al la infinitezimo, al la ĉelo. La alia, kiu konstante kreskas — de la infinitezimo, de la ĉelo, al la plej granda, al la infinito.

Kaj kiam tiuj ĉi du kosmaj fluoj renkontas sin en la homo, naskiĝas la grandaj kapabloj kaj virtoj de la homa animo.

La Viva Naturo ampleksas, per sia aŭro, ĉion en la mondo. Ĝi estas hela, pura, prudenta kaj bona.

La Viva Naturo enmetis ĉion en la homo kaj ĉiumomente ĝi helpas al li kulturi la ĝermojn plantitajn en lia animo. Kiel zorgema patrino, ĝi ĉiumomente konservas vigla lian konscion, atentigante lin, en diversaj manieroj kaj vojoj, pri ĉio, kio fariĝas ĉirkaŭ li.

Kaj la nuntempaj homoj erare opinias, ke ili povas konkeri la Naturon. Se ili efektive povus tion fari, la tuta tero detruiĝus kaj sur ĝi restus nenia viva ekzistaĵo. La Viva Naturo, tamen, ne lasas sin konkeri. La sola afero, kiun ĝi permesas, estas jungi ĝiajn fortojn al laboro. Sed nur prudenta homo, kiu agas konforme al ĝiaj leĝoj, povas efektive jungi ĝiajn energiojn al laboro. Ĉiu, kiu ne agas konforme al ĝiaj leĝoj, estas detruata.

Kaj la sperto montras, ke ĉiuj tiuj, kiuj fantaziis regi la naturon, sin trovis enterigitaj sub la polvo de siaj iluzioj. Homoj, kiuj pensas, ke ili devas batali kontraŭ la naturo por ĝin konkeri, ĉiam kiam ili venas al la supro de sia entrepreno, vidas sin kruele trompitaj en siaj esperoj. En la lasta momento la Naturo ĉiam senigas ilin de la frukto de iliaj laboroj, kaj lasas ilin pensi kaj labori por korekti ĉiujn siajn pekojn kaj erarojn.

Oni ne devas batali kontraŭ la Naturo, ĉar oni ĉiam estos venkita. Kaj ĉu vi scias en kio konsistas la malsukceso? En la morto. La kaŭzo de la morto de la homoj kuŝas en tio, ke ili trovas sin en konstanta batalo kontraŭ la viva, prudenta Naturo, kiun ili vane penas konkeri.

Ĉar, memoru, la Naturo ne facile pardonas. Vi povas penti dekfoje, kaj tamen viaj pekoj povas resti nepardonitaj. La Naturo pardonas al la homo nur kiam li agas konforme al ĝiaj leĝoj, al la volo de Dio. Kaj ne en ekstera meĥanika maniero, sed konscie.

De profunde konsiderate, ĉiuj, kiuj penas konkeri la Naturon, ĉiuj kiuj batalas kontraŭ ĝi, kiuj kontraŭstaras al ĝi, sin trovas ekstere de ĝi. Mi parolas ale-

gorie. La Naturo estas ŝlosista por ili, ĝi restas por ili ŝlosita mondo. Ĉu vi scias kiaj belecoj estas en tiu ĉi mondo, kiaj ekzistaĵoj loĝas en ĝi!

La homoj, kiuj nun rampas sur la tero, povas esti nomataj „sensukcesaj lernantoj" de la naturo, malliberuloj. En tiu ĉi senco de la vorto ili efektive restas ekstere de ĝi.

Kaj por tiuj ĉi homoj la Naturo havas siajn „institaciojn por korektado". Kaj ĝi ofte venas tien kun sia vergo.

Sed por la prudentaj homoj la Viva Naturo estas mondo bele ornamita. Mondo de harmonio, muziko kaj beleco.

Kaj kiam iun tagon la okuloj de la homoj malfermiĝos, ili aŭdos ĉie en la mondo la majestan muzikon de la Naturo. Ekzistas speciala muziko en la Viva Naturo. Ĉar ĝi ne ĉiam kantas. Ankaŭ ĝi silentas iafoje. En ĝiaj internoj regas tiam nepriskribebla silento. Sed ankaŭ tiu ĉi silento havas sian altan, internan signifon — profunde en ĝiaj internoj ĝermas nova granda ideo, kaj ĝis tiu ĉi ideo formiĝas kaj naskiĝas, la Granda Naturo silentas.

Kiam la ideo naskiĝis, ĝi denove komencas sian kanton.

Kaj se vi vivas vivon konscian, se via animo estas inteligenta kaj havas inklinon ami ĉiujn vivajn ekzistaĵojn, vi perceptos la dian muzikon de la Naturo, kaj ĝi disfluiĝos kiel mistika tremo tra via tuta esenco. Per tiu ĉi muziko estos komunikitaj al vi la pensoj de ĉiuj inteligentaj ekzistaĵoj. La vivo de ĉiuj inteligentaj ekzistaĵoj en la Viva Naturo estos komunikita al vi per rapideco pli granda ol tiu de la lumo, kaj vi sentos vin kiel civitano de ĝia granda regno.

# La Granda Universala Frataro

Ekzistas sur la tero unu loĝio da scienculoj, kiuj kunvenas nur unu fojon en la jaro por pridiskuti diversajn sciencajn problemojn. Tiuj inicitaj homoj scias pli multe pri la tero, pri ĝiaj pasinteco kaj estanteco, ol ĉiuj nunaj scienculoj, reprezentantoj de la oficiala scienco. Koncerne la estontecon de la tero, ankaŭ ili ne konas ĝin precize, ankaŭ ili bazas sin sur supozoj.

Krom tiu ĉi loĝio da inicitoj sur la tero, ekzistas sur la suno alia loĝio da grandaj inicitoj, kiuj konas pozitive ne nur la pasintecon de nia planedo, sed ankaŭ ĝian estontecon.

Sed ambaŭ loĝioj estas nur organoj de tiu granda universala organismo de perfektaj, alte progresintaj estaĵoj, kiuj formas la Grandan Universalan Frataron.

Tiuj ĉi perfektaj estaĵoj estas senkompare pli progresintaj eĉ de la plej geniaj homoj sur la tero. Ĉar ili eliris multe pli frue ol la homoj el la Unua Principo. Ĉiuj ili pasis certan vojon de evoluo sub la gvidado de la Dia Spirito kaj atingis tiun ĉi gradon de disvolviĝo, en kiu ili nun troviĝas.

Kaj kiam ni parolas pri la Granda Universala Frataro, ni subkomprenas tiun hierarĥion de prudentaj estaĵoj, kiuj finis sian evoluon milionojn kaj miliardojn da jaroj antaŭ la homoj, kaj kiuj nun direktas la tutan kosmon. Ili ĝin direktas, ĉar ili mem partoprenis en ĝia kreado sub la senpera gvidado de la granda Spirito de Dio.

Kaj konsiderante la saĝan aranĝon de la tuta universo, kun ĉiuj ĝiaj galaktikaj sistemoj, kun ĉiuj

ĝiaj sennombraj sunoj kaj planedoj, konsiderante eĉ nur tiun altan meĥanikan kaj teknikan perfektecon, per kiu estas konstruita la tero, oni povas juĝi kiajn potencajn intelekton kaj penson, kiajn potencajn spiriton kaj volon havas tiuj ĉi geniaj kreantoj, kiuj laboris por la realigo de la dia plano en la universo.

Laŭ la grado de la scienco kaj de la gisvolviĝo kaj laŭ la ofico, kiun ili plenumas, tiuj ĉi estaĵoj estas ordigitaj en hierarĥia ŝtuparo, en organikaj rangoj, kiuj estas konataj sub la nomoj: serafoj — fratoj de la amo; keruboj — fratoj de la harmonio; tronoj — fratoj de la volo; sinjoroj — fratoj de la inteligenteco kaj ĝojo; fortoj — fratoj de la movado kaj kreskado; aŭtoritatoj — fratoj de la eksteraj formoj kaj de la artoj; estroj — fratoj de la tempo, stato kaj takto; arĥanĝeloj — fratoj de la fajro kaj varmo; anĝeloj — portantoj de la vivo kaj de la vegetaĵoj. La lastan dekan rangon okupas la progresintaj homaj animoj.

Ili ĉiuj kune prezentas la grandan kosman Homon.

La laboro de tiuj ĉi estaĵoj estas tiel harmonie distribuita, ke ĉiuj el ili scias kion, kiel kaj kiam labori. Ili direktas la funkciojn de la granda universala organismo, kiu entenas en si ĉiujn sunsistemojn.

Niaopinie, ekzistas tri specoj da sunsistemoj. La unuaj el ili, kiuj estas organoj de tutaj stelaj universoj, formas la materian, fizikan mondon, teksitan el la plej densa materio, kvankam ankaŭ tiu ĉi lasta havas diversajn gradojn.

La duaj estas faritaj el pli delikata materio, el la materio de la spirita mondo kaj apartenas al la anĝela mondo.

La tria speco sunsistemoj formas en sia tutaĵo la dian mondon kaj estas faritaj el la plej subtila, plej delikata materio.

Kaj la ĉielo, pri kiu parolas la sanktaj skriboj, ne estas tiu ĉi blua arkaĵo, malantaŭ kiu perdiĝas la universa spaco, kaj sur kiu nokte brilas la steloj. La ĉielo estas organizita de altaj estaĵoj, de grandaj animoj, tial ĝi estas granda en ĉiuj siaj faroj. La anĝeloj, kiuj loĝas en „la ĉielo", estas grandaj animoj, kiuj konstante sendas sian lumon al la tuta mondo. La energio de ilia potenca penso estas distribuata en la tuta kosmo kaj movas, kiel kolektiva forto, ĉion en la mondo.

Ne pensu, ke la anĝeloj estas iaj nemateriaj ekzistaĵoj, iaj fantomaj „spiritoj". Ili estas ekzistaĵoj, kies korpoj estas alte organizitaj, formitaj de pura radianta materio. Kaj anĝelo povas ĝis tia grado regi sian korpon, ke li povas fari sin videbla, aŭ nevidebla. Li povas libere travojaĝi la tutan senliman spacon kun rapideco multe pli granda ol tiu de la lumo; li povas tramigri tutajn sunsistemojn, tutajn stelajn universojn.

Ankaŭ la anĝeloj sin trovas en diversaj gradoj de disvolviĝo, sed ili estas, ĝenerale, dividataj en du grandajn regnojn. Tiuj de la pli alta regno malofte venas al la tero, dum la apartenantaj al la pli malalta venas pli ofte por helpi la spiritan leviĝon de la homoj. Ĉiuj grandaj fratoj de la homaro devenis de la homa raso, sed ili finis sian disvolviĝon miliardojn da jaroj antaŭ la tera homo, en kondiĉoj multe pli favoraj, kiujn ili prudente utiligis.

Kaj se la vivo de la homaro disvolviĝas laŭ certa plano, se sur la tero floras kulturoj kun iliaj sciencoj, religioj kaj artoj, se la homoj havas eternan

celadon al disvolviĝo kaj perfekteco, tion ni ŝuldas al tiuj ĉi inteligentaj estaĵoj, kiuj estas intime ligitaj kun la homoj kaj konstante laboras kaj zorgas pri ili. De iliaj koroj ŝprucas amo, ĝojo kaj vivo. Kaj danke al tiu ĉi ilia impulso la homoj vivas kaj aspiras. Ilia deziro estas, ke la homaro akiru tiun lumon, kiun ili havas, tiun liberecon, kiun ili ĝuas. Ili volas instrui la homojn vivi konforme al tiuj grandaj leĝoj, laŭ kiuj ili vivas. Kaj ili aplikas la plej saĝajn legojn en la mondo. Ili vivas la plej puran kaj altan vivon, vivon de absoluta senprofitemo.

En sia alta sinoferemo tiuj ĉi amantaj servantoj de Dio propravole malsupreniras al la tero en homa formo, por helpi al la homoj. Iil konstante sendas, en tia aŭ alia formo, siajn senditojn al la tero. Ĉiuj genioj de la homaro, ĉiuj grandaj homoj, ĉiuj sanktuloj kaj adeptoj, ĉiuj scienculoj, verkistoj, ŝtatistoj, kiuj kontribuas al la disvolviĝo de la homaro en tiu aŭ alia direkto, ĉiuj estas servantoj de la Granda Universala Frataro. Ĝi elektas el la homaro la plej progresintajn animojn kaj preparas ilin por spirita laboro inter iliaj fratoj. En la nuna homaro estas homoj, kiuj havas pli subtilajn spiritajn fortojn, kiuj havas pli delikatan strukturon. Ili distingiĝas per alte organizitaj, plastikaj korpoj, ĉar ili vivas vivon absolute puran kaj sanktan. Ĝuste ilia eksterordinara disvolviĝo faras ilin kapablaj esti spiritaj helpantoj de la homaro. La plej progresintaj inter ili jam finis sian evoluon sur la tero kaj havas multegon da scioj. Ili scias multon de tiu pozitiva dia scienco, kiu ekzistas jam de post la kreo de la mondo. Multaj el ili loĝas sur la tero milojn da jaroj. Ĉar ili pasis tra la proceso de la releviĝo, por ili ekzistas nek morto nek

releviĝo. Tiuj ĉi homoj, nomataj „Filoj de Dio“, en kies spiritoj kaj animoj loĝas Dio, kiuj estas ligitaj kun ĉiuj inteligentaj kaj progresintaj estaĵoj en ĉiuj sunsistemoj, estas ĝuste tiuj ĉi grandaj animoj — genioj, majstroj de la homaro, kiuj manifestis sin en la plej perfekta maniero en penso kaj verko — en religio, muziko, poezio, sciencoj, arto — en ĉiuj direktoj. Ili estas tiuj potencaj spiritoj, kiuj kaŝe aŭ malkaŝe por ni, puŝas la homaron antaŭen. Malantaŭ ĉiu spirita laboro sur la tero, malantaŭ ĉiu spirita manifestiĝo kaŝas sin tiuj ĉi fratoj. Malantaŭ ĉiu granda homo, malantaŭ ĉiu granda poeto, muzikisto kaj pentristo, kaŝas sin ĉiam ili.

Ĉar, por ke iu genia homo manifestu sin sur la tero, estas necese, ke miloj da geniaj animoj unuiĝu en unu tuton kaj manifestu sin per li.

Por la manifestiĝo de unu Majstro estas necese, ke ĉiuj inteligentaj animoj unuiĝu en li.

Kio estas Kristo? — Kristo estas kolektiva spirito. Kristo ekzistas kiel unuo, sed samtempe li estas kolektiva spirito. Li estas aro da ĉiuj Filoj de Dio, el kies koroj kaj animoj ŝprucas amo kaj vivo. Ĉiuj Filoj de Dio, kunigitaj en unu, ĉiuj tiuj inteligentaj animoj, kiuj vivas en la dia unueco — tio estas Kristo. En tiu ĉi senco li estas ĉefo de la Granda Universala Frataro.

Kaj la stelo, pri kiu parolas la Evangelio, ke ĝi aperis ĉe la naskiĝo de Kristo, ĝi estis io viva: ĝi reprezentis aron da vivaj estaĵoj, venintaj de supre por anonci la venon de Kristo. Sed nur la tri saĝuloj de la Oriento — grandaj inicitoj, vidis kaj ekkonis tiun ĉi stelon. Kaj tiuj ĉi tri saĝuloj estis ankaŭ servantoj de la Granda Universala Frataro.

Tiuj membroj de la Granda Universala Frataro, kiuj direktas la disvolviĝon de la homaro kaj gvidas ĝin al brila estonteco, formas nenian videblan por la homoj societon aŭ organizaĵon. Ili formas vivan kolektivon, harmonian unuiĝon, ekzistanta ekster la malvirtaj cirkonstancoj, en kiuj vivas la homoj. Tial estas ridinde aserti, ke la sidejo de la Frataro estas tie aŭ ĉi tie, inter tiu aŭ ĉi tiu popolo.

Ĉiuj tiuj grandaj fratoj, kiuj laboras en la spiritaj sferoj de la tero, estas aranĝitaj en sep hierarĥioj, en sep kategorioj. Unuj el ili apartenas al la amo kaj estas nomataj „Fratoj de la Amo". Aliaj apartenas al la Saĝeco kaj estas nomataj „Fratoj de la Saĝeco". Ili subtenas sciencojn kaj artojn kaj donas sciojn al la homaro. Triaj estas nomataj „Fratoj de la Vero". Ili enportas la liberecon en la homajn intelektojn kaj korojn. Ili enportas tiun liberecon, kiu faras la homan spiriton, la homan animon, la homajn intelekton kaj koron liberaj — liberaj en la plena senco de la vorto. Aliaj estas nomataj „Fratoj de la Justeco" — ili donas Justecon al la homaro kaj operacias per tiuj nevideblaj bonoj, kiujn bezonas la nuntempaj homoj. Kvinaj estas nomataj „Fratoj de la Virto", sesaj — „Fratoj de la Beleco", kaj fine venas tiuj, kiuj estas nomataj „Jehovaistoj".

Tio, tamen, ne estas la efektivaj nomoj de tiuj fratoj. Mi ne elparolas ilin, ĉar ili estas sanktaj.

Tiuj ĉi fratoj ne estas tiel ordinaraj, kiel oni opinias. Ĉiu el ili povas levi la teron per sia mano kaj ĵeti ĝin kiel pilkon en la spacon. Mi parolas metafore. Kaj ili povas fari tion, ĉar malantaŭ ili staras io ankoraŭ pli potenca, ankoraŭ pli granda, al kio ili servas.

Kaj kiam iu pensas, ke li povas kontraŭstari al tiuj ĉi fratoj, li ne komprenas la profundan sencon de la ideo „Blanka Frato". Se temas pri forto, tiuj ĉi fratoj disponas per la plej potenca forto. Kaj ili konas tiel bone la leĝojn de la homa penso, ke ili povas en unu tago endormigi la tutan homaron.

Kion prezentas eĉ la plej potencaj nuntempaj pafilegoj en komparo kun la forto de tiuj ĉi grandaj fratoj Sed ili ne volas uzi krudajn rimedojn — ili lasas la homojn suferi, ĉar nur la suferado estas kapabla ilin nobligi kaj reĝustigi. Kaj oni komprenos iun tagon, ke en la mondo estas unu granda regno de justeco, kies civitanoj — la grandaj filoj de Dio—estas la plej inteligentaj estaĵoj, kiuj vivas laŭ la leĝo de Dio, kaj plenumas lian volon. Ne restos popolo sur la tero, kiu ne sentus la forton kaj la potencon de tiu ĉi regno de justeco,

Kaj se oni hodiaŭ ne iras laŭ la ĝusta vojo, la kaŭzo estas, ke kontraŭe al la Granda Blanka Frataro funkcias loĝio da inteligentaj estaĵoj, kiuj ne komprenis la profundan sencon de la vivo, kaj havas konceptojn rekte kontraŭajn. Ili formas la tiel nomatan Nigran Frataron. La Nigra Frataro estas hierarĥio da estaĵoj, kiuj, depende de sia inteligenteco, okupas diversajn rangojn. Por klare prezenti ilian funkcion, mi diros, ke dum la Blanka Frataro laboras en la branĉoj kaj en la floroj de la vivo, la Nigra Frataro laboras en la radikoj de la vivo. Dum la Blanka Frataro laboras en la kapo kaj en la brusto de la Kosma Homo, la Nigra Frataro laboras en la stomako, en la hepato kaj en la intestoj. Do, la Blanka Frataro estas ligita kun la pozitivaj energioj, kun la bono, kaj la Nigra Frataro estas ligita kun la negativaj energioj, kun la malbono

en la plej larĝa senco de la vorto. Ambaŭ energioj, tamen, estas nun necesaj al ni por la funkcioj de la vivo. Iliaj oficoj estas severe dispartigitaj inter ili.

Krom tiuj ĉi du skoloj, ekzistas tria skolo — la skolo de la Grandaj Fratoj, kiuj apartenas al pli alta hierarĥio, kaj direktas la laboron de la aliaj du. Ili uzas por siaj grandaj celoj la metodojn de ambaŭ, sed ili apartenas al neniu el la du skoloj. Ili estas tiuj Grandaj Majstroj de la Universala Frataro, kiuj regas la tutan kosmon kaj kiuj post la kompletiĝo de ĉiu evoluo, kreas novajn evoluajn ondojn, irantajn laŭ alia plano kaj alia ritmo.

Sub la gvidado de ilia potenca spirito, iam malsupreniris de la altaj suproj de la ekzistado tiuj superaj spiritoj, kiuj kreis la sunsistemojn — inklizive nian. Ili kreis kaj aranĝis la primitivan „kosman" teron, la iaman „paradizon". Sur tiu ĉi „kosma tero" ankoraŭ nun loĝas tiuj perfektaj prahomoj, kiuj kompletigis sian disvolviĝon. Ili estas la Grandaj Antaŭuloj de la homaro.

Tiuj ĉi kreantoj de la pasinteco, tiuj ĉi grandaj antaŭuloj, ankaŭ nun malsupreniras sur nian teron. Kaj ili transformos ĝin en paradizon. Kun ili venos ankaŭ tiuj 144,000 homoj, pri kiuj parolas la Apokalipso, kaj inter kiuj estas reprezentantoj de ĉiuj popoloj de la pasinteco kaj estanteco. Venos ĉiuj sanktuloj, adeptoj kaj Majstroj de la pratempo. Ili ekfunkciigos per sia potenca spirito ĉiujn vekiĝintajn animojn de la kvar randoj de la tero kaj ĉiuj kune enkondukos verajn ordon kaj regulecon en la mondon. Post la fino de ilia tasko ili retiriĝos kaj lasos la homojn vivi kaj labori en novaj kondiĉoj.

Tiamaniere estos restarigita la komunikiĝo inter

la videbla kaj nevidebla mondoj. Tiamaniere laboris, laboras kaj laboros la Granda Universala Frataro.

Kaj ĝi laboros ĝis kiam la sola Amo, la sola Saĝeco, kaj la sola Vero ampleksos la tutan ekzistadon.

Tiam ĉiu spiro glorados Dion en sanktaj paco kaj harmonio.

# Kvar aferoj

Ekzistas kvar aferoj, kiujn la homo devas konstante memori:

Dio kreis la teron, por ke la homoj estu bonaj.

Dio kreis la akvon, por ke la homoj estu puraj.

Dio kreis la aeron, por ke la homoj pensu ĝuste.

Dio kreis la lumon, por ke la homoj iru la ĝustan vojon.

Per kvar vojoj venas la homo al la vera vivo: per la vojo de la tero, per la vojo de la akvo, per la vojo de la aero kaj per la vojo de la lumo.

Oni ne povas veni al la vera vivo, se oni ne estas bona. Vidiros: „Kiamaniere esti bona?—Farante bonon?"

—La bono ne estas farebla. Oni devas iri la vojon de la bono. Iri ĝin ĉiam.

Oni ne povas veni al la vera vivo, se oni ne estas pura. La akvo faros nin puraj. La akvo, kiu estas bona kondukilo de la vivo.

Kaj spirante aeron, oni lernos pensi ĝuste.

Irante la vojon de la lumo, oni lernos legi la grandan libron de Dio.

Tial, ne estas sufiĉe por la homo nur iri. Li devas ankaŭ scii legi. Scii kion portas al li la lumo.

La lumo — ĝi estas letero, sendita de Dio.

Oni rigardas la mondon, sed oni nenion komprenas.

Ĝi estas letero! Estas en ĝi legataĵo por ĉiu tago. Kaj se oni ne legas, oni restas malklera.

Progresinta animo estas animo, kiu estas bona. Ĝi scias, kial estas kreita la tero. Progresinta animo estas animo, kiu estas pura. Ĝi scias kial estas kreita la akvo. Progresinta animo estas animo, kiu pensas ĝuste. Ĝi scias kial estas kreita la aero. Progresinta animo estas tiu animo, kiu iras la ĝustan vojon. Ĝi scias kial estas kreita la lumo.

Kaj se la homoj estas malbonaj, tio estas ĉar ili ne scias kial estas kreita la tero. Ili estas malbonaj, ĉar ili ne scias kial estas kreita la akvo. Ili estas malbonaj ĉar ili ne scias kial estas kreita la aero. Ili estas malbonaj ĉar ili ne scias kial estas kreita la lumo.

Ili loĝas sur la tero kaj ili ne estas bonaj!
Ili trinkas akvon kaj ili ne estas puraj!
Ili spiras aeron kaj ili ne pensas ĝuste!
Ili havas lumon kaj ili ne iras la ĝustan vojon!

Kaj tiam oni demandas: „Kial Dio kreis la mondon?“ aŭ „Kion ni devas fari?“

Se iu demandas vin tiamaniere, diru al li: „Estu bona!“ — Kaj poste? — „Estu pura!“ — Kaj post tio? — „Pensu ĝuste!“ — Kaj fine: „Iru la ĝustan vojon kaj lernu legi!“

Se vi estas bona, la tero apartenas al vi.
Se vi estas pura, la akvo apartenas al vi.
Se vi pensas ĝuste, la aero apartenas al vi.
Se vi iras la ĝustan vojon, la lumo apartenas al vi.

Kaj mi demandas, ĉu oni povas esti malriĉa, kiam oni posedas ĉiujn tiujn ĉi aferojn?

La tero restos nur por la bonaj homoj. La malbonaj homoj laciĝos kaj konsumiĝos. Ili povos utiligi nek la teron, nek la akvon, nek la aeron, nek la

lumon. Kaj efektive, ĉu homo malsana kaj kaduka povas labori?

Labori povas nur homo bona, homo pura, homo, kiu pensas ĝuste kaj kiu iras la ĝustan vojon.

Kaj nun ankoraŭ la malbonaj homoj regas la teron. Sed ankaŭ tio havos sian finon. Estis tempo, kiam la bestoj posedis kaj regis ĝin. Nun regas ĝin la homo-besto. Sed venas la tempo, kaj venis jam, kiam „la humilaj heredos la teron“ kaj regos ĝin.

Vera homo estas la bona homo. Kaj bona homo, pura homo, homo, kiu pensas ĝuste kaj iras la ĝustan vojon, estas la forta homo. Li estas la homo naskita de Dio. Kaj ĉu homo, kiu naskiĝis de Dio kaj kiu vivas en Li, povas esti malforta?

Oni devas esti naskita de Dio. Ne nur kredi en Li. La kredo estas nur vojo al la Amo. Kaj la Amo estas interna ligo kun tiu, kiu vin naskis.

Se vi volas fariĝi forta — servu al Dio! Per servado al Dio oni akiras forton en la vivo. Nur tiamaniere vi povas fariĝi efektive forta homo en la mondo.

Oni demandas; „Ĉu ekzistas Dio, aŭ ne ekzistas?“ Dum vi manĝas panon, ekzistas Dio. Dio estas en la pano. Dum vi trinkas akvon, ekzistas Dio. Dio estas en la akvo. Dum vi spiras aeron, ekzistas Dio. Dio estas en la aero. Dum vi vidas la lumon, ekzistas Dio. Dio estas en la lumo.

Kaj se vi ne kredas en la diaĵo, kiu kaŝas sin en tiuj ĉi aferoj, kun kiuj vi estas ligitaj, kiel vi povas trovi Dion aliloke?

Memoru: Se vi serĉas Dion ekstere, vi trovos la teron. Se vi serĉas Dion ekstere, vi trovos la akvon, la aeron, la lumon. Kaj se vi ne manĝas la panon, kiun la tero donas al vi, morto atendas vin!

Se vi ne trinkos akvon, vi mortos de soifo.

Se vi ne spiros aeron, vi sufokiĝos.

Se vi ne perceptas la lumon, vi restos blinda kaj vi falpuŝiĝados ĉe ĉiu paŝo en la vivo.

Iuj homoj plendas, ke iliaj fratoj ne akceptas ilin. Sciu tamen, ke estas sur la tero fratoj, kiu reprezentas la bonon. Se vi ne estas bonaj, ili ne akceptos vin. Ekzistas fratoj, kiu reprezentas la purecon. Se vi ne estas puraj, ili ne akceptos vin. Ekzistas fratoj de la ĝusta penso. Se vi ne pensas ĝuste, ili ne akceptos vin. Ekzistas fratoj de la lumo. Se vi ne komprenas la lumon, se vi ne lernas, ankaŭ ili ne akceptos vin.

Tial mi diras: „Fariĝu bona, kaj oni vin akceptos. Fariĝu pura, kaj oni vin akceptos. Komencu pensi ĝuste, kaj oni vin akceptos. Komencu lerni, kaj oni vin akceptos. Kiu ne akceptas riĉan homon, kies monujo estas plena? Sed kiu petas almozon, ricevas tie kaj ĉi tie pecon da pano, kaj fine oni lin forpelas.

Ne demandu ĉu la homoj estas bonaj. Grave estas, ke vi estu bona. Grave estas, ĉu la faroj de Dio estas bonaj, ĉu tio, kion Dio kreis, estas bona. Kaj ĝi estas bona.

Ne demandu, ĉu la homoj estas puraj. Grave estas, ke vi estu pura. Grave estas, ke estu pura tio, kion Dio kreis — la akvo. Mi parolas pri la viva tero, pri la viva akvo — ne pri la ordinaraj tero kaj akvo.

Ne demandu, ĉu la homoj pensas ĝuste. Grave estas, ĉu la aero, kiun vi spiras, povas manifesti la penson de Dio.

Ne demandu, ĉu oni iras la ĝustan vojon. Grave estas, ke vi iru en lumo la ĝustan vojon.

Ĉar, ni vivas kaj movas nin en Dio. Li konstante observas nin. Li sekrete nin observas, kiom ni

estas bonaj, kiom ni estas puraj, kiom ni pensas ĝuste kaj kiom ni iras la ĝustan vojon. Ekzistas nenio kaŝita por lia okulo, sed Li ĉiam silentas. Kaj kiam Dio silentas, Li donas al ni suferojn. Kiam Dio parolas, li donas al ni ĝojojn. Kiam vi suferas, Dio silentas, kaj kiam vi ĝojas, Dio parolas.

Kiu volas servi al Dio, kiu volas lin vidi sur la tero, devas, manĝante la panon, scii, ke li trovas sin antaŭ Li. Sankta trema sento devas kapti lin — ke la pano venis al lia manĝotablo.

Nur **bona** homo rajtas manĝi. Nur **pura** homo rajtas trinki akvon. Nur tiu, **kiu pensas**, rajtas spiri aeron. Nur tiu, **kiu iras la ĝustan vojon**, rajtas ĝui la lumon,

Ĝuante tiujn ĉi aferojn, li konstatos, ke ĉio, kion Dio faris, estas bona, kaj lia animo pleniĝos de ĝojo.

Kaj kiam animo de homo pleniĝas de ĝojo, li jam komprenas Dion, li komunikiĝas kun Li.

La vekiĝintaj animoj devas labori kaj fidi Dion, ke Li benos ilian bonon sur la tero, sur kiu ili loĝas. Ili trinku akvon kaj sciu, ke Dio donos al ili tiun purecon, kiu estas kaŝita en **la viva akvo**. Ĉar la ordinara akvo estas nur vesto de la viva akvo.

Ni venis al la tero por manifesti la konvinkon, ke **Dio estas ĉiam favorkora kaj bona**, kaj ke ni devas esti kiel Li. **Ke Li estas pura kaj sankta**, kaj ke ni devas esti kiel Li. **Ke Li ĉiam pensas ĝuste**, kaj ke ni devas pensi kiel Li. Ke Li konstante manifestas sin per **la lumo**, por ke ni iru la ĝustan vojon.

**Estu bonaj, estu puraj, pensu ĝuste, iru la ĝustan vojon, lernu la diajn vojojn kaj vi havos la benon de Dio.**

# Majstro

Ekzistas unu Majstro en la mondo.

Unu estas la Majstro, kiu donas la veran sciencon. Li havas multajn manifestiĝojn en la vivo, sed esence li estas nur unu. Se oni trovas unu el la momentoj de lia manifestiĝo, oni trovas samtempe ankaŭ sin mem.

Ĝi estas leĝo — trovinte la solan Majston, trovinte Dion, vi trovos ankaŭ vin mem. Vidante Dion, vi vidos ankaŭ vin mem. Kaj vidi Dion, vidi sin mem, ĝi estas la plej sankta momento en la vivo de homo. Nome por tiu ĉi momento oni vivas.

Nur Dio povas esti Majstro en la mondo. Kaj kiam Kristo diras al siaj disĉiploj: „Unu estas via Patro", li subkomprenas la grandan solan Majstron.

La majstro — tio estas la patro. Dio transformas sin en Patron kaj tiam nia rilato al ni estas rilato laŭ la leĝo de la saĝeco.

Jen kial, sub Majstro, en la universala senco de la vorto, ni komprenas la altan Dian Saĝecon, kiu donas la veran sciencon al la mondo, kiu enportas ĉiujn novajn ideojn, ĉiujn novajn formojn, ĉiujn novajn sentojn kaj impulsojn en la vivo.

Memoru, do: Unu estas la granda Majstro de la mondo, malgraŭ ke estas multaj liaj manifestiĝoj.

Ĉar mi diris al vi kaj ree mi diras al vi: Unu estas la scienco, unu estas la lumo. Sed scienco ne venas de unu loko kaj lumo ne eniras tra unu fenestro.

Sennombraj estas la vojoj de la scienco, sennobraj estas la fenestroj de la lumo.

Ĉiu, kiu estas komisiita anonci la veron al la homoj, ne parolas de sia nomo. Li parolas de la nomo de la sola Majstro. Tial Kristo diras. „Mi venis al la mondo ne por fari mian volon, sed la volon de Tiu, kiu min sendis."

Ĉiu vera Majstro, ĉiu Sanktoleito de Dio, estas sendita kun speciala misio al la tero. Kaj kiel la homaj leĝoj, kiuj finfine estas rebrilo de la leĝoj en la spirita mondo, postulas de la ordinaraj instruistoj certan sciencan prepariĝon, por ke ili povu okupi sian oficon, tiel ankaŭ estas en la dia mondo. Majstro povas esti nur tiu, kiu estas superombrita kaj sanktoleita de la Sprito de Dio. Kiu ne estas superombrita de la sankta spirito, ne havas la rajton instrui, ĉar li rompos la dian leĝon.

Ne kredu, ke la Majstroj ne lernis. Ili trairis la lernejojn de la fizika, spirita kaj dia mondoj kaj ili havis la revelacion de la tuta kosmo. Ili konas la internajn leĝojn de la Naturo, ili konas la strukturon de la mondo, ili konas la strukturon de la homo, lian vojon de disvolviĝo kaj lian altan destinon. Ili konas tiujn ĉi precize fiksitajn rilatoin intez liaj spirito kaj animo, inter liaj intelekto kaj koro. Kaj tial nur ili solaj povas ĝuste gvidi lin en la vojo de lia disvolviĝo.

Kaj vi demandas: „Kiamaniere oni povas rekoni unu Majstron?"

La rekonado de la Majstro estas pure spirita proceso. La Majstro ne povas aperi en la fizika mondo kiel kompletigita akto. Li ankaŭ ne povas veni kiel ia ekstera fenomeno en la vivo. La Maj-

stro venas kiel interna inteligenta manifestiĝo en la homo. Tial la rekonado de la Majstro fariĝas interne — en la animo de la disĉiplo. Multaj perceptas certajn pensojn sugestie kaj pensas, ke tio estas ilia Majstro, kiu parolas al ili de interne. Ekzistas tamen grandega diferenco inter la interna parolado de la Majstro kaj la sugestio. Sugestio estas afero de perforteco. La parolo de la Majstro estas afero libera. Tial, kiam la Majstro parolas de interne, la disĉiplo ricevas inspiron.

Sed ankau kiam la Majstro parolas de ekstere, per la vortoj de iu lingvo, lia parolo havas certajn kvalitojn. La Majstro uzas ĉiun vorton en ĝia loko. Li scias, kial li uzis iun vorton kaj kiamaniere efikos ĝiaj vibroj.

Memoru jenon: La koncepto pri Majstro estas severe determinita en la Viva Naturo.

Majstro estas nur tiu, ĉe kiu ekzistas nenia perforto. Li estas forta, sed li ne uzas perforton.

Majstro estas nur tiu, ĉe kiu ekzistas nenia mensogo. Lia alta prudenteco esceptas ĉiun mensogon.

Majstro estas nur tiu, ĉe kiu ekzistas nenia malbono. Lia boneco ekskluzivas ĉian malbonon.

Kiam ĉe iu homo ekzistas perforto, mensogo kaj malbono, li ne estas Majstro; li estas disĉiplo.

Tio estas la plej simpla kaj la plej komprenebla difino pri Majstro kaj disĉiplo.

La ĉeesto de la Majstro estas rekonata per tio, ke li donas vivon, lumon kaj liberecon.

Ĉar, Majstro estas nur tiu, kiu iras laŭ la vojo de la Amo, Saĝeco kaj Vero.

Kiu ankoraŭ ne observas plene tiujn ĉi leĝojn, estas disĉiplo.

La Amo de la Majstro estas elprovita, ĝi ne bezonas elprovon.

La Scienco de la Majstro estas elprovita, ĝi ne bezonas elprovon.

La pureco de la Majstro estas elprovita, ĝi ne bezonas elprovon.

La Majstro, en la vera senco de la vorto, estas **homo perfekta.** En li ne ekzistas eĉ ombro de ŝanceliĝo, hezito aŭ nekredado.

Nur Majstro rajtas nomi sin granda kaj potenca homo, ĉar **lia vivo rebrilas en la tuta kosmo.** Kaj kiam la vivo kaj la pensoj de iu homo rebrilas en la tuta kosmo, ili estas diaj.

La Majstreco supozas aktivecon, venantan de alta memkonscio. Devas estiĝi pure spirita proceso inter Majstro kaj disĉiplo. Ĉe tio estas necesa plena konscio pri la tasko, kiun ili devas fari. En la okazo devas ekzisti tia plena interŝanĝo inter Majstro kaj disĉiplo, kia ekzistas nur inter la patrino kaj la infano en ŝia ventro.

Kaj kiel la homa spirito laboras en la ventro de la patrino por konstrui la korpon de la infano, kiel li instruiĝas ĉe tiu ĉi proceso, partoprenante en la laboro, kiun faras la spirito de la patrino, tiel ankaŭ la Majstro kaj la disĉiplo devas kune labori kun la helpo de la Dia Spirito, por konstrui la spiritan korpon de la disĉiplo — lian eternan loĝejon.

Tiel esti Majstro signifas naski spirite. En tia senco de la vorto estas parolate en la Skribo, ke viroj estis naskitaj de viroj. La homo devas naski t. e. esti bona Majstro. La unua afero, kiun devas fari la spirita Majstro, estas malkovri al la disĉiplo la

spiritan, ĝis tiam nevideblan por li, mondon, kiel la patrino, post naŭmonata portado de la infano en sia utero, malkovras al li novan mondon.

Tiam estas klare nun, kia delikata kaj respondeca afero estas esti spirita Majstro. Tial Kristo turnas sin al siaj disĉiploj kaj diras al ili. „Ne nomu vin majstroj". Se iu arbire permesas al si esti Majstro kaj spirite kripligas iujn animojn, tiam li respondos antaŭ la Granda Leĝo. La granda leĝo estas bona, sed ĝi estas ankaŭ justa. Ĉiuj pretendantaj majstroj estas ĵetataj en la malliberejon, kaj post kiam ili ricevis sian punon — kaj ĉu vi scias kiom da miloj da jaroj estas necesaj por tio — nur tiam ili eniros la ĝustan vojon de sia disvolviĝo.

Bona estas la Granda, Leĝo sed ĝi estas ankaŭ justa.

Ĉu mi memorigu vin pri la okazo de Moseo? Moseo lernis ĉe la plej bonaj majstroj en Egiptujo. Li lernis longan tempon kaj trairis certan skolon. Kaj efektive, la mirakloj, kiujn li faris antaŭ la faraono, montras, ke li havis certajn sciojn. Sed pro unu krimo—la mortigo de la egipto, absolute malpermesita por disĉiplo de la Blanka Frataro, li devis resti en izoliteco kvardek jarojn en la dezerto por elaĉeti sian pekon. Por unu mortigo li devis instruiĝi kaj elaĉetadi dum kvardek jaroj. Nur post tio li ricevis novan inicon.

Memorigante vin pri la granda respondeco, kiun inicito havas pri ĉiu farita eraro, mi volas pensigi vin pri la granda respondeco kiun havas tiuj ĉi pretendantaj majstroj, kiuj kripligas la homajn animojn.

Tial Kristo avertas kaj instruas siajn disĉiplojn: „Ne nomu vin majstroj!"

8

Vi demandas min nun kiamaniere oni distingas la verajn majstrojn de la pseŭdomajstroj, kiamaniere oni distingas la majstrojn de la Blanka Frataro de tiuj de la Nigra Frataro.

La majstro de la Nigra Frataro ne konas la veron, tial li atentas la eksteraĵon. Li vestas sin per la plej belaj vestoj; portas plej multekostajn ornamjon kaj dekoraciojn, ringojn, superŝutitajn per diamantoj. Li diras al siaj disĉiploj: „Vi aŭskultos nur min; nur en mi vi trovos la veron."

La Majstro de la Blanka Frataro vestas sin modeste, sed ĉiam pure kaj bele. Li portas nek ringojn nek dekoraciojn. Al siaj disĉiploj li diras: „Ne atendu multon de mi!" Por ke la disĉiplo ne eraru, li volas igi lin mem trovi la internajn riĉaĵon kaj purecon de sia majstro, trovi ne lian eksteraĵon, sed lian internan brilon. Al tio, la majstro de la Blanka Frataro ne limigas siajn disĉiploj, sed donas al ili plenan liberecon.

La majstro de la Blanka Frataro, la majstro de la Vero, portas en si tri aferojn: l i b e r e c o n p o r l a a n i m o, l u m o n p o r l a i n t e l e k t o, k a j p u r e c o n p o r l a k o r o. La pseŭdomajstro portas en si: sklavecon por la animo, mallumon por la intelekto kaj malvirtecon por la koro.

Tamen, por ke vi havu bildon pri la majstroj, mi diros al vi, ke ekzistas ankaŭ alia kategorio da majstroj — l a G r a n d a j M a j s t r o j de l a G r a n d a U n i v e r s a l a F r a t a r o, kiuj konas la metodojn de ambaŭ kaj reguligas ilian laboron. Ili direktas la tutan kosmon kaj post la kompletiĝo de ĉiu evoluo, ili kreas novajn evoluajn ondojn, irontajn laŭ alia plano kaj alia ritmo.

La veno de unu majstro al la tero estas pru-

denta akto de la tuta Viva Naturo. Por ke iu Granda Majstro manifestu sin, ĉiuj inteligentaj animoj devas kolektiĝi en unu lokon. Al tio, sur la tero devas esti preparitaj la kondiĉoj por lia veno.

Nur por skizi la vojon, laŭ kiu tiuj ĉi kondiĉoj estas kreataj, mi diros:

Devas naskiĝi du geniaj homoj, por ke naskiĝu unu sanktulo — en la senco, kiun la Viva Naturo donas al tiu ĉi vorto. Kaj por ke naskiĝu unu Granda Majstro, devas naskiĝi dek sanktuloj.

Tiam estas klare, kial la Granda Majstro, kiu estas kolektiva unuo, speguligas la vivon de la tuta kosmo kaj kial lia vivo, siavice, rebrilas en la tuta kosmo.

La Majstro ĉerpas siajn sciojn kaj principojn el la granda libro de la vivo, en kiu ĉiu ŝtoneto, ĉiu branĉeto kaj floro, ĉiu kreskaĵo kaj besto, ĉiu homa ekzistaĵo, ĉiu formo, per unu vorto, estas skribitaj vivaj vortoj.

Kiam li prenas folion de iu arbo, li ĝin ekzamenas kaj legas kie kaj en kiaj cirkonstancoj disvolviĝis tiu ĉi speco de vegetaĵoj, kiaj estis tiam la homoj kaj kia estis la stato de la suna sistemo. Li legas ankaŭ pri multaj okazaĵoj en la nuna vivo, kies atestanto estis tiu ĉi folio. Ĉar vi devas scii, ke ĉio lasas postsignojn sur tiun ĉi folion. La folioj de unu arbo kronikigas ĉion, kio fariĝas en ĝia ĉirkaŭaĵo. Ili rakontas pri tio, kiaj homoj preterpasis, kiaj estis iliaj pensoj, deziroj kaj agoj.

Por la Majstro ne ekzistas muta ekzistaĵo en la Naturo — ĉio parolas al li en sia lingvo.

*

Antaŭ du mil jaroj riĉa junulo demandis Kriston:

„Bona Majstro, kion mi devas fari por heredi eternan vivon?"

„Bona Majstro!" En la lingvo bulgara kaj ankaŭ en ĉiuj aliaj lingvoj ne ekzistas vortoj pli enhavoriĉaj, vortoj kun pli da melodieco kaj harmonio, ol tiuj du vortoj. La disĉiplo devas multe peni por kompreni ilian profundan sencon.

La vorto „Majstro" en la lingvo bulgara*) estas perfekta en ĉiu rilato — en matematika, en kabala kaj ankaŭ en muzika.

„Bona Majstro!" Tiuj ĉi vortoj entenas en si ĉiujn bonojn de Dio. Ili portas en si la kondiĉojn, necesajn por la efektivigo de la Diaj Amo, Saĝeco kaj Vero. Ili portas en si la kondiĉojn, necesajn por la efektivigo de ĉiuj virtoj. Tiuj ĉi vortoj estas ŝlosilo, per kiu oni povas malfermi la pordojn, fermitajn de jarcentoj. Ili prezentas magian formulon, kies forton oni devas elprovi. Sed por tio estas necesa kredo!

Antaŭ du mil jaroj riĉa junulo demandis Kriston: „Bona Majstro, kion mi devas fari por heredi eternan vivon?" Sed la respondo igis lin foriri kun mallevita kapo. Levu nun viajn kapojn, turnu vin al la Granda Majstro kaj diru:

„Granda Majstro, mi volas plenumi vian leĝon!"

Nur tiamaniere vi fariĝos disĉiplo de la Granda Majstro kaj servanto de la viva Dio.

---

*) „Majstro" en la lingvo bulgara sonas „uĉitel". (Noto da la tradukinto).

# Disĉiplo

Mi dividas la homojn en kvar kategoriojn: homoj de la malnova testamento, homoj de la nova testamento, justuloj kaj disĉiploj. Mi uzas tiujn ĉi terminojn, ĉar mankas aliaj pli trafaj, kaj pleje, ĉar ili memorigas pri konataj bildoj kaj ideoj.

Tiuj ĉi vortoj esprimas kvar grandajn epokojn en la disvolviĝo de la homo, kvar kulturojn, kvar komunajn kolektivajn fluojn en la homa konscio.

Kiaj estis la konceptoj de la homoj de la malnova testamento, vi trovos en la Malnova Testamento. Kiaj estas la konceptoj de la homoj de la nova testamento, vi trovos en la Nova Testamento. Kiaj estas la konceptoj de la justuloj, vi povas ekscii studante la nunan kulturon. La justuloj — tio estas la homoj de certa jura sistemo. Sed se vi serĉas la vojon de la disĉiplo, vi trovos ĝin nek en la malnova, nek en la nova testamentoj, nek en la sciencaj kaj etikaj sistemoj de la nuna mondo.

La vojo de la disĉiplo — ĝi estas la novo, kiu eniras en la vivon de la homaro.

Por priskribi al vi la statojn de tiuj kvar kategorioj da homoj en la mondo, mi donos la jenan klarigon. Unue vi estas inteligenta estaĵo, kiun la nevidebla mondo sendas al la tero kaj donas al vi korpon, ne demandante vin, ĉu vi tion volas aŭ ne. Tia estas la stato de la homo de la malnova testa-

mento. Dua stato: oni vin sendas al la tero, oni donas al vi korpon kaj iom da libereco por diri kien vi volas iri. Ĝi estas la stato de la homo de la nova testamento. Tria stato: oni vin sendas de la nevidebla mondo al la tero ĉe la plej favoraj cirkonstancoj por lerni, havante pli grandan liberecon. Ĝi estas la stato de la justulo. En la vivo de la malnova testamento vi elaĉetos viajn pekojn kaj vi suferados. En la vivo de la nova testamento vi perfektigados vin. En la vivo de justulo vi helpos al aliaj. Kaj kiam vi venas al la tero kiel disĉiplo, vi komencos lerni la grandan sciencon de la Amo.

Ĉe la Amo oni jam efektive difinas sin mem, oni samtempe difinas siajn rilatojn al la homoj kaj al la perfektaj estaĵoj.

Ĉiuj konfliktoj, kiuj ekzistas en la mondo, devenas de tiuj ĉi kvar specoj da vivo, de tiuj ĉi kvar kolektivaj fluoj, kiuj agas en la mondo. Koncerne la homan organismon ili rilatas jene: la vivo de la malnova testamento fluas en la stomako kaj en la intestoj; la vivo de la nova testamento fluas en la lungoj kaj en la simpatika nerva sistemo; la vivo de justulo fluas en la malsupraj sferoj de la cerbo kaj la vivo de disĉiplo fluas en ĝiaj supraj sferoj. La lasta okupas la plej belan lokon. Tial la vivo de disĉiplo prezentas la idealan aferon en la homo.

Multaj provis pacigi tiujn ĉi fluojn en la vivo, forigi la konfliktojn, kiuj aperas kiel natura rezulto de ili. Sed la rezultoj de tiuj ĉi kvar vivoj estas per si mem nepacigeblaj. Tiuj ĉi fluoj ne povas esti izolitaj.

Ilia izolado, aŭ pli ĝuste ilia konkerado devas esti farata iom post iom. Ĝi efektiviĝas nur kiam

la vivo de disĉiplo atingas sian kompletiĝon kaj siajn altajn celojn.

La vivo de la disĉiplo entenas en si la valoraĵojn de tiuj ĉi kvar vivoj. Ĉar, per si mem ili estas fazoj, tra kiuj la homo nepre devas pasi. La homoj de la malnova testamento preparas la vojon por tiuj de la nova testamento; la homoj de la nova testamento preparas la vojon por la justuloj; la justuloj preparas la vojon por la disĉiploj, kaj la disĉiploj preparas la vojon por la veno de la Dia Regno sur la teron. Ili estas ŝarĝitaj per la solvo de tiu ĉi malfacila problemo kaj kiam la homo transiras de la vivo de la malnova testamento al la vivo de la nova testamento, li transportas ĉion valoran el la unua en la duan. Transirante de la vivo de la nova testamento al la vivo de justulo, li transportas en la lastan la valoraĵojn de la unua. Kaj fine ĉiuj valoraĵoj de la lasta estas transportataj en la vivon de la disĉiplo. Tiamaniere kreiĝas tiu ĉi interna ligo inter ĉiuj homoj, tiu interna unuiĝo malgraŭ kaj spite al ĉiuj konfliktoj, kiuj estas karakterizaj por tiuj ĉi kvar specoj da vivo.

Diversaj estas la fontoj de tiuj kvar vivoj kaj diversaj estas la kondiĉoj, en kiuj ili disvolviĝas. La disĉiplo, post kiam li pasis tra ĉiuj skoloj de tiuj kvar vivoj, kiel tra preparaj lernejoj, eniris en kondiĉojn tute novajn kaj ĉerpas vivon kaj fortojn el tute nova fonto. Pri tiu ĉi fonto aludas Kristo, kiam li diras: „Kiam venos la spirito de la Vero, ĝi instruos vin pri ĉio."

Enirinte en la vojon de disĉiplo, oni havas aliajn konceptojn kaj ideojn pri la vivo, tute diferencajn de la konceptoj de la homoj de la mal-

nova kaj nova testamentoj kaj de la justuloj. Ĉiuj tiuj ĉi tri kategorioj da homoj vivas ĉiam ankoraŭ en la sfero de la individua vivo — ili ankoraŭ ne vivas p o r l a T u t o.

La homoj de la malnova testamento serĉas riĉecon kaj trezorojn. La malfacilaĵoj de la vivo faras ilin malicaj.

La homoj de la nova testamento serĉas kunsenton kaj simpation. La suferoj kaj la malfacilaĵoj ilin hezitigas, malkuraĝigas kaj forlogas.

La justuloj serĉas estimon kaj honoron. La konfliktoj ilin ĉagrenas kaj ofendas ilian indon. Ili levis sin ĝis la plej alta supro de la individua vivo, tial ili sentas tiel dolore ĉiun malrespekton de sia indo. Por ĉio, kion ili faras, ili serĉas aprobon, respekton kaj estimon.

Sola la disĉiplo serĉas nek eksteran riĉecon, nek kunsenton kaj subtenon, nek respekton kaj estimon. Sola la disĉiplo nek maliciĝas, nek forlogiĝas, nek ĉagreniĝas. Li ĝojas pri la konfliktoj, kiujn li renkontas en sia vivo, ĉar li scias, ke ili neeviteble devenas de la kvar kolektivaj fluoj, kiuj cirkulas en la vivo. Li rigardas ĉiun konflikton kiel grandan problemon, kiun li devas solvi.

Li pensas kaj agas tiamaniere, ĉar li pasis tra la a b n e g a c i o. Li eniris en la vojon de disĉiplo post kiam li forrifuzis la vivon de la homoj de la malnova testamento, la vivon de la homoj de la nova testamento kaj la vivon de la justuloj.

Tial mi diras al vi: N u r l a d i s ĉ i p l o l e r n a s, dum ĉiuj aliaj nur studas.

Ordinare oni interbatalas, kritikas sin kaj sin moraligas. La disĉiplo kritikas absolute neniun, nek moraligas. Li tute ne okupas sin pri la eraroj de la

homoj. Por li tiuj eraroj ne ekzistas. Por li ekzistas nur la ĝusta vivo, la vivo de la Amo. Por la disĉiplo Dio ne estas Jehova de la malnova testamento, kiu juĝas kaj punas la homojn. Por li Dio estas Dio de la Amo, de la Lumo, de la Paco kaj de la Ĝojo. Tio estas la kvalito de la disĉiplo.

Se vi demandas min, kia estas la idealo de la disĉiplo, mi diros al vi:

Amo, Lumo, Paco kaj Ĝojo por la animoj. Tio ĉi estas idealo, kies efektiviĝo ne postulas la eternecon. Oni povas ĝin efektivigi ankoraŭ nun. Mi ne parolas al vi pri Saĝeco kaj Vero — por ili venos alia epoko. Ili ne estas por la nuna tempo. Nun la disĉiploj bezonas Amon, sed ne sen Lumo, Lumon, sed ne sen Paco, Pacon sed ne sen Ĝojo. Ili bezonas Amon kun Lumo, Lumon kun Paco, Pacon kun Ĝojo. Ĉiuj tiuj aferoj estas ligitaj en unu.

La nuntempaj homoj havas en si nek lumon, nek pacon, nek ĝojon. Tial kiam religiuloj aŭ scienculoj parolas pri sia sperto, iliaj konkludoj kaj konsekvencoj estas odinaraj, efemeraj.

Kiam disĉiplo parolas pri sia sperto, li povas paroli nur pri la sola sperto de la amo, en kiu estas lumo. Li povas paroli nur pri la sola sperto de la Lumo, en kiu estas paco, li povas paroli nur pri la sola sperto de la paco, kiu plenigas la animon per ĝojo.

La Amo, la Lumo, la Paco kaj la Ĝojo, pri kiu mi parolas, ne manifestas sin en la nuna vivo, en la vivo de la ordinaraj homoj. Ili estas atributoj nur de la disĉiploj. La disĉiploj estas la solaj kondukiloj

de iliaj fortoj; la solaj iliaj reprezentantoj en la vivo. Kompreneble, mi nur aludas pri tiuj ĉi altaj sferoj, en kiujn eniras la disĉiplo. Ĉe pli detala ekzamenado oni konstatos, ke ili konsistigas grandan kaj profundan sciencon, por kies studado estas necesaj la penoj de jarcentoj.

Amo — tio estas belega senlima mondo. Granda afero por la homo estas gustumi la amon en ĝiaj disvolviĝo kaj iompostioma manifestado, komencante de la fizika mondo, pasante tra la spirita kaj atingante la dian mondon.

Granda afero estas gustumi la lumon en ĉiuj formoj, kiujn ĝi kreas.

Granda afero estas gustumi la Pacon, gustumi la Ĝojon.

Tio estas sferoj, kiujn la disĉiplo devas trairi, gustumi kaj pristudi dum sia tuta vojo, ĝis kiam li atingos la finan limon de sia vivo de disĉiplo, post kio li komencos studi la grandan vojon de la Majstro.

Nur tiam li venos al tiu profunda koncepto pri la Vivo, al tiu profunda koncepto pri la Amo, kiu agas en la mondo, al la kompreno de la kaŭzoj, kiuj kreis la universon, kiel ankaŭ de la kaŭzoj, kiuj devigas la Grandajn Majstrojn veni por labori en la mondo.

Amo, Lumo, Paco kaj Ĝojo estas fruktoj de la Dia Spirito. La disĉiplo devas nutri sin per tiuj ĉi fruktoj. La unua frukto, kiun li ĝustumas, estas la Amo. La disĉiplo devas nepre gustumi tiun ĉi frukton, ĉar ĝi donas la eternan vivon.

Kaj kiu volas trovi la eternan vivon, la vivon, kiu devenas de la Amo, devas denove reveni al la arbo de la vivo. Li devas forlasi la vojon

de la malnova kaj nova testamentoj kaj de la justuloj kaj eniri la vojon de la disĉiplo.

Ĉu vi scias la vortojn de Kristo: „Iru, vendu viajn posedaĵojn, kaj donu al malriĉuloj kaj venu, sekvu min". Kaj nun mi diras al vi: Iru kaj disdonu la vivon de la malnova testamento, disdonu la vivon de la nova testamento, disdonu ankaŭ la vivon de la justuloj, kaj tiam iru al via Majstro! Li akceptos vin.

La Majstro havas kvar disĉiplojn en la mondo, kiujn li amas. Kaj se tiuj ĉi kvar disĉiploj rekomendos vin al li, li akceptos vin en la skolon. Se la Amo rekomendos vin al via Majstro, se la Lumo rekomendos vin, se Paco kaj Ĝojo rekomendos vin, li akceptos vin. Li malfermos por vi la pordojn de la skolo, li lasos vin libere eniri, li benos vin, konatigos vin kun la aliaj disĉiploj, kaj de tiu ĉi momento vi estos disĉiplo de via Majstro.

Sed gardu vin, ke vi ne iru al via Majstro antaŭ ol vi disdonis viajn posedaĵojn, kiel homoj el la malnova testamento, kiel homoj de la nova testamento kaj kiel justuloj. Se vi venos al li kun ĉiuj dekoracioj kaj ornamoj de tiuj tri vivoj, se vi venos kun via tuta indo de justulo, li nur ridetos kaj fermos por vi la pordon de la skolo.

Ĉar, disĉiplo devas havi pri la vivo nur unu ideon, ne du ideojn. Kiu volas esti disĉiplo, devas havi nur unu koncepton pri la mondo.

La disĉiplo povas havi nur unu Majstron en la mondo.

Memoru nun jenan grandan veron:

Ekzistas en la mondo nur unu Majstro, kaj ĉiuj majstroj devenis de Li.

Ekzistas en la mondo nur unu disĉiplo, kaj ĉiuj disĉiploj devenis de li.

La disĉiplo devas scii jenon: lin povas ami nur tiu, kiu lin instruas — lia Majstro. Kaj la disĉiplo povas ami nur tiun, kiu lin instruas. Oni amas nur tion, kio estas senmorta, kio neniam perdas sian belecon, sian inteligentecon, sian mildecon, sian bonecon.

Vi demandas min, kiuj estas la unuaj paŝoj sur la vojo de la disĉiplo?

Leĝo ĝi estas — la disĉiplo devas komenci per la Amo. Poste li pasos al la Lumo, post tio al la Paco kaj fine al la Ĝojo.

La disĉiplo portos la ĝojon en sia vivo kiel solvon de siaj problemoj. Mi ne parolas pri la ĝojo, kiu ŝanĝiĝas, sed pri la ĝojo de disĉiplo, kiun nenio en la mondo povas ombri, kiu neniam malfortiĝas. Ĝi estas la plej alta supro en la materia mondo. Nenia nubo povas atingi ĝin. La Dia Lumo ĉiam lumigas gin. Neniaj ventegoj estas en tiu ĉi supro — tie regas amo, tie regas lumo, tie regas paco.

Jen estas la naturaj vojoj de la disĉiplo — Amo, Lumo, Paco, Ĝojo. La homo povas tramigri la tutan mondon, li povas frapi sur la pordoj de ĉiuj skoloj, li povas serĉi ĉiujn grandajn Majstrojn, kiuj portas la vorton de la Eternulo, ili ĉiuj montros al li tiun ĉi vojon. Ili ĉiuj havas nur unu difinitan dian ideon pri la vojo de la disĉiplo, kiu ne povas ŝanĝiĝi.

Ĉie oni diros al li, ke la unua paŝo en la vivo de la disĉiplo estas la Amo. Aplikante la Amon, la pordoj de lia intelekto malfermiĝos kaj la sciencoj de la pasintaj jarcentoj, kiel ankaŭ la scienco de la

estanteco kaj de la estonteco, komencos eniri en lin laŭ vojo natura.

Estas vero, ke ekzistas pli granda vojo ol tiu de la disĉiplo, sed nur post kiam la homo trairos la vojon de disĉiplo, antaŭ li malfermos sin la granda v o j o d e l a M a j s t r o j. Ĝi estas la vojo de la saĝeco kaj ĝi estas la plej malfacila.

Amo, lumo, paco, ĝojo — jen estas la stadioj sur la vojo de la disĉiplo.

Kiam mi parolas pri disĉiplo, mi subkomprenas antaŭ ĉio idealan disĉiplon, disĉiplon en la larĝa senco de la vorto. Tiu ĉi disĉiplo instruiĝas tie ĉi sur la tero, en tiu ĉi mondo, kaj ankaŭ supre en la ĉielo, en la alia mondo. Li neniam forlasas la skolon — tage li lernas en la laboratorio de la tero kaj nokte li iras supren al sia Majstro, kiu instruas lin pri la teorio. La sekvantan tagon li denove revenas al la tero, por daŭrigi siajn praktikajn studojn en la laboratorio.

La ideala disĉiplo scias, ke li ĉiam estas disĉiplo, —ke li estis, estas kaj li ĉiam estos tia. Kaj post longa tempo, kiam la tero, kiel ankaŭ la tuta sunsistemo, kompletigos sian disvolviĝon, li transiras kiel disĉiplo en alian, pli grandan skolon. Tiam li portos alian nomon. La vorto „disĉiplo“ estas malforta por esprimi la profundan ideon, kiu estas kaŝita en tiu ĉi koncepto.

En pli mallarĝa senco de la vorto, sub disĉiplo oni komprenas tiun, kiu lernas tiu ĉi limigita sfero de la vivo. Li lernas tie ĉi kaj akiras tiom da scienco, kiom permesas la kondiĉoj de la vivo sur la tero. Li ankoraŭ ne havas konsciajn rilatojn kun la nevidebla mondo—kiam vespere li ekdormas, lia konscia disĉipleco ĉesiĝas.

Tial, sub disĉiplo, en pli preciza senco de la vorto, oni komprenas tiun, kiu jam havas realan sperton en la spirita mondo, kiu havas konsciajn rilatojn kun tiu mondo.

La vivo de la disĉiplo, post la vekiĝo de lia konscio, estas vivo de kreado, de laboro — ne vivo de graco. La graco koncernas nur la kondiĉojn por la studado de la disĉiplo. De li estas postulataj agado, penado kaj laboro. Longan tempon oni elprovos kaj pesos la disĉiplon ĝis oni enlasos lin en la Regnon de Dio. Por la plej malgranda difekto oni tuj ekspedos lin returne.

La eniro en la Regnon de Dio dependas de la scienco kaj de la saĝeco de la disĉiplo, kaj ne de lia amo. En la Regnon de Dio oni ne eniras pro graco. Por ke la homo eniru en la Regnon de Dio kaj por ke li ricevu tie decan lokon, tio dependas de lia saĝeco.

Kristo difinas, en unu verso, kion devas akiri la disĉiplo, por eniri en la Regnon de Dio, por ricevi eternan vivon: „Tio ĉi estas eterna vivo, ekkoni Vin, la Solan Veran Dion kaj la senditan de Vi Jesuon Kriston“. La konado de Dio kaj de Kristo estas kondiĉo por ricevi eternan vivon. Nur per tiu ĉi scienco oni ricevas vivon. Se oni ne povas ricevi vivon per la scienco, ĝi estas sen enhavo kaj senco.

Sed por ke li atingu tion, la disĉiplo devas lerni krei tiamaniere, kiel Dio kreas.

Kiamaniere?—En la unua ĉapitro de la Genezo estas donita simbola bildo pri tiu proceso de kreado, kiu komenciĝas en la disĉiplo post la vekiĝo de lia konscio.

La unua tago — ĝi estas la vekiĝo de la konscio ĉe la disĉiplo.

Sed antaŭ ol ĝi venos, la disĉiplo eniros en la grandan s i l e n t o n: tie estas nek sono, nek lumo. Kaj tiam, de la profundoj de sia animo, li vokos la Nevideblan, Nekonatan Dion de la eterneco, la Kreinton de ĉio. Li vokos lin per sia tuta spirito, per sia tuta animo, per sia tuta intelekto kaj per sia tuta koro kaj diros: „Eternulo, mi volas ekkoni Vin. Sole Vi estas, la kreinto de ĉio, kaj ekster Vi ekzistas nenia alia Dio." Kaj se la disĉiplo povas alvoki Dion en tiu ĉi pleneco, ie en la spaco ekbrilos malgranda mikroskopa lumeto, kiu kaŭzos al li tiom da ĝojo, ke li tuj forgesos ĉiujn malĝojojn kaj suferojn. Ie de malproksime li aŭdos la voĉon de Dio, de sia Majstro, kiu diros al li: „Vi volas ekkoni min. Tiam preparu vin al laboro. Venis la unua tago de la vivo. Via tero estas senforma kaj dezerta kaj mallumo estas super la abismo. Apartigu la lumon de la mallumo kaj komencu aranĝi vian teron. Diru: „Estu lumo!

Kaj se la disĉiplo estas disĉiplo elektita, li diros: „Estu lumo!" — kaj en li estos lumo.

„Estu lumo!" — tio estas la granda aspiro al lernado en la animo de la disĉiplo.

Kaj tiam venos en la vivon de la disĉiplo la grandaj tagoj de la kreado, kaj li komencos konstrui sian universon sub la sperta gvidado de sia majstro.

„Estu lumo!"

## La Sankta Fajro

Ekzistas en la mondo unu sankta fajro, kiu brilas per la flamo de la senmorteco.

En tiu ĉi sankta fajro la antikvaj saĝuloj kaj profetoj kutimis vidi la superan manifestiĝon de Dio.

„Nia fajro estas fajro ekstermanta“ estas dirite en la Skribo.

Kaj efektive, tiu ĉi fajro ekstermas, sed kion? — Aferojn mortajn, pereemajn, pekoplenajn.

Kiam ĝi agas en la mondo, iuj el la homoj forbrulas, aliaj fandiĝas kaj triaj reviviĝas kaj releviĝas.

Ĉiuj grandaj senmortaj animoj, elirante de Dio, portas tiun ĉi sanktan fajron en si mem. Kie ajn en la senmezura universo ili estus, ili laboras per ĝi:

Kaj ĉiuj tiuj ĉi animoj havas nur unu ideon pri ĝi:

La sankta fajro estas fajro de la Amo. La Amo portas la sanktan fajron. Kaj la sankta fajro donas la vivon. La vivo estas esprimo de la sankta fajro.

Jen kial kie brulas la sankta fajro, tie manifestas sin ankaŭ la amo, tie manifestas sin la senmorta vivo, tie kreskas kaj maturiĝas la fruktoj de la spirito.

Tiu ĉi fajro plenigas la tutan spacon. Ĉar ĝi subtenas la vivon.

Ĝi brulas ankaŭ en la homo. Kaj dum ĝi brulas, oni estas sana, vigla kaj gaja. Ĉio en ni funkcias harmonie — digestado kaj sangocirkulado kaj spirado. La sentoj estas korektaj, la penso estas korekta, la agoj estas korektaj.

La sankta fajro produktas agrablan varmon en la homo. Kiam ĝi brulas, oni estas en perfekta humoro. En ni regas stato de harmonio kaj plena paco.

Se tiu ĉi paco malaperas el la animo de la homo, tio montras, ke li perdis la sanktan fajron kaj eniris en la ordinaran fajron. Kaj la ordinara fajro brulas kaj forbrulas — ĝi produktas fumon, fulgon kaj cindron.

En la sankta fajro mankas fumo. Ĝi radias agrablan varmon, de kiu eliĝas vivo.

Pro tio, kiam la sankta fajro brulas en la homo, en li malaperas ĉia malkontento, dubo kaj premo. Se aperas eĉ la plej malgranda malkontenteco kaj malbona humoro ĉe la homo, tio estas signo, ke li troviĝas ekster la sankta fajro.

En la sankta fajro absolute ĉiuj pensoj, sentoj kaj deziroj estas harmoniaj. Oni tiam sentas tion, kio estas nomata paradiza ĝuo.

Kaj efektive, ne povas ekzisti paco en la homo sen la sankta fajro. Ne povas ekzisti prudenteco en la homo sen la sankta fajro. Ne povas ekzisti sen ĝi la amo, la kredo, la espero, la kompato, la humileco. Per unu vorto, nenia virto povas manifesti sin sen la sankta fajro.

Ĉiuj virtoj kreskas kaj disvolviĝas ĉe la sankta fajro. Sen ĝi ĉio ĉesas kreski.

Tial la homo ne povas vivi bonan vivon, en kiu manifestas sin la virtoj, se en li ne brulas la sankta fajro.

Oni ne bezonas ekbruligi la sanktan fajron. Oni devas nur lerni subteni ĝin. Ĉar, per si mem tiu ĉi fajro neniam estingiĝas.

Kaj tio, kio plej bone subtenas la

sanktan fajron en la homo, ĝi estas la kredo, ĝi estas la amo, ĝi estas la espero, ĝi estas la scienco, la saĝeco, ĝi estas la vero.

La nevidebla mondo nun agas per la fajro. Ĝi uzas la fajron kiel plej potencan rimedon por la purigo de la homo kaj de la tero.

Kaj la tero jam eniras en novan zonon, kie la materio estas en virga stato. Tie ĉiuj aferoj estos purigitaj kaj transformitaj. La fajro, kiu nun estas sur la tero, ekbruligos la materion, purigos kaj transformos ĝin, por ke ĝi fariĝu kapabla respondi al la pli intensaj vibroj de la nova vivo. Ĉio, kio rezistos al la potencaj kurentoj, restos por vivo, kaj tio, kio ne povas elteni tiun ĉi fajran ondon, estos elĵetita kiel nebezonata ŝlako. Ĉar ankaŭ en la spaco ekzistas kanaloj, tra kiuj estas elĵetataj la malpuraĵoj kaj la balaaĵo de la vivo.

Kompreneble, la temperaturo de tiu ĉi fajro povas esti mezurita per nenia instrumento. Ĝi estas multe pli alta ol la temperaturo de la suno.

Sed nur tiu ĉi fajro povas purigi la korojn kaj la intelektojn de la homoj kaj prepari la teron por la ekfloro de unu nova kulturo. Nur post kiam la tero pasos tra tiu ĉi fajro — kaj tio daŭros jarcentojn — ĝi eniros en novan epokon.

Kio estas vera pri la tero kaj pri la homaro kiel kolektiva tuto, tio estas vera ankaŭ pri la aparta homo. Ne povas veni en lin la nova vivo ĝis en lia animo ne ekbruliĝos la sankta fajro.

Se ekbrulos en li la sankta fajro, li fariĝas magnete altira por ĉiuj, kaj ĉiuj homoj estas pretaj servi al li.

Pensu pri la sankta fajro, en kiu Dio manifestas sin.

Pensu pri la sankta fajro, kiun portas ĉiuj perfektaj animoj — kaj subtenu ĝin.

Subtenu ĝin, ĉar per tio vi subtenos ankaŭ vian vivon.

# Korpo de la Amo

La nunaj homoj vidas kaj konas nur sian fizikan korpon. Ili studas ĝian anatomian konstruon, ĝiajn fiziologiajn funkciojn, kaj frapitaj de ĝia malsimpla kaj prudenta strukturo, komencas pensi, ke kiel la organika, tiel ankaŭ la spirita vivo de la homo estas nenio alia krom funkcioj de la korpo.

Ke la fizika korpo de la homo detruiĝas post la morto, ĝi estas vero. Sed tio, kio detruiĝas kaj malaperas, ne povas esti la vera loĝejo de la homo, de lia animo, de lia spirito.

Ankaŭ ne estas veraj loĝejoj de la homo tiuj pli subtilaj korpoj — etera, astrala kaj mensa, pri kiuj parolas la okulta scienco.

La lasta, kiel oni scias, asertas, ke la homo havas sep korpojn. Iliajn diversajn terminojn kaj klasifikon vi trovos en la okulta literaturo.

Tiuj ĉi korpoj, per kiuj funkcias la perfekta homo, efektive ekzistas. Sed ne ĉiuj sep povas esti nomataj korpoj en la vera senco de la vorto. En efektiveco nur tri inter ili estas korpoj, dum la aliaj kvar estas ŝeloj.

Mi donas novan interpreton al tiuj ĉi tri esencaj korpoj kaj mi nomas ilin: korpo de la Amo, korpo de la Saĝeco, kaj korpo de la Vero.

La korpo de la Amo — la vera korpo de la homo, kiu korpo neniam mortas, estas nun konstruata. Metita estas nur ĝia fundamento. La du aliaj korpoj

— la korpo de la saĝeco kaj la korpo de la vero ekzistas ankoraŭ nur kiel ĝermoj; por ilia disvolviĝo venos en la estonteco specialaj epokoj.

La tuta vivo de la homo—en la fizika, astrala, mensa kaj kaŭzala mondoj — havas nur unu celon: prepari la materialon por la konstruo de la korpo de la Amo.

La Amo estas projekciita en tiuj ĉi kvar mondoj, en la kvar ŝeloj de la homo. Tiuj ĉi kvar ŝeloj estas la laboratorioj, kie ellaboriĝas la materialoj necesaj por la konstruo de la korpo de la amo.

Ili estas nur certaj ebloj de la amo, per kiuj ĝi manifestas sin. En ĝi fariĝas senĉesaj ŝanĝoj — ili mem aperas kaj malaperas laŭ certaj leĝoj de periodeco. Tiuj ĉi ŝeloj estas ŝanĝeblaj, sed ekzistas en ili io, kio neniam malaperas kaj kio restas kiel konstantaj ĝermoj – fizikaj, astralaj kaj mensaj.

La kaŭzala korpo estas kiel atmosfero por tiuj ĉi ĝermoj. Ĝi estas ligita kun mondo, kiu entenas la eblojn de la fizika, astrala kaj mensa mondoj.

Kaj antaŭ ol oni eniras en la mondon de la amo, oni devas pasi tra la kaŭzala mondo, kie fariĝas kompleta paciĝo de la konfliktoj. La kaŭzala mondo estas mondo de paciĝo.

Kaj la mondo de la Amo per si mem estas tiu konstanta mondo, kie ĉio realiĝas. Gi estas la granda mondo, kie la vivo realiĝas.

Tial, nur en la mondo de la Amo realiĝas ĉiuj deziroj de la homo, kiuj aperas en la fizika, astrala kaj morala mondoj. Sed ili realiĝas nur kiam la korpo de la amo komplete formiĝis.

Kaj kiam mi parolas pri la Amo en la homo, mi subkomprenas la konstruon de tiu ĉi korpo. Nur tiam oni releviĝos kaj ekvivos la eternan vivon.

Tiam li estos libera de ĉiuj limigoj kaj malfacilaĵoj de la provizora vivo. Li ne plu estos objekto de tiuj ĉi ŝanĝoj, kiuj estas ligitaj kun la konstantaj naskiĝado kaj morto. Li ne plu konstante naskiĝados kaj mortados, sed li vivos en la eterneco. Li denove venados inter la homojn, sed ne laŭ la devigo de la karma leĝo, sed laŭ la vojo de la amo. Li venados inter ilin kiel Filo de Dio — por ilin helpi.

Homo, kiu havas tiun ĉi korpon, kiu akiris la releviĝon, povas esti videbla aŭ nevidebla. La tuta tero estas malfermita por li, kaj limoj ne ekzistas. Baroj—fizikaj aŭ moralaj, por li ne ekzistas.

La tuta Viva Naturo, konas lin kaj servas al li. Lin konas la plej malbonaj homoj kaj la plej kruelaj bestoj – kaj obeas al li.

Kiu vivas en la korpo de amo, ne povas havi malamikojn, ĉar li portas vivon, pacon, kaj realiĝon de ĉiu sekreta deziro, li portas kontentigon por ĉiuj bezonoj de ĉiuj ekzistaĵoj.

Havi la korpon de la amo signifas manifesti la amon, vivi ĝin.

Kaj la Amo — ĝi estas eterna vivo kaj eterna rejuniĝo, eterna konado de Dio, eterna akirado de libereco.

# Kristo

Oni dividas hodiaŭ Kriston en „historian", „kosman", „mistikan" ktp. Sed Kristo per si mem estas unu kaj nedividebla.

Ekzistas nur unu Kristo — la viva Kristo, kiu estas manifestiĝo de Dio, manifestiĝo de la Amo.

Kristo — tio estas Dio, kiu malkovras sin al la mondo.

Kiel manifestiĝo de la Eternulo, Kristo ne povas esti apartigita de Li, ne povas esti ekzamenata ekster Li.

Kaj kiam mi parolas pri Kristo, mi rigardas lin ne kiel abstraktan principon, sed kiel realan enkorpiĝon de la Amo.

La amo ne estas io abstrakta, sed ĝi estas la plej granda realaĵo. Ĝi havas formon, enhavon kaj sencon.

Kristo donis la plej kompletan esprimon de la amo sur la tero — tute egale kiel oni Lin konceptas: kiel „historia", kiel „kosma", aŭ kiel „mistika".

Ĉar, kiel „historia persono", kiel „kosma" esenco, aŭ kiel „mistika" fakto, Kristo estas kaj restas la plej perfekta esprimo de la Amo.

Kaj efektive, ne ekzistis antaŭ Kristo alia homo sur la tero, kiu havis pli da amo ol li. Ne ekzistas en la „kosmo" — ekstere, kaj nek en la „mistikaj" profundoj de la animo — interne, pli kompleta manifestiĝo de Dio ol tiu, kiun ni vidas en la persono de Kristo

Kaj tiam, kiamaniere oni devas kompreni la vortojn „historia", „kosma" kaj „mistika" Kristo?

Manifestanta sin en certa historia momento, kiel i d e a l a homo, kiel m o d e l o por la vera homo, Li estas „historia", kaj tiam la tempo kronikigas kaj atestas pri Li: „Jen la homo! Jen la vera homo, en kiu vivas la amo, la saĝeco kaj la vero kaj kiu ilin aplikas!"

Kiam oni konas Lin interne, Li fariĝas „mistika", kaj kiam oni konas kaj konceptas Lin kiel Dio, kiu manifestas sin en la mondo, Li fariĝas „kosma".

Kaj tiam la fizika flanko de tiu ĉi Kristo, ĝi estas la tuta homaro unuigita en unu korpo. Ĉiuj homaj animoj, en kiuj vivas Kristo, unuigitaj en unu —jen estas la fizika flanko de Kristo.

Ĉiuj anĝeloj, unuigitaj en la koro de Kristo, prezentas lian spiritan flankon.

Kaj ĉiuj dioj, unuigitaj en la intelekto de Kristo, prezentas lian dian flankon,

Tio estas la „kosma Kristo" — la manifestita Dio en la mondo.

Tial mistikulo ĉiam vidas Kriston — la granda Frato de la homaro, la unua bildo de la homo, la unuenaskito en la mondo — komenco de la homa gento, komenco de la homa evoluo; la unuenaskito, kiu kulturis kaj aperigis ĉiujn diajn virtojn kaj aplikis ĉiujn diajn leĝojn.

Montoj, kampoj, fontoj, riveroj, maroj, kun ĉiuj naturaj riĉaĵoj, kiuj kaŝiĝas en ili — ĉio ĉi tio estas esprimo de tiu ĉi granda frato.

Sed tio estas profunda mistero, kiun oni povas kompreni nur post miloj da jaroj da streĉa laborado.

Tiamaniere oni devas koncepti Kriston en Lia vasteco.

Li estas unu, kvankam oni Lin konceptas jen kiel „historia", jen kiel „kosma" kaj jen kiel „mistika."

Ĉiuj tiuj ĉi vortoj devas fariĝi vivaj en la vera konado de Kristo kiel manifestita kaj aperigita amo de Dio; ili ne devas resti sekaj ideoj, malliberejoj por la homa intelekto.

Kaj efektive, ĉu la „historia" Kristo, veninta antaŭ du mil jaroj ne estas por multaj kristanoj malliberejo por ilia intelekto? En kiu loko Kristo parolis antaŭ du mil jaroj pri si mem, kiel pri historia homo? Li parolas pri si mem kiel pri spirito, kiu estos sur la tero ĝis la maturiĝo de la mondaĝo, t. e. ĝis la fino de tiu ĉi epoko de perforto kaj malbono, kiu vivas siajn lastajn tagojn.

„Iru kaj prediku" diras Li al siaj disĉiploj, „kaj mi estos kun vi ĝis la maturiĝo de la mondaĝo".

Unu el la plej grandaj eraroj estas pensi, ke Kristo estas en „la ĉielo", ke Li sidas tie kaj atendas la „duan alvenon" por komenci juĝi „la vivantojn" kaj la „mortintojn".

La vero estas, ke Kristo neniam forlasis la teron. Memoru liajn vortojn: „Estas donita al mi ĉia aŭtoritato en la ĉielo kaj sur la tero".

Kristo estas, kiu movis, movas kaj movos la „historian" kaj la „kosman" kaj ankaŭ la „mistikan" vivon de la tero kaj de la homaro.

Sen Kristo ne ekzistas kosmo, tio estas organizita kaj aranĝita mondo.

Sen Kristo ne ekzistas „mistika" vivo.

Li estas la granda inspiranto de ĉiuj revelacioj en ĉiuj tempoj. Li estas la nevidebla motoro de la tuta spirita vivo kaj sperto de la homaro.

Pri tio atestas ankaŭ la Sankta Skribo, en kiu Kristo estas la centra figuro.

Tion aludas ankaŭ Kristo mem en la vortoj: „Pri mi skribis Moseo kaj la profetoj".

Moseo, en tre larĝa senco, reprezentas ĉiujn spiritajn gvidantojn de la homaro, ĉiujn scienculojn, filozofojn, verkistojn, poetojn, pentristojn, muzikistojn, kiuj preparas la homajn intelektojn kompreni Kriston kaj la Dian Veron.

Kiom ajn nedaŭraj ŝajnus iliaj verkoj, kaj kiom ajn ŝanĝemaj estus iliaj teorioj, ili ne estas arbitraj, sed ili estas kreataj sub la influo de unu komuna leĝo de la spirito, kiu laboras en speciala maniero ĉe la homoj.

Sekve, ĉiuj tiuj ĉi homoj laboris por la ĉiuflanka leviĝo de la homaro, preparadis la vojon por la veno de Kristo.

Ĉar, ne estas facila afero por tia granda spirito, kiel Kristo, veni al la tero. Oni devas streĉe labori en la daŭro de kelkmil jaroj, por ke venu Kristo inter nin. Ne estas facile veni al la tero.

Sed per sia veno al la tero, Kristo malfermis novan epokon en la disvolviĝo de la homaro. Li desegnis la vojon, la sola vojo, per kiu la homa animo povas levi sin al Dio.

Tial Li diras: „Mi estas la Vojo, la Vero ka la Vivo".

La V o j o — en la larĝa senco de la vorto — ĝi estas la movado de la spirito en la saĝa aplikado de la leĝoj de la naturo.

L a V i v o — ĝi estas harmonia organizo de la elementoj kaj la disvolviĝo de la fortoj en la homa animo.

L a V e r o — ĝi estas la manifestado de la sola Dio, kiu kreas kondiĉojn por la disvolviĝo de ĉiuj vivaj ekzistaĵoj.

Elirinte de la Dia mondo, de la Vero, kaj venante en la materian mondon, Kristo ligas la homajn animojn en la mondo de la vero, kie kaŝas sin la grandaj celoj de ĉiu ekzistado.

Devas ekzisti fadeno, kiu ligus kun Dio la homajn animojn, dronantajn en la materio. Nur Kristo povas havigi tiun ĉi fadenon — unuigi la homojn kun Dio.

Ĉar Li, kiu malsupreniris de la dia mondo, portante vivon de la mondo de la Vero, denove leviĝis en ĝin kaj tiamaniere desegnis la vojon, kiu kondukas de la provizora vivo al la eterna.

„Kaj vivo eterna estas — diris Kristo — ekkoni Vin, la solan veran Dion kaj la senditan de Vi Jesuon Kriston".

Ekkoni Dion — la ĝermojn de la spirito, la kondiĉojn, la fortojn kaj la leĝojn, sur kiuj bazas sin kaj sur kiuj konstruiĝas tiu ĉi majesta aranĝo de la aferoj.

Kaj ekkoni Kriston — la pridentan principon, kiu elvenas de la sola Dio, kiu portas vivon al ĉiuj estaĵoj, gvidas kaj konservas ilin, ligante ilin kun la origina centro de ĉio, kio ekzistas.

Kristo estas la vojo de tiu prudenta movado de la animoj, kiu kondukas ilin al la eterna vivo de la vero.

Pro tio, kiam oni demandas Kriston, kial Li venis al la tero, Li respondas: „Mi tial naskiĝis kaj tial venis al la tero, por atesti pri la Vero".

Tiuj ĉi vortoj, tamen, estas matematika formulo. La problemo pri la veno de Kristo estas unu el la plej profundaj de la homa vivo.

Multaj opinias, ke estas facile sovi tiun ĉi pro-

blemon. Ili diras, ke Kristo venis al la tero por suferi kaj savi la homaron.

Sed la suferado ne estas la esenca afero en la veno de Kristo. La suferado estas duaranga momento en la vivo de Kristo kaj ĝi tute ne estas kapabla difini tiun ĉi gravan momenton en la historio de la homaro.

Ankaŭ la savo, tiel kiel oni ĝin komprenas, estas nur parta kompreno de la vero.

Hodiaŭ tamen ĉiuj predikistoj parolas, ke Kristo venis al la tero por savi la homojn. Se Kristo estus savinta la mondon en tiu meĥanika maniero, kiel oni pensas, kaj se oni estus efektive savitaj, oni ne vivus nun tiel malkonforme al la spirito de la instruo de Kristo.

Evidente, en la ideo pri la Savo kaŝas sin tute alia senco. La savo ne estas tie, kie oni ĝin serĉas, nek ĝi venas tiel meĥanike, kiel oni pensas.

Kristo alportis al la teron la sciencon pri la animo. Li montris la vojon, en kiu la homaj animoj povas ekkoni Dion, ricevi eternan vivon.

Pordo do tiu ĉi vojo estas la Amo. Kiu pasos tra tiu ĉi pordo, eliros sur tiun ĉi vojon, sur kiu atendas lin heroaj agoj.

Multaj grandaj animoj vizitadis la teron antaŭ Kristo, sed ili ne povis solvi la malfacilan problemon pri la leviĝo de la homaro. Devis veni Kristo, por solvi tiun ĉi esencan kaj gravan problemon kaj por montri al la homoj la elprovitan vojon, en kiu ankaŭ ili povas solvi ĝin.

Antaŭ Kristo, Dio sendadis al la kampo siajn servistojn — profetojn kaj sanktulojn — sed ili ne povis fari dece la laboron

Kiam Kristo „la Filo de Dio“ venis al la tero, la laboristoj de la tuta ĉielo unuiĝis en lia nomo por fini la komencitan laboron.

Kaj en la Evangelio estas dirite, ke Dio tiom amis la mondon, ke Li sendis Sian Solan Filon, por ke ne pereu ĉiu, kiu kredas en Li kaj por ke li havu vivon eternan.

La Filo — tio estas la Vorto, la prudento, la diaĵo, kiu sola povas restarigi la harmonion en la mondo kaj la ligon inter la homaj animoj.

Kristo povis restarigi tiun ĉi ligon kaj povis influi al la homaro kiel al tutaĵo, ĉar Li mem estas ligita kun la granda potenca Tutaĵo.

Kaj kiam la Evangelio parolas pri la spirito, malsupreniranta kaj venanta sur Kriston, oni subkomprenas tiun unuiĝon de Kristo kun la kolektiva spirito de la mondo, danke al kiu unuiĝo estas ebla la realiĝo de unu dia ideo en la mondo.

Ĉar, tia estas la leĝo sur la tero — por plenumi la aferon de Dio, unu homo de la tero devas unuiĝi kun unu estaĵo de la ĉielo. En nia okazo tiu ĉi estaĵo estas la kolektiva Dia Spirito.

De tiu ĉi vidpunkto, Kristo estas kolektiva spirito. Li ekzistas kiel individuo, sed en la sama tempo Li estas kolektiva spirito. Li estas aro de ĉiuj Filoj de Dio, el kies koroj kaj animoj radias vivo kaj amo.

Ĉiuj Filoj de Dio, kiuj estas unuigitaj, ĉiuj inteligentaj animoj, kiuj vivas en dia unueco, tio estas Kristo.

La veno de Kristo al la tero estas la plej grava fakto en la historio de la homaro. Ĝi estas eksterordinara okazaĵo, kiel laŭ sia enhavo, tiel ankaŭ laŭ

sia signifo. Kun ĝi estas ligita la fundamenta ideo de la homa vivo, la ideo pri senmorteco, la ideo pri eterna vivo. Kaj ĉiuj penoj de la homa ekzistado hodiaŭ celas al tio — akiri senmortecon, eniri en la eternan vivon.

„Kaj eterna vivo estas, diras Kristo, ekkoni Vin, la Solan Veran Dion, kaj la senditan de Vi Jesuon Kriston".

Ekkoni Dion, ekkoni Kriston.

Ĉu oni ekkonis Kriston, kiam Li aperis antaŭ du mil jaroj? Ĉu oni konas Lin ankaŭ hodiaŭ?

Kiam la vero venos en la mondon, ĝi ne estos vestita kiel reĝo, sed ĝi havos sur si nur tre modestajn vestojn.

Tiel ankaŭ aperis Kristo antaŭ du mil jaroj en modesta simpla formo, en kiu oni ne povis Lin rekoni. Sed tiaj estas la leĝoj de tiu ĉi mondo.

En tiu ĉi simpla vesto — laŭ sia eksteraĵo homo kiel ĉiuj aliaj homoj — eĉ Liaj disĉiploj ne ekkonis Lin perfekte. Nur du aŭ tri inter ili vidis, ĉe la aliformiĝo de Kristo, lian „vizaĝon", lian internan aspekton.

En tiu ĉi interna lumo, ili ekkonis Lin kaj vidis Lin tia, kia Li estis inter la anĝeloj.

Por la hebreoj Kristo, estis la filo de Jozefo, la ĉarpentisto. Por la skribistoj kaj fariseoj Li estis blasfemanto, pretendanta Mesio, kiu mem fanfaronas, ke Li estas „filo de Dio". Li ne devenis de iliaj sferoj, Li ne lernis ĉe ili.

Kie lernis Kristo? Ĉar, ĉio, kion Li faradis atestas pri Lia granda instruiteco. Ankaŭ nun ekzistas homoj, kiuj pensas, ke Kristo estis simpla, malklera homo. Tio, tamen, ne estas vera. Kristo mem, tur-

nante sin al siaj aŭskultantoj, diras: „Se vi ne komprenas la terajn aferojn, pri kiuj mi parolas al vi, kiel vi komprenos la ĉielajn?" Sub „ĉielaj aferoj" Kristo komprenas la grandajn misterojn de la Suno. Li konis ankaŭ la „terajn aferojn" — Li sciis la tiaman kabalon, la filozofion de la orientaj popoloj kaj de la grekoj, kiel ankaŭ de la tiamajn sciencojn.

Efektive, Kristo ne bezonis lerni en la homaj lernejoj. Tiom pli, ke lia tuta vivo sur la tero estis per si mem konkreta leciono por Li.

Li estis fonto de nova sperto, kampo por aplikado de tiuj altaj principoj kaj leĝoj, kiujn Li konis en ilia agado en la nevidebla mondo.

Danke al sia vigla konscio kaj al sia rilato kun la nevidebla mondo, Li povis ĉiam ĉerpi sciojn rekte de ĝi.

Kaj kiam Kristo preĝis, la preĝo estis por Li interparolo kun la supera mondo. Per la preĝo Kristo interparolis kun la nevidebla mondo, kun ĉiuj hierarĥioj en ĝi, kun Dio.

Per la preĝo la nevidebla mondo donis al Kristo tiun ĉi grandan lecionon, kiun Li devis lerni sur la tero, malkovris al Li tiun problemon, kiun Li devis solvi en la kondiĉoj de la tera vivo.

Nur post la solvo de sia malfacila problemo, Kristo komprenis, per tiu ĉi sperto, ke la sola vojo por la savo de la homaro estas la Amo. Tiam Li komprenis la profundan signifon de ĉiuj siaj suferoj.

Por la mondo, tamen, kion ajn oni dirus, la suferoj de Kristo, liaj krucumo kaj malhonora morto, restas unu el la plej grandaj enigmoj.

Kial Kristo, la plej granda animo, kiu iam vizitis la teron, la plej granda karaktero, kiu iam aperis,

kial tiu ĉi bona, saĝa kaj forta homo devis morti tiel tragike?

La Sankta Libro diras, ke estis tiel „skribite" kaj nenio pli.

Aliaj asertas, ke ĝi devis fariĝi por la savo de la mondo.

Sed Kristo mem diras, ke Li venis al la tero por atesti pri la vero.

Unu aferon, tamen, oni povas prave aserti — Kristo estis krucumita, ĉar la Amo ne partoprenis en Lia vivo de ekstere. Kaj tie, kie la Amo ne partoprenas, aperas la plej grandaj konfliktoj, tie estas la plej grandaj suferoj, la plej grandaj dramoj kaj tragedioj. Ne la Amo ilin kreas, sed la konkurado pri ĝi. La Amo per si mem portas ĉien lumon, ĝojon kaj pacon.

Kiel ajn, sed ni vidas ke estis permesite, ke Kristo estu krucumita.

Sur la kruco Kristo travivis tion, kion oni povas nomi idee-mistikaj suferoj — la plej profundaj kaj la plej intensaj suferoj, kiujn povas sperti homa animo.

Li devis trinki ĝis la fundo la kalikon de la suferoj — tiun ĉi kalikon en, kiu estis kolektitaj ĉiu maldolĉaj sedimentoj de la pasinteco.

Sed en tiuj ĉi densigitaj suferoj ĉiuj misteroj de la pasinteco malkovris sin por Li. Tial, konsciante la gravecon de la momento, post la interna dramo, travivita en la Getsemana ĝardeno, Kristo diras: Por tiu ĉi horo mi venis.

Per la potenca alĥemio de la Amo, Kristo aliformigis la venenojn amasigitajn en tiu ĉi kaliko kaj tiel li likvidis unu fojon por ĉiam la perforton.

Kaj efektive, ĉu Kristo, kiu estis forta, genia homo, kiu sciis sian altan devenon, kaj ĉion antaŭvidadis, kiu konis la estontecon, ĉu Li ne povis eviti la suferojn, kiuj atendis Lin? Antaŭ Li staris la jena alternativo: aŭ voki „la legiojn da anĝeloj", per kiuj li povis ekstermi la hebrean popolon kaj la roman imperion, t. e, uzi la metodon de la pasinteco, la metodon de Moseo kaj Jeliah, la metodon de la antikvaj magiistoj kaj adeptoj, la metodon de la forto kaj de la glavo, aŭ akcepti la kalikon kaj la krucon kaj venki ilin per la forto de la Amo.

Kristo elektis la duan, kaj tio estas la unua, en sia speco, eksperimento sur la tero.

Kaj efektive, se Kristo havus timon de la suferoj, se Li havus timon de la kruco, sur kiu oni krucumis lin, de la najloj, per kiuj oni najlis lin, de la lanco, per kiu oni pikis lin, Li ne povus doni novan esencan solvon de la malfacila problemo pri la levo de la homa animo. Ĉiujn insultojn, ĉiujn batojn de la skurĝo, la krucon, la najlojn kaj la lancon Li fandis per la fajro de la Amo — la sola fajro, kiu povas fandi la armilojn de la perforto. Kaj lia eksperimento aukcesis.

Tiamaniere Kristo solvis problemon, de kiu dependas la estonteco de la tuta homaro. Tiamaniere Li malkovris la vojon por la savo de tiuj suferantaj animoj, por kiuj Li venis. Nome por tiuj ĉi simplaj sed altaj animoj, kiuj havis la kuraĝon konfidi sian kredon al Kristo—ne por scienculoj, aŭtoritatuloj kaj religiuloj de sia jarcento—Kristo oferis sian vivon,por ke ili vivu en tiu Amo, kiun Li lasis al ili.

En la suferoj de Kristo kaŝas sin io granda. Ili prezentas la sekretan flankon de lia vivo, pri kiu oni nenion scias,

Kaj tamen, kiam mi parolas pri la suferoj de Kristo, en mia konscio aperas du grandaj karakteraj trajtoj de Kristo: lia senkompara pacienco kaj lia humileco. Danke al ili Li elportis ĉiujn insultojn, mokojn kaj ofendojn, kiujn oni faris al Li. Antaŭ ĉio ĉi tio Kristo restis kvieta, trankvila kaj serena, kvazaŭ nenio fariĝus. De liaj okuloj ne falis eĉ unu larmo.

Tio estas granda pacienco, tio estas granda memregado, tio estas amo!

Tio estas roko, kiun nenio povas frakasi.

La krucumo de Kristo estis tragedio, sed tiu ĉi tragedio havis sian solvon—la releviĝo.

Kristo releviĝis kaj per sia releviĝo Li venkis la morton.

Kaj kiel la misteroj de la pasinteco malkovris sin por li en la suferoj, tiel ankaŭ en la releviĝo li ricevis revelacion pri la estonteco.

Kristo estas vere forta viro, potenca spiritoj heroo. Li ĉion venkis: la turmentojn, la krucon ka, la tombon.

Kristo ne portis la lignan krucon ĝis la fino. Li portis ĝin nur ĝis certa loko kaj poste ĵetis ĝin sur la teron. Oni pensas, ke Li ĵetis ĝin, ĉar ĝi estis tro peza por Li.

Ne, Kristo ne estis malforta homo. Li povis porti la krucon, sed Li forĵetis ĝin por montri al la homaro kia sorto atendas ĝin. Li volis diri: Mi povas porti la krucon de la suferoj de la vivaj homoj, sed mi ne povas porti lignajn krucojn.

Sed la nunaj kristanoj ĉiam ankoraŭ portas kaj kisas la krucon, kiun Kristo mem malŝatis.

Ĵetinte la lignan krucon sur la teron, Kristo stariĝis kaj rekte ekiris sian vojon al Golgota. Oni Lin najlis sur la kruco. Sed ankaŭ sur la kruco Li ne restis

longe. Li mem liberigis sin. Kiamaniere? — Elirante el sia korpo kaj irante al Jozefo el Arimateo.

Oni lin enterigis kaj sigelis la tombon. Sed ankaŭ el tie li eliris. Li ne volis lasi en la tombo sian korpon, ĉar ĝi estis vivanta. Li mem ĝin dismuntis kaj relevis.

La anĝelo, kiu kaŭzis lian morton, portis lian animon en la inferon, sed ankaŭ tie Kristo ne restis longe. Enirante en la inferon li kaŭzis tutan revolucion—Li tumultigis ĉiujn ĝiajn loĝantojn kaj liberigis ilin. Ne pensu, ke post sia releviĝo Kristo estis sola —en la infero Li estis ĉefo de tuta legio da anĝeloj, kiuj purigis ĝin de ĉiuj malliberuloj.

Per ĉio ĉi tio Kristo pruvis, ke fortulo ne povas esti tenata sur kruco, nek povas esti ŝlosita en tombo.

Fortulo ne mortas—li releviĝas kaj donas vivon ankaŭ al la aliaj.

Kristo estis la koro de la Eternulo, tial Li releviĝis. La koro de la Eternulo ne povas morti. Kaj ĝi revenis tien, de kie ĝi venis. Sed per la tuta tragedio, kiu okazis sur Golgota, ĝi verŝis novan sangon en la konsumiĝintajn arteriojn de la homaro, kaj donis vivan impulson al la dia sangocirkulado en la vivo.

Dum sia veno antaŭ du mil jaroj Kristo montris al ni nur unu flankon de sia vizaĝo.

Ni vidas Kriston en humiliĝo kaj malĝojoj, en suferoj kaj elprovoj. Ni vidas Lin kiel heroo de la elaĉeto.

Oni ankoraŭ ne konas Kriston en lia majesteco, en lia dia potenco kaj forto.

Forta kaj potenca estas nun Kristo. En la pasinteco oni trapikis lian manon per najloj. Sed nun

ĥeniu povas trapiki tiun ĉi manoĥ per najloj — ili tuj fandiĝus.

En la pasinteco oni krucumis Kriston sur ligna kruco, sed nun ne troviĝas tia granda peco da ligno, sur kiu oni povus Lin krucumi.

*Kristo ne povas esti krucumita duan fojon.*

Tiu ĉi Kristo nun venas viziti la homajn korojn kaj intelektojn. Li detruas ĉiujn malliberejojn, ĉiujn malverajn doktrinojn—ĉion tion, kio detruas la human intelekton kaj koron, kio naskas konfuzon kaj malordon — ĉion tion, kio rigidigas la homan vivon.

Li estis la viva Kristo, kiu portas vivon, lumon kaj liberon por ĉiuj animoj kiu levas la homojn kaj vekas en ili amon por ĉio.

Kiam mi diras, ke Kristo nun venas, iuj pensas, ke Li venos de ekstere. Kristo ne venos de ekstere, Li venos nek en formo de homo, nek en ia alia formo.

Kiam la sunradioj eniras en vian domon, ĉu ĝi signifas, ke la suno mem vizitis vin?

Memoru: *Kristo estas manifestiĝo de la Dia Amo.* Kaj Li revenos kiel interna lumo en la intelektoj kaj en la koroj de la homoj. Tiu ĉi lumo altiros ĉiujn ĉirkaŭ Kriston, kiel ĉirkaŭ granda centro.

La malfermiĝo de la homaj intelektoj kaj koroj kaj la akceptado de Kristo interne—tio estas la dua veno de Kristo al la tero.

Se oni ne akceptos Lin en tia maniero, ĉiam daŭros tiu ĉi vivo de malamo, de suferoj kaj mizeroj, de eksteraj kredoj, superstiĉoj kaj eraroj.

Forlogitaj de tiuj ĉi eksteraj kredoj, multaj religiuloj hodiaŭ falpuŝiĝas dirante: „Kristo anoncis la vorton de Dio antaŭ du mil jaroj. Li jam diris kion Li havis por diri kaj nun eniris en la ĉielon ĝis la

dua alveno, kiam Li venos juĝi la vivantojn kaj la mortintojn".

Sed mi diras al vi: Kristo ne instruis en tempo kaj spaco.

Ni ne rigardas Kriston kaj lian instruon kiel ion pasintan.

Ni ne rigardas Kriston kaj lian instruon kiel ion, kio venos en la estonteco.

Ni rigardas Kriston kaj lian instruon kiel ion eterne estantan.

Pro tio, ne nur en la daŭro de sia trijara predikado, sed ankaŭ en la daŭro de 2000 jaroj, Kristo ne ĉesis paroli. Kaj se oni povus restarigi ĉion tion, kion Li parolis en la daŭro de la tri jaroj, dum kiuj Li predikis al la tiamaj homoj, se oni povus restarigi tion, kion Li parolis en la daŭto de 2000 jaroj, oni havus grandvaloran sciencon.

Sed ankaŭ de tio, kion Kristo parolis en la daŭro de la tri jaroj de sia instruado, estas konservita tre malgranda parto — nur fragmentoj. Multaj el la epistoloj de Paŭlo kaj de la aliaj apostoloj restis kaŝitaj por la mondo. Ili, tamen, iam aperos antaŭ la publiko. Ili malkovras sin ankaŭ nun, sed nur al la progresintaj disĉiploj.

Ĉu vi opinias, ke Kristo malkovris antaŭ la publiko sian tutan sciencon? En komparo kun tio, kion Li havis en si, li donis tre malmulte al la tiamaj homoj. La tiamaj homoj ne estis pretaj por la scienco. Tial Li parolis al ili per paraboloj. Kristo ne volis doni siajn armilojn en la manojn de la malkleruloj, por ke ili ne turnu ilin kontraŭ Li.

Ĉu vi opinias, ke — se Kristo venos hodiaŭ, Li parolos tiel, kiel Li parolis antaŭ du mil jaroj? Hodiaŭ Kristo parolos en tute alia maniero.

Li instruos, antaŭ ĉio, la grandan sciencon de la Amo, kaj la metodojn de ĝia aplikado. Li instruos la vojon de la d i s ĉ i p l e c o, f r a t e c o k a j s e r v a d o. Ĉar tion postulas hodiaŭ la leĝo de la evoluo.

Kaj nun la granda Majstro turnas sin al ĉiuj vekiĝintaj animoj anoncante al ili la fundamentojn de la nova evangelio.

Ĉ i u j e s t u d i l i g e n t a j d i s ĉ i p l o j,
b o n a j f r a t o j,
f i d e l a j k a j v e r a j s e r v a n t o j!

Ĉar nur tiuj, kiuj estas diligentaj disĉiploj, bonaj fratoj kaj veraj servantoj, povas esti kreantoj de la nova kulturo, en kiu Kristo vivos en ĉiu homo kaj inter ĉiuj homoj.

Kristo bezonas hodiaŭ ne ordinarajn religiulojn, ne homojn militantajn unu kontraŭ alia, nek mastrojn kaj pastrojn, sed verajn homojn — kreantojn de la novo, disĉiplojn, fratojn kaj servantojn.

Hodiaŭ Kristo volas ne homojn, kiuj konstante Lin krucumas interne en si, sed homojn, kiuj akceptos Lin vivi en ili kaj inter ili, kiuj estos unu kun Li.

Kristo instruas nun pri kulturo sen krucumoj, k u l t u r o d e l a r e l e v i ĝ o.

Ĉar ni jam vidis kiaj estis la rezultatoj de la nuna kulturo, kreita de homoj, kiuj krucumis Kriston.

Venis la tempo fondi n o v a n k u l t u r o n, kiu estos kreita ne de homoj, kiuj adorkliniĝas antaŭ la krucumita Kristo, sed de homoj fratoj, en kiuj vivas la reviviĝinta Kristo — la vivanta Kristo de la Amo.

Fundamento de tiu ĉi kulturo estos la Amo.

Ĉar Amo estas la sola forto, kiu povas fari la

homojn diligentaj disĉiploj, bonaj fratoj kaj fidelaj kaj veraj servantoj, kreantoj de la nova vivo.

Tio estas la vivo, kiun Kristo hodiaŭ portas al la homaro, tio estas la parolo de la Granda Universala Frataro, tio estas kion la Majstro parolas.

Sed, ĉu multaj el la kredantoj, kiuj nomas sin kristanoj, ne estos tiam forlogitaj de la parolo? Kaj ĉu ili rekonos Lin?

Ili daŭrigos sian disputadon pri la „krucumita", pri la „historia" kaj pri la „kosma" Kristo, pri Kristo tiel, kiel Lin prezentas la diversaj eklezioj, kaj la spirito de lia viva parolo ĉiam restos fremda por ili.

Tial mi diras: Lasu tiujn ĉi difinojn kaj distingojn pri Kristo! Sciu, ke ekzistas nur unu Kristo de la granda Amo, kiu nun agas en la mondo, kiu agas ankaŭ en la animoj de la homoj.

Pri tiu ĉi Kristo mi parolas al vi — ne pri la „historia" kaj „krucumita" Kristo. Finfine, oni konas Lin sufiĉe kiel historian figuron, sed kiel vivan animon oni Lin ne konas.

Mi parolas al vi pri la viva Kristo, pri tiu Kristo, kiu portas en si vivon, kiu portas la novan sciencon kaj lumon, kiu portas la veron kaj la liberecon. Pri tiu ĉi Kristo, kiu portas ĉiujn metodojn por la konstruo de la prudenta vivo.

Li estas la granda Kristo, kiu estas nomata ĉefo de la Granda Universala Frataro.

Lin konas ĉiuj grandaj animoj kaj inter ili ne ekzistas disputo kiu kaj kia estas Kristo, kia Li estis, kie Li estas nun, kian rangon Li havas en la „hierarĥio de la Majstroj" ktp.

Ili ne disputas, ĉar ili absolute scias kian lokon en la Tuto okupas Kristo, tiel ankaŭ kiel ili

scias kia estas la loko de la aliaj grandaj homoj, kiuj aperis kaj aperas en la mondo.

Tiun Kriston oni devas ekkoni nun! Lin on devas vidi! Lin vidi kaj ekkoni. Ĉar multaj volas konvinki nin, ke ni povas esti veraj kristanoj ne vidinte Kriston kaj ne konante Lin interne.

Mi tamen asertas, ke se la homo ne povas vidi Kriston, nenio povas fariĝi el li.

Kaj por ke oni povu vidi Kriston, oni devas havi intelekton, koron, animon kaj spiriton kiel Liaj. Ĉiuj, al kiuj Kristo aperis antaŭ ol ili atingis tiun ĉi staton, faladis vizaĝaltere. Kaj kion povas vidi homo falinta?

Oni devas trinki de la fonto mem kaj ne de la rivero, kiu estas malklara, ĉar en ĝin eniris multaj aliaj elementoj.

Ekiru la vojon de tiu ĉi fonto. La vojo estas iom malfacila kaj longa, sed, kiel rekompenco, vi trinkos vivan akvon de la fonto mem, vi trinkos akvon, kiu refreŝigos por ĉiam vian intelekton kaj koron.

Antaŭ via rigardo malkovros sin larĝaj horizontoj, ne konataj ĝis tiam.

Sur tiu ĉi monto, kie ŝprucas la viva fonto, vi aŭdos la voĉon de Dio.

Ne deziru resti tie, sed venu malsupren al viaj fratoj. Venu malsupren kaj apliku, kiel disĉiplo, kiel frato kaj kiel servanto, la vivan parolon de via Ĉiela Patro, kiu vin altiris per la fadenoj de sia Amo.

Tiuj ĉi fadenoj estas en la manoj de Kristo — la manifestita Dio de la Amo.

# Postparolo

Prezentante tiun ĉi libron — elektitaj kaj sistemigitaj pensoj el la paroladoj de la Majstro — ni pensas, — ni, liaj disĉiploj, —ke ni plenumas sanktan devon al ĉiuj niaj fratoj de la tuta mondo, por kiuj estas destinita tiu ĉi libro.

De tiu ĉi riĉa fonto de la Parolo de la Majstro ni sendas certajn fluojn al la animoj de la aliaj, kredante, ke ili banos sin — kiel ni mem tion faris — en tiu ĉi viviga akvo, de kie ili eliros fortaj kaj refreŝigitaj por ĉiam. Kaj la diaj semoj, plantitaj en ili, estos malsekigitaj de tiu ĉi viviga malsekeco, kaj ili ricevos — kiel ĝi fariĝis ni, al fortan impulson al konstanta kreskado.

Ni deziras, ke tiu ĉi libro estu akceptita kiel esprimo de nia aspiro esti diligentaj disĉiploj de la Majstro, bonaj fratoj de la homoj kaj fidelaj servantoj de Dio.

Ni deziras, ke ĝi estu akceptita kiel frata donaco, kiel elektitaj fruktoj, kiuj maturiĝis en la ĝardeno de la Majstro, en la ĝardeno de la Viva Parolo.

Prezentante tiujn ĉi fruktojn, ni firme kredas — bazante nin sur nia propra sperto — ke ili nutros kaj trinkigos per senfina boneco la animojn de ĉiuj tiuj, kiuj havos la feliĉon gustumi ilin.

Kaj ni esperas, ke post kiam oni gustumos la belegajn kaj dolĉajn frnktojn, oni semos iliajn semojn en la ĝardeno de sia vivo kaj en la ĝardenoj de siaj fratoj.

# Tabelo de la enhavo


| | pago |
|---|---|
| Vivo | 5 |
| Animo | 10 |
| La Vero | 16 |
| Amo | 20 |
| Saĝeco | 30 |
| Justeco | 35 |
| Dio | 41 |
| La homo | 49 |
| Spirito | 60 |
| Bono | 68 |
| Libereco | 76 |
| Lumo | 81 |
| La kerno de la Dia doktrino | 87 |
| La Viva Naturo | 89 |
| La Granda Universala Frataro | 95 |
| Kvar aferoj | 104 |
| Majstro | 109 |
| Disĉiplo | 117 |
| La Sankta Fajro | 128 |
| Korpo de la Amo | 132 |
| Kristo | 135 |
| Postparolo | 153 |